

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO □ OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

SEN PAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO

12. strato Gracia. — SABADELL
BARCELONA-HISPANUJO

AVIZO: La Redakcio konservas al si la
rajton korekti laŭ bezono la manuskrip-
tojn. Neakceptitajn manuskriptojn oni
ne resendadas.

ENHAVO: ;Saluton! — Nia deklaro. — Bela Songo. — Flugadoj. — Mortanta ĉagreno.
— En la marbordo. — Mi rakontis. — «Lumon» al Castellar. — Pensoj. — Enlanda Mova-
do. — Eksterlanda movado. — Bibliografio. — Oficiala parto.

¡SALUTON!

MAJSTRO Zamenhof, kleraj kaj spertaj pioniroj de nia lingvo internacia, geesperantistoj, ceteraj gesamcelanoj de Hispanujo, enlandaj gesamideanoj: ĵus novnaskiĝinta familio, en Katalunlando — la lando bonvola kaj gastamema — konsistanta el geanoj diversaj, ĉiuj fervoraj, donas al vi fratan, aman ĉirkaŭprenon kaj manpremon de amikeco kaj saluto!

Vi, la eksterlandaj gazetoj, ĉefe la hispanaj, volu ankaŭ akcepti nian sinceran saluton, kaj volu cedi lokon simplan en via honorinda rondo al tiu areto malsperta, juna, kaj humila sed fervora kaj entuziasma, kiu celas, kiel vi, la venkon de Esperanto!

Al vi, «Tutmonda Espero» en nia lando la pioniro, kiu ricevis ĉiutempe nian kunhelpadon; niaj atestimataj amikoj kiuj ĉe tiu ĉi gazeto kunpartigis kun ni la klopodojn kaj penadojn de la esperanta disvastigado: akceptu nin bonvole, amike kun la estimo kaj afekcio ĝisnuna; al vi nian apartan koran saluton!

LA REDAKCIO

NIA DEKLARACIO

ESTAS vero, ke al nia kataluna esperanta movado mankis organizado; kaj malgraŭ tiu ĉi manko la disvastigado de nia internacia lingvo iĝis rapidege en nia lando.

Ĉu, do, nia jeso estas kontraŭdiraĵo? Tute ne, karaj gelegantoj. Tiun organizadmankon — ĉies kaj ĉie sentita — anstataŭis nia entuziasmo kaj ĉefe nia individua entrepreno kaj kuraĝo. Danko al tiu fakto Esperanto sukcesis en Katalunlando; nur danko al nia natura entrepreno nia celo efektiviĝis ĉe ni.

Sed al nia idealo baldaŭe koriginta en nia lando, mankis sperta direktilo; mankis al ĝi, tiu saĝa, lerta, klera, serena kapo kiu ĝin direktus; mankis al ĝi tiu forto deveninta de ĉia unuiĝo, de ĉia kunigado de klopodoj kaj energioj, por efike prosperigi ĝin. Estas pro tio ke ia societo okaze preninte sur sin la volon de ĝenerala enlanda societo, sukcesis multe sed ne entute, ĉar ilia unuiĝo estis nur noma sed ne vere efektiva.

Ni opinias ke la rolo de la ĝenerala societo krom unuigi devas celi efektivigi la rajtojn koncernantajn al ĉiuj enlandaj gesamideanoj: liveri al ili la perojn por uzi tiujn rajtojn: kaj kunhelpi per sia klopodo la ĉefaj societoj kaj iliaj taskoj kaj celoj.

Ĝis nun, nenia societo en nia lando celis plenumi tiujn celojn naturajn ĉe la geesperantistoj, kaj estos vere bedaŭrinde ke ni plue prokrastus nian plenumontan devon kiel esperantistoj, kaj konsekvence ne agi kiel bonaj esperantistoj.

Nia tasko, ne nur estas iĝi esperantistoj kaj igi esperantistojn, sed ankaŭ unuiĝi en serioza organizado por kontribui en la progresado kaj plibonigado de ĉiujn rolojn kaj devojn sin rilatantajn al internacia lingvo.

Tiuj ĉi pensoj de longe flosis en la aero ĉe ni; tiuj-ĉi sentoj de antaŭ longe batigis la koron de ĉiuj bonaj geesperantistoj katalunaj; ĉiuj plendoj celis ĉie la saman celon, kaj ĉien oni nur aŭdis «unuiĝo!». La vorto «amo», simbolo de nia kara internacia lingvo, ne iĝis plenrealeco, kaj nur anime ĝi kunigis ĉiujn.

Kial, do, oni ne penis por fariĝi vivantan tiun-ĉi senton, tiun-ĉi penson? Kial oni ne kuraĝis efektivigi la celon enestantan en ĉiu kataluno? Ĉar por sukcesi baldaŭe estis necesega aro da kuraĝuloj, de senlacegaj, fervoregaj entreprenantuloj, kaj ili ne estis. Estis nur areto da ili: kaj jen iam en unu loko, poste en alia,

poste kaj ĉiam ĉien, ili semas kaj semadis sian ideon; ili ĝin propagandas kaj propagandadis persiste, senhalte.

Novan fojon, ankoraŭ, dum nia pilgrimado ni konstatis, ve! ke ĉe la esperanta kampo kreskas ankaŭ rozujoj dornhavaj, kaj ke multaj homoj, aspekte bonaj kaj aspekte bonaj esperantistoj, estis nek bonaj, nek ekzemplaj esperantistoj; en nia kampo, bedaŭrinde, la homaj pasioj kaj homaj ambicioj reĝas ankaŭ en multaj koroj anstataŭante al tiu sento natura — laŭ nia kredo — ĉe ĉia esperantisto; kaj pro tiuj ĉi ambiciuloj nia ĉies dezirata kaj necesega kuniĝo ne efektiviĝis...

Tempo pasis... Kun senlima persisteco ni laboradis. Tempo pasis, sed jen nia afero plenumita. Ĝi postulis de ni multajn fortojn, energiojn kaj penadojn, pliajn klopodojn ol ne bezonis niajn kontraŭloj por terenfaligi nian konstruaĵon. Ia vero estas ke multaj homoj plej bone taŭgas por detrui ol por konstrui.

Fiere ni diras ke nia konstruaĵo farita per la tempo estas forta kaj ĝi estos la ŝirmilo de ĉiuj eĉ de tiuj kiuj malhelpis nin kaj baris nian vojon, ĉar ni estas sindonaj kaj pardonemaj, kiel ni ĉiame estos.

Kaj ni estas tiaj, tial ke ni kredas interpreti ĝuste la internan senton de nia Zamenhofa lingvo. Nian celon per la Kataluna Esperantista Federacio ĉiuj gekatalunoj povos lerni per ĝia Regularo enhavigita en ĉi tiu sama numero. Ĝi klarigos al ĉiuj nian senton plej bone ol niaj vortoj; sed ni devas malkaŝe konfesi ke ni transcedis al la K. E. F. ĉion kio ni havis kaj valoras; ni transdonis al ĝi parton da nia propra animo kaj parton da nia propra koro.

Nune ĝi estas al vi, katalunaj geesperantistoj! Ni kune zorgu pri ĝi, kaj ĝin ni prosperigu!



BELA SONGO

BRULIGITA restis la natura supraĵo de la tiel bonfarema kiel kruela somera suno: malbele flavaj la folioj de l'aleo: senkorloraj la kampoj, malgaja l'arbaro, teda la rivero: ĉio inspiris solecon. Nek kantis la najtingalo, nek ridetis la floroj, nek ĝojigis la verdaĵo. Sed feliĉe, Eolo ne dormadas; kaj subite malligas la ventojn, kiuj furioze trairas montojn kaj valojn, riverojn kaj aleojn, ŝetante la foliojn ĝis la fundo, klarigante l' atmosferon, surportante per siaj facilaj flugiloj amason ĉiufoje kreskantan da grizaj nuboj, kies terura vizaĝo pli kaj pli nigriĝas, verŝante jam

fine malsupren fruktodonajn larmojn, malgaja memoraĵo de l' es-
tinto kaj ĝojiga espero de l' tempo alvenanta.

Vivu milfoje l'aŭtuna puriganto de l' aero! Vivu senfine la
dolĉa fluidaĵo de la nuboj!

Ĉio de nun al mi ridas: freŝa l' atmosfero, beleta la sinlevanta
tritikaĵo, karesanta la herbejo, severa la vojo, babilema la torento:
ĉio certe anoncas novan epokon de restarigo, de gajeco, de ŝatinda
frukto.

Novan certe, kontentigan epokon por la esperantista Katalu-
nujo mi antaŭvidas: ĉarman, fruktoplenan fazon ni ekiradas.

Federacio kataluna de esperantistoj estas rondo kataluna de
samideanoj premantaj reciproke la manojn en konsento: estas ora
ĉeno des pli forte ju pli ame liganta niajn korojn.

Benita do estu tiel alloga familia danco! Bonveninta, potenca
ligilo de niaj koroj! Korsaluton al venerinda standardo sub siaj
flugiloj ŝirmante la esperantan Katalunujon!

Sed, ĉu nia progresema kara patrujo estis ĝis hodiaŭ kampo
senfrukta en la Zamenhofa semado? Ne, neniam. Ne nur kreskis,
radikiĝis kaj floris la nobla semo; sed eĉ produktis neforgeseblajn
fruktojn, kiujn vere ŝatis la tuta esperanta mondo.

Unue, nelaceblajn pionirojn, poste majstrajn stilistojn: tie,
enpuŝantajn grupojn, tie kuraĝigajn gazetojn: lastatempe, la
ankoraŭ bonodorantan V^{an} Kongreson, rava elmontro de la kata-
luna movado.

Tamen, malgraŭ la plej decidema volo, la homo laciĝis, ne
restas firma la koro, la malfacilaĵoj lin timigas; kaj tial nia kampo
sajnis iom dezerta; kvankam en la kataluna spirito nenio perdiĝas,
ĉio kontraŭe multobliĝas.

Jen la dolĉa frukto el la Kongreso tirita: la naskiĝanta Fede-
racio. Se «arbo bona ne povas produkti malbonajn fruktojn»:
ankaŭ, la rememorinda Barcelona Kongreso naskas altvaloran
Federacion, de ĉiuj deziratan, por ĉiuj same honoran.

Antaŭen do, katalunoj!:

«En laboro paca ne laciĝu,
Ĝis la bela sonĝo kataluna
Por eterna ben'efektiviĝos».

SEBASTIANO PUBILL, SKOLAPIULO.

Olot'o



FLUGADOJ

FORFLUGANTE supren... ne, tute ne. Poste flugadeto ĉirkaŭ kataluna lando, mi reflugis hejmen.

Kaŝita en mia animo kiel silenta ĉambro, interne mi klopodas...

«Frateco, frateco» eliris de senkorpa brusto. Mirindaĵo! La frateco jam tegas nian patrujon, murmuretis mia lango. Farita la Kataluna Federacio, kion vi deziras, malkvieta spirito?

«Kunlaboru fervore, senlaciĝe por la tutmonda frateco» ĝi respondis.

Nune, kiel fantaziemulo, mia revo flugas, rapide flugas koron... alian... foran... fremdan koron, ĝojege kisante ĉiujn kiel amema infanulo kioma varmeco!

Feino; nia esperanta Feino, estu senmakula patrino, benu la amikaran federacion, akceptu nian homan aferon, gravan, disvastigontan, spiritan, transcendan...

Ni toastu amon, gekunfederanoj, per glaso de feliĉo, al la esperanta sukceso, en la solena unua flugado tra la sankta amikeco, ĝis mirinda disciplino, ripozante en blua ĉielo, dorlotaj per orfadenaro de la suno, lulkantaj de la anĝeloj kiuj donis la dian pacon al la homoj bonvolemaj.

FLORENCJO SURROCA

Transcendemuloj...? 3-9.

MORTANTA ĈAGRENO

De l' hejm' la foresto
min malĝojigas,
se iam mi kantas
mi kantas malgaje,
se iam mi ridas
ne per la kor'.

Ĉagren' de foresto
kial vi staras?

kial la sorto
nun min devigas
de mia hejmo
restadi for?

Sen la varmeco
de mia lando,
mia anim' falas
mi ĉagreniĝas,

malvarmon sentas
kvazaŭ de mort'.

Kial kor' mia
ĉagrenas tiel,
se l' aliaj koroj
estas kiel vi?
kial min lasas
nune la fort'?

Ĉu vi ne sentis
la novan varmon,
koro la mia,
por la Homar'?
— Esperanto estas
en nia sort'.

Se ni lasis hejme
karajn gefratojn,
ni esperantiston

ĉie renkontos
nin kunportantan
la plej dolĉan hor'.

Per Ĝi mi mortigos
la hejman ĉagrenon,
kaj kune kun ili
mi restados frate,
kaj ĉiuj unuvoĉe
ni kantos en ĥor'.

Vivu Esperanto
por nia feliĉo!
por nia interamo
Ĝi restu kun ni,
Ĝi staru en nia koro
ĝis venu la mort'!

Regu Esperanto!
Regu en ĉiu kor'!

KROM

Transcendemulo? — 4-9

Januaro 1910



EN LA MARBORDO

PLAĈAS al mi ripozi sur la ŝtonegoj la krurojn pendantajn super la abismo, kiun la maraj akvoj kaŝas duone, la rigardon vagantan tra la senfino kaj la animon ripozantan sur via rememoro. Vi estas malproksime, tre malproksime je mi, sed mia animo vin vokas kaj sentas vin proksima.

Ni sidiĝu unu momenton kaj poste ni daŭrigos nian promenadon. Dume ĵetu vian rigardadon sur tiun maron, kiu etendiĝas antaŭ ni. Rigardu: kiel kvietaj kaj kiom bela! Ĝiaj ondoj venas, trankvilaj, kisadi la limigajn ŝtonegojn kaj ilin kisinte iĝas blanka ŝaŭmo kaj iufoje sendas al ni sian freŝecon per miloj da netuŝeblaj eroj. Ankau tiel, en la maro de l' nia vivo la ondoj estas nun kviet-

aj kaj kiam ili karesas per dolĉaj kisadoj niajn animojn, ili tuj devenas blanka kaj pura ŝaumo, kiu plenigas de la dolĉega freŝeco el la rememoroj nian spiriton. Sed ho ve! Unu tagon verŝajne, sammaniere kiel tiuj ŝtonegoj, sur kiuj ni ripozas nun, vidas la ondegajn supreniri fierege kaj fali senforte, ni vidos el la maro de l' vivo la ondojn stariĝi antaŭ ni furioze kaj aŭdos blekantan ventegon super ni. Ellernu esti kiel la ŝtonegoj firma al la maraj atakegoj kaj same kiel ili, post bataladi vi vin sentos pli pura kaj pli forta ol antaŭe, ĉar estas post la ventego kiam la aero estas pli pura, la ĉielo pli blua kaj la suno pli brila.

Rigardu. Sub niaj piedoj estas profundegaĵo. Ne timu ĝin, ĉar ĉu vi estas forta vane penos por vin depreni je tiuj altaĵoj la sirenoj, kiuj de sube vokos vin. Ili por vin altiri zorgos igi vin deziranta riĉaĵojn, kiujn ili al vi promesos donaci. Malsukcesinte en siaj intencoj, ili atentos la nokton, kies horojn per sia allogaj kantoj ili intencos vin dormigi. Dormante, vi vidos en sonĝo la promesitajn belaĵojn kaj delogita ilin sekvos senkonscie al la maraj grutejoj de kie oni ne revenas plu. Estu do, kiel tiuj ŝtonegoj, forta. La sirenoj, ĉiunokte rampas sur ilin, ilin kisante per dolĉegaj karesoj, sed la ŝtonegoj estas fide je sia amo kaj kiam la sirenoj karesemaj ilin kisas ampasie, ili ne sin donas, ĉar pli amemaj, pli pasiaj estas la kisadoj de l' suno kaj de la nebuloj kaj pli delogaj estas la kantoj de l' maro ol la kisoj kaj la kantoj de la allogaj sirenoj.

Ni stariĝu kaj iru promenadi laŭ longe de la marbordo silenta. Rigardu: oni ne vidas iun promeni. El la sojloj la marlaboristoj rigardadas senmovaj la maron, same kiel ni rigardadas el nia vilaĝo senmara, senmarborda kaj senŝtonega la najbaran kamparon kaj la malproksimajn montojn. Sed kiel malsimila la vivo tie kaj tie ĉi! Ĉi tie la homoj parolas laŭt: alta la kapon, trankvila la mienon kaj per nekaŝema koro. Vi vidos parojn de geamantoj promenadi tra la dezertaj marbordoj, kiam la suno brilegas plene aŭ kiam ĝi iras morti trans la montojn; ĉi tie le geamantojn ne viglas malspritaĵoj okuloj nek mokas babilemaj vilaĝanoj. La domoj estas blankaj ĉi tie kaj la balkonoj kaj fenestroj ŝajnas rigardadi simpatie kaj la enirejoj estas malfermataj je gepatra akcepto. La stratoj ne estas unuforme liniigitaj; ili estas tordaj, ili kreskadis laŭ sia volo kaj pro tio ili estas belaj kiel la vivo mem. Tre malsame je l' nia vilaĝo kie la stratoj estas unuformaj same kiel la dogmoj kiujn oni trudis al ni je nia infaneco igante neeble al ni ĝui la ĝojon de l' vivo. Tie la domoj estas fieregaj, lukse vestitaj,

kun fenestroj post kies vitroj zorge rigardadas scivolemaj okuloj kaj kun balkonoj post kies sunevitiloj ĉiam okuloj esploras...

Rigardu, Karulino mia. La suno kariĝas post la montojn, kiuj ĉirkaŭas nian malproksiman vilaĝon; ĝi subiras orkolorigante la maron, la ŝtonegojn kaj la marbordon. La blankaj domoj sangkoloriĝas. Ili bedaŭras profunde la mortiĝon de l' tago finiĝanta, ĉar ili ne scias certe ĉu la suno denove leviĝos morgaŭ kaj al ili sendos ĝian kareseman kisadon je amo. Ankaŭ ni ne scias pri la mistero, kiun al ni rezervas la nokto, kiu antaŭ ni eketendiĝas nun... Meze el la noktiĝa mallumo ni kisadu nun la alian kaj ĉu la morto venos kune kun la nokto morgaŭ la suno leviĝanta nin renkontos sur la stonegoj de ĝi tiom amataj kaj same kiel al ili, ĝi nin kisados kaj karesos.

Paroj de geamantoj promenadas laŭlonge el la marbordo. La nokto estas ĉie. Vi, Karulino mia, vi estas malproksima, tre malproksime je mi.

A. ROBREÑO GÜELL



MI RAKONTIS...

Mi rakontis al maro senborda
pri la grandaj turmentoj en koro,
kaj per bruo mallaŭta de l' ondoj
ĝi respondis al mi kun favoro.

Mi rakontis al vento rapida,
ke ne povas mi spiri libere;
kaj el landoj ĝi iaj mirindaj
al mi portis tuj freŝon aere.

Mi rakontis al verda arbaro
de la vivo malgaja dolorojn;
kaj en ombro ĝi tuj min dormigis,
ŝancelante foliojn kaj florojn.

Mi rakontis al Suno varmega,
ke mi vidas nur tagojn malklarajn;

varmigantaj kaj lumajn radiojn
ĝi tuj sendis al mi malavaraĵn.

Mi rakontis al homo-kunfrato
pri la vivo senĝoja; kaj li,
iel strange movinte la ŝultrojn,
tre rapide foriris de mi.

VEJNBERG



«LUMON» AL CASTELLAR

La taĝvetero helpis la deziron de ĉiu kiu intencis ĝui irante al Castellar por redoni la afablan viziton kiun faris al ni niaj amataj samideanoj el «Pacaj Batalantoj» ĝuiĝante samtempe je la vidaĵoj de la nomita belvilaĝeto.

La elirado el Tarrassa, kiu okazis ĉirkaŭ la unua kaj duono tagmeze, donis al ni specialan karakteron. ĴNu! Imagu dekduon da veturiloj, sekvante unu al alia, enhavante la respektindan kvanton da dudekkvar ekskursantinoj, kiuj altiris al si la rigardojn de la murmuremuloj kaj scivolemuloj.

Ni alvenis al Castellar je la tria horo, vekiĝante la intereson de la indiferentuloj ni atingis la etenditajn brakojn de niaj samcelanoj, kiuj nin atendis. Poste ni elveturis en la Urbdomon ĉe kies teretaĝo la grupo P. B. donas esperantan kurson; grupano el P. B. nin salutis kaj ni supreniris tuje al la ĉefa salono kie ni estis akceptitaj de la Ubkonsilantaro.

La urbkonsilanto S^{ro}. Sampere dediĉis al ni paroladeton al kiu respondis S^{ro}. Quintin Lopez el «Lumon» dankante la akcepton faritan al ni, kaj ankaŭ esprimante la plej varman saluton, finante la akcepton kantante ĉiuj kune, nia majesta himno «La Espero».

Poste ni vizitis la preĝejon laudesplorante la altvalorajn arĥitekturajn mirindaĵojn, kiujn ĝi enhavas, kaj ankaŭ la «Unugradaj Publikaj Lernejoj» en kiu oni jam atendis la instruistinojn, rakontante al ni la funkciado de tiuj laŭdindaj lernejoj. La ĉefinstruistino promesis al ni lerni kiel eble plej baldaŭ Esperanton, kaj instrui ĝin al la infanoj tuj kiam ŝi estos lerninta ĝin.

La socia sidejo de la grupo P. B. elbordiĝis pro granda amaso

da ĉeestantoj. S^{ro}. Casanovas el P. B. dankis al la Terrassa'j samideanoj ilian neforgeseblan viziton kaj akceptis korege la ideon proponitan de «Lumon» organizi dum la venonta somero Esperantan feston sur unu el niaj najbaraj montoj. S^{ro}. P. Rigola parolis pri la amo, starigante ĝustajn similaĵojn, kun Esperanto.

P^{tro}. Marko Lliró ĵus alveninta de Sabadell, salutis la du grupojn kunvenintajn pro sama afero. S^{ro}. Rambla, el «Lumon» dankis la afablecon liveritan al li kaj al siaj amikoj.

Finigis ĉi tiu festo per fratmanĝeto. Oni ekbalbutis nian himnon. Noktiĝis iam post iom. Oni organizis denove la karavanon, devore ni esprimis nian amikecon al Castellar'j kamaradoj kaj adiaŭante ilin ni ekmarŝis.

La oka eksonoris kiam la karavano trairis la ĉefpromenejo, kaj alveninte ĉe la sidejo de «Lumon» ĉiuj disiris hejmen kun rava memoro pri la eksterordinara pasinta vespero.

Grupano el «LUMON»



PENSOJ

— La vivo estas ŝtuparo tra kiu la homoj fatale devas suriri, kaj pro iliaj agoj iuj suriras tre rapide, aliaj malrapide aliaj malsupren falas. Sed kion mi ja vere al vi diras estas, ke, neniuj rajtas sidiĝi sur la ŝtupoj.



— La grandaj jesoĵoj de la homaro determinantaj la progresadon de la popoloj, estis faritaj pro tri demandoj: — kiel? — kiam? — kial? — La religioj metas ilian celon *super* ni; la scienco *antaŭe*... Nuntempe, ni marŝas...

F. DE P. BEDÓS
Esperantigis D. S.



ENLANDA MOVADO

Oni petas la delegitojn ke ili sendadu siajn monatajn priskribojn pri la loka esp. movado, plej mallongaj kaj legeblaj nur sur unu flanko de la papero klopodante sin okupi en ili nur pri detaloj rilatantaj al la festoj,

kursoj kaj diversaj aktoj de propagando okazantaj en la loko, en maniero raportema kaj konciza; se oni deziras *sin distri* per literatura aŭ pseŭdo-literatura skribo kvankam traktanta iun samideanan ekskurson aŭ solenon, verku ĝin aparte kun propra titolo kaj se ĝi estas publikiginda laŭ la juĝo de la Redakcio, tiu ĉi aperigos ĝin en alia loko de la gazeto. La lima dato por la sendo de la manuskriptoj estas la 15.^a de ĉiu monato.

BARCELONO

Vidinte la sukceson momente pligrandigantan de la *Kataluna Esperantista Federacio*, en la Barcelona Esperantistaro, iĝis la ideo krei la «Barcelona Esperantista Societo'n», tiel ke ĉi tiu estos por Barcelono, kio la Federacio estas por Katalunujo.

Nature, estas kelkaj cirkonstancaj diferencoj: la Federacio ne povas havi ejon: la «Barcelona Esperantista Societo» povas kaj devas havi propran ejon.

Oni intencas starigi, per ĝi, la unikan Esperantistan Societon en Barcelono (ne Sant Marti, Poble Sèch, Sarrià, k. t. p.) kaj ke ĉiu Barcelona Esperantisto estu ano de tia ĉi societo. Kompreneble, oni ne iĝos perforte malaperigi la nunekzistantajn esperantistajn grupojn, nek perforte oni iĝos ĉiun Esperantiston esti tia ano. La esperantisteco kaj la logiko ja iĝos tion esti.

Kaj ĉar tial la Barcelona Esperantistaro estos forta, kapabla, multepova, ĝi instruigos kursojn pri Esperanto, ĉe la ĉiaj ĉefaj societoj, ĉie en Barcelono, kaj tiel iĝos Esperantista fako en ĉia ĉefa Societo, ĉie en Barcelono. Jen kial estos tute troa kaj ne prava la ekzistado de senpovaj nur Esperantistaj grupetoj, kaj tiel ĉiu Barcelona esperantisto aniĝos en la «Barcelona Esperantista Societo».

Tiu ideo estas certe tiel bona kiel grava. Do estas devo de ĉiuj Barcelona Esperantistoj, ĝin disvastigi kaj fervore helpi tiujn, kiuj iĝos ĝiajn pionirojn. — DELFÍ DALMAU.

SABADELL

La entuziasmo jam tradicia de tiu ĉi urbo por la Zamenofa verko montriĝas je ĉiuj aspektoj de sia ekzisto kaj pri tio estas nebezzone informi la legantojn de *Kataluna Esperantisto*, ĉar ili ne ignoras la aktojn publikajn kaj nepublikajn kiujn organizis la Sabadell'aj esperantistoj kaj neankaŭ ignoras la efikajn rezultatojn de ilia propagando kaj de la kursoj donitaj de la du ĉi-tieaj societoj, kio disĵetis centojn da adeptoj tra la tuta urbo.

Sendube al tio ĉi obeas la fakto ke la dankindaj organizintoj de la amegata «K. E. F.» lokis fonde ĝian sidejon en nia urbo kaj konfidis al ni la delikatan laboron elirigi ĝian Oficialan Organon. Kiel, ajn estas, ni penos plenumi kun nia humila povo la laboron kiu estas al ni taskita, ĉar

ni estas konvinkitaj pri tio ke la afero donos da sukplenaĵoj por la kataluna esperanta vivado kaj por Esperanto.

*
* *

Nune, la multe konata societo «*Esperanta Semo*» instruas du kursojn de lingvo internacia por viroj kies lernantoj ĉeestas multenombre kaj kelkaj esperigas ke la nombro da lertaj esperantistoj jam atentinda kiun ni havas, pligrandiĝos pro ilia eniro en nian rondon. Multe sukcesas ankaŭ la kurso por virinoj kiun instruas la klera samideano S^{ro}. A. Lagarriga el la sama societo kaj en ĝia propra sidejo, kies klasoj okazas triope ĉiun semajnon kun ĉeesto de almenaŭ dekduo da fraŭlinoj tre entuziasmaj.

La komitato de la ĵus citita grupo por la periodo 1909-1910, elektita en la lasta trimestro de la pasinta jaro, estas kiel sekvas: *prezidanto*, S^{ro}. J. Pi-ferrer; *vic-prezidanto*, S^{ro}. A. Costa; *sekretario*, S^{ro}. S. Mas; *kasisto*, S^{ro}. J. Altura; kaj *anstataŭanto*, S^{ro}. J. Romeu.

La societo «*Āplech*» Esperanta Grupo, jarkomence nomis por si la sekv-
antan komitaton: S^{ro}. J. Vilardell, *prezidanto*; S^{ro}. J. Bracons, *vic-prez-
idanto*; S^{ro}. J. Pavia, *sekretario*; S^{ro}. J. Xercavins, *kasisto*; S^{ro}. L. Bus-
queta, *bibliotekisto*; S^{ro}. J. Molins, *anstataŭanto* 1.^a; S^{ro}. A. Xipell, 2.^a;
S^{ro}. M. Peig, 3.^a.

Ĝi lastatempe elcedis sian krediton al la Ĉekbanko Esperantista en Londono. — LA DELEGITO.

TERRASSA

La esperanta movado en nia urbo pligrandiĝas dank' al la senĉesa agado de la ĵus naskita grupo «*Lumon*», kiu prenis sur sin la gravan aferon tute esperantigi nian amatan urbon. Jen la hodiaŭa esperantagado.

La Urbkonsilantara Moŝto, subvencias esperantan kurson ĉe la «*Indus-
triaj Lernejoj*», faratan de la profesoro S^{ro}. Johano Graells, kie ĉeestas pli
ol 30 lernantoj.

Ĉe la «*Escuelas Pias*», niaj fervoraj samideanoj PP. Muixi, Carbonell kaj Marti instruas ne oficiale sed rajtigite de la estro de tiu ĉi laŭdinda kolegio, esperantan kurson por infanoj, kiuj jam ekbabilas nian karegan lingvon.

Kaj fine, la grupo «*Lumon*» daŭrigas sukcese la kvar kursojn (tri por viroj, kaj unu nur por virinoj) kiujn oni malfermis post la neforgesebla inaŭguracia festo.

«*Lumon*», ankaŭ organizis festeton okaze de la kvindekjara datreveno de la naskiĝo de nia Majstro. Oni legis kelkajn tradukaĵojn kaj originalaĵojn dediĉitajn al Li. S^{ro}. E. Ferrer paroladis pri «*Sienco kaj Esperanto*». Li rimarkis la nepran necesecon de ia ajn komuna lingvo por helpi la dis-

vastigadon de sciencaj verkoj; li rakontis kelkajn rememorindaĵojn, inter kiuj mi citas tion kio okazis al la franca ĥimiisto Berthelot kiu, por sin informi pri la ĥimiaj eltrovaĵoj de rusa aŭtoro, estis devigita studadi tiun malfacilan lingvon. Li jesigis la baldaŭan triumfon de Esperanto, taŭga lingvo por sciencaferoj. Oni legis verkaĵon de S^{ro}. J. Graells adekvata al tiu ĉi festo. Ptro. Muixi ankaŭ ĝin plenigis per sia favora kunhelpo.

Fine, «Lumon» aranĝis sukcesplenan ekskurson al Castellar kies specialan raporton mi faras en alia parto de ĉi tiu numero. — LA DELEGITO.

La tagon 13^{an} de Februaro devis doni konferencon pri «Gramatikaj Generalaĵoj» en la sidejo de «Lumon» la profesoro de niaj Industriaj Lern-ejoj S^{ro}. Eugeni Ferrer. Ĝi estas la unua de serio organizata de la sama grupo, traktante gramatikajn aferojn de vera utileco por la novaj esperantistoj.

VIC

En tiu urbo Esperanto ankaŭ kreskadas ĉiutage per sia propra forto, ĉar la studemeco de la tieaj samideanoj estas tiom rimarkinda ke multaj el ili iĝis esperantistoj nur pro propra konvinkigo pri la nediskutebla sukceso de Esperanto.

De la komenco de tiu ĉi jaro niaj fervoraj samideanoj Sroj Delclòs, Albajes, Naves kaj Pujadas (oficialaj instruistoj) malfermis kursojn en diversaj lokoj el Vic.

Estas ĉarmege vidi tiujn klasojn tiom animozajn, precipe tiujn de la la tri unuaj per infanoj, ĉe kiuj alestas sepdek lernantetoj cirkaŭe. Tiom mirinde kaj rapide tiuj infanoj lernas la lingvon internacian ke dank' al tiu diligenta knabaro, oni povas certigi ĉe Vic belegan estonton de Esperanto.

Dum la venonta Septembro tiu urbo solenigos la 100^a datrevenon de la naskiĝo de sia glora filo la klera filozofo doktoro Jako Balmes per grava internacia Kongreso de Apologieco, kaj por tion pretigi, oni elektis diversajn komitatojn specialajn, ĉe kiuj estas ankaŭ Komitato de la lingvo Esperanto, ĉar en tiu Kongreso Ĝi estos oficiale akceptata. Tiu Komitato jam sinturnos per speciala alvoko al ĉiuj esperantistoj.

La grupo «Vika Esperantistaro» elektis la 16^{an} Januaro, novan Komitaton por la nuna jaro, jene: *Prezidanto*, S^{ro}. J. Palmarola; *Vic-prezidanto*, S^{ro}. E. Subirà; *Sekretariino*, F^{ino} S. Sanvins; *sekretario*, S^{ro}. F. N. Pujadas; *Kasisto*, S^{ro}. J. Conill; *Voĉdonantoj*, F^{ino} R. Cortinas & S^{ro}. Florencio Surroca.

Tiu ĉi komitato en sia unua kunveno decidis aliĝi la Federacion Esperantistan de Katalunujo. — LA DELEGITO.

REUS

La idealo esperantista enradikiĝis lastatempe en tiu ĉi urbo per la entuziasmiĝo de nur ok amikoj por la lernado de nia dua lingvo kies ili ĉeestis kurson instruitan dum Novembro pasinta en la tiea «Centre de Lectura», de la klera esperantisto S^{ro}. Ludoviko Coll Calvet el «Esperanta Amo» de Manlleu.

Foririnte de la rondo pro siaj okupoj la nomita S^{ro}. Coll, la Reus-anoj tute ne forlasis sian faritan laboron, sed daŭris lernadi kaj instruadi kun fervoro la belan internacian lingvon kaj por plenumi sian devizon kiu estas «ĉiuj esperantistoj» ili ĵus fondis esperantan grupon titolitan «Nova Semo» kiel plej efika rimedo por propagandi nian ideon tra la tuta urbo.

La estraro de «Nova Semo» estas jene: S^{ro}. A. Clivillés, *Prezidanto*; S^{ro}. P. Felip, *Sekretario*; S^{ro}. F. Baró, *Kasisto*. La delegito de la Federacio al kiu la grupo unuanime aliĝis, estas S^{ro}. Henriko Aguadé.

Resume: ke Esperanto multe progresas en Reus kiu, pro tio, fariĝos grava alportilo de la definitiva triumfo de Ĝi.

Ni esperu.

OLOT

La sindonemo de la klera esperantisto P^{ro}. Sebastiano Pubill, vekis la entuziasmon de la anoj de tiu ĉi urbo por la lernado de nia kara lingvo, kion pruvis la multenombra ĉeestantaro de la esperanta kurso instruita de tiu bona kondukanto, kun granda sukceso.

Malfermita la kurso, kreskis la fervoro por la lingvo Esperanto tiom, ke post ne longe la lernantoj ekbabletis esperante, kaj oni tuj fondis je iniciativo de la nomita instruinto, esperantan grupon sub la nomo «Olota Stelo».

De nelonge «Olota Stelo» havas ĉiutagan kurson, kie rimarkiĝas multaj deziroj ellerni la internacian lingvon dank' al senlaca laboro de ĝia instruanto S^{ro}. Jozefo Pi.

Nune, estas je granda nombro tiuj kiuj en Olot, lernadas la belan lingvon, kaj ĉiutage pligrandiĝas la nombro da ĝiaj adeptoj.

Antaŭ ol komenci la diritan kurson, lernis hejme Esperanton S^{roj}. Roca, Capdevila kaj aliaj. Ankaŭ estas rimarkinda, esperantistino monaĥino, kaj aliaj kies nomojn mi nun ne rememoras. Dank' al la du paroladoj pri Esperanto de la eminenta esperantisto S^{ro}. Alfonso Sabadell, kaj al la persisteco, en la esperanta lernejo, de P^{ro}. Pubill, lecionante ĉiutage la lernantojn, kaj fine al la fondo de «Olota Stelo», ĉiuj urbanoj sentas grandan amon al la internacia senmorta *Zamenhof'a lingvo*. — Josefo Pi, *delegito*.

BALAGUER

Antaŭ ne longe, nia ĉi tiea delegito, S^{ro}. M. Espar kaj Boquer, ekmalfermis kurson de Esperanto. La lernantoj estas dek, kaj ili seninterrompe

ĉeestas aŭskulti la instruadon de nia fervora samideano, kiu celas kunhelpita de la federaciano S^{ro}. P. Pallàs esperantistigi baldaŭe la tutan urbon.

Kuraĝo ne manku al vi, kaj vi prosperu en viaj proponoj! La kunhelpo nian vi ne devos peti du fojojn, kaj ni ĝojigos grandege ke viaj klopodoj estu fruktodonaj por la bono de niaj celoj!

Nur la entuziasmoj sukcesas! Estu entuziasmaj kaj sindonaj!



EKSTERLANDA MOVADO

Nun la eksterlanda movado estas tre rimarkinda, ĉar krom la ĉefa fakto kiu okazos dum la venonta Majo en Bruselo, kun okazo de la Mondkongreso de la Internaciaj Asocioj en kiu estos sendube prezentata Esperanton kiel internacia lingvo atingante ĝi grandan sukceson, oni povas rimarkigi, ne nur la disvastigado en ĉiuj landoj — laŭ la naciaj gazetoj — sed ankaŭ la eldonado de verkoj — originalaj aŭ tradukitaj — konkursoj diversaj organizitaj per niaj specialaj gazetoj, ekz, la organizita de «Juna Esperantisto» al kiu oni devas doni solvojn al la sekvantaj demandoj. «Pensi estas arto, revii estas *metio*». «Deziro estas la feliĉo, kio estas *menuo* al festeno». «La artisto mallaciĝas sed *neniam* ripozas», pruvante ĉio tio, ke nia afero antaŭeniras rapide al la efektiveco.



BIBLIOGRAFIO

«Sub tiu ĉi rubriko oni pritraktos la esperantajn verkaĵojn librojn kaj eldonaĵojn kies la Redakcio estos ricevinta du ekzemplerojn.»



OFICIALA PARTO

La Junta Directiva de la «K. E. F.» ha quedat constituïda provisionalment, fins a la celebració de la primera assamblea, la qual tindrà lloc durant els dies 15 i 16 de Maig prop vinent, baix la següent forma:

President, Sr. J. M. Terricabras (Vich). — *Viĉ-president*, Sr. A. Badia (Terrassa). — *Secretari*, Sr. J. Bta. Albiñana (Barcelona). — *Caixer-administrador*, Sr. Joan Piferrer (Sabadell). — *Viĉ-caixer-administrador*, Sr. Pere Ustrell (Sabadell).

Aquesta Junta prega a totes les societats esperantistes que per oblit no se'ls hagi enviat la circular notificant-los la constitució de «K. E. F.», que ho dispensin, puix per manca d'una verdadera llista, molt fàcilment se pot incorrre en lamentables omissions, les quals sempre són de dolor.

L'Administració prega a tots els senyors socis que no han pagat totalment la quota anyal, ho facin a la brevetat possible, per el major ordre de l'Administració, i a la vegada per a donar compliment a l'article quart del reglament, puix s'ha d'entendre que no es la subscripció a la revista lo que's paga, sinó la quota de soci.

Tots els grups esperantistes de Catalunya que no hagin rebut o desitgin rebre més *aligiloj* i fulles de propaganda, contenint aquestes l'allocució i reglament de la «K. E. F.», poden demanar-ne an aquesta Redacció. Se prega que dits impresos siguin profusament repartits entre 'ls membres de cada grup sens distinció.

Pels estatuts per que's regeix la «K. E. F.», queda entès que'ls socis de cada localitat han d'elegir un representant per majoria d'ells. Per lo que fa referencia a Barcelona, la Junta Provisional ha disposat que l'interior de Barcelona, o sigui casc antic i aixamplis, se consideri com una localitat, i tots els pobles agregats (Gràcia, Sant Martí, Poble Nou, etc.) també, havent d'elegir altres tants delegats respectius.

Fins avui, a les llistes de socis de la «K. E. F.», hi figuren esperantistes de les següents poblacions:

Reus, Vilanova i Geltrú, Sabadell, Vich, Barbarà del Vallès, Balaguer, Cambrils, Olot, Terrassa, Manlleu, Barcelona, Tarragona, Premià de Mar, Tivissa i Castellar del Vallès; i adherits, els grups «Vika Esperantistaro», «Esperanta Nesto», «Esperanta Semo», «Lumon» i «Tarragono Esperanta».

Segons l'article setè del reglament, en el proper congrés o assemblea de la «K. E. F.» que tindrà lloch a Sabadell durant els dies 15 i 16 de Maig, s'hauran d'elegir els individus per a formar el Comitè definitiu per a 1910-11, donar compte dels delegats elegits per a cada població respectivament, presentar les finances per a llur aprovació, designar la localitat per a la vinenta assemblea, i, finalment, discutir les proposicions presentades pels senyors socis, les quals poden esser enviades an aquesta Redacció fins al dia 20 del corrent mes, a fi i efecte de poder-les publicar en el prop-vinent número.

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO □ OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
SEN PAGA POR LA GEFEDEKACIANOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
12. strato Gracia. — SABADELL
BARCELONA-HISPANUJO

AVIZO: La Redakcio konservas al si la rajton korekti laŭ bezono la manuskriptojn. Neakceptitajn manuskriptojn oni ne resendas.

ENHAVO: Venu, Venu! — Ĉiuj kunvenu! — Flugadoj. — Kial ne verki pli originale? — Neĝa mateno. — Enketo. — La du Vintroj. — Enlanda Movado. — Oficiala parto.

venu, venu!

La esperantsonoriloj vokas al festo! Ĉu vi aŭdas?

«Venu, venu, geesperantistoj, ĉar estas festo!»

Kiel la kristanoj ni starigu nian naskan feston, la festo de la naskiĝo de nia K. E. F., kaj, ĉar ni fervoraj ĝojas pro la naskiĝo, ni devas ĝin festi.

«Venu, venu, ĉar la sonoriloj vokas al festo!»

En la tuta lando la vokoj aŭdiĝos! Ĉiuj pretiĝu, gefratoj; ĉiuj alestu, geamikoj! Ĉiuj venu honori vian lokon kaj venu ĉiuj varmigi en entuziasmo! Du tagojn vi delasu la hejman amon, kaj venu droni en la amo batiganta la koron por la gefratoj tial, ke la gefratoj kunvenos, ĉar la sonoriloj vokas al festo.

«Venu, venu!»

En ŝajna metamorfozo, la naturo eĉ nin festos pro nia naskiĝo; ĝin vidu: ĝi verde sin vestis, ĝi kovris sin per nia koloro, per nia simbolo — la espero! Vi venu! Nia okaza hejmo estos urbo industria, estos Sabadell'o, kiu, en tiuj tagoj la maŝinaj feraĵoj mutiĝos por ke ĉiuj alestu al la festo de l'espero, kaj por aŭdiĝi nian kanton, ĉar okazos nia festo!

«Venu, venu, samlingvanoj!»

Ĉiuj ĉirkaŭ la tablo por kontentigo de la koro, ni staru! Tie ni kunfratiĝos, ni ĝojos kaj ridos; dum ni ĉirkaŭprenos la geamikojn kaj manpremos la nekonatojn ni bedaŭros pri la nealestantoj. Vi venu! Nia kunveno estos toasto al ĝojo, al amo, al espero, al fido; ĝi estos la festo de la vivo kaj de la poezio; ĝi estos la festo de la idealo, de Esperanto; ĝi estos la festo de la katalunaj geesperantistoj!

«Venu, venu!» — vokas la sonoriloj.

Venu ĉiuj, gefederacianoj; ĉeestu ĉiuj geesperantistoj! En nia festo neniu devas manki, ĉar la ĝojo kaj sukceso des pli grandaj estos, ju pli multenombre vi venos. Venu ĉiuj, neniu manku, ĉar la sonoriloj vokas al festo!

Dum nia kunveno ni fortikiĝos! Per ĝi ni pretiĝos por estontaj bataloj, por baldaŭaj konkeroj. La diligentuloj, la spertuloj, la kleruloj, iniciatos la ceterajn; kaj ĉiuj en festo, Esperanton festos!

«Venu al la festo!»

En la stratoj de la urbo, ni svarmos; ĝi ŝajnos perforta ekokupo de la esperantista gento, ĉie amsemanta, ĉie bonfaranta!...

Kaj en la festofiniĝo, en la dissiĝo, ni kvazaŭ riverdefluiĝo superakirĝos la landon, pretaj por la venko, pretaj por triumfi, kun stimulo por laboro, la koro batanta, la kapo serena; alspirante la feston, sopirante pri la gefratojn, sopirante pri nova festo!

«Venu, venu! Ĉar vokas al festo la sonoriloj», kaj, se vi ne ĉeestas ili morgaŭ ne vokos, morgaŭ mutiĝos, morgaŭ silentos! Morgaŭ estos la paco kaj la kvieto. «Venu, venu!»



ĈIUJ KUNVENU!

NEPRE ni bezonas kunveni, samlandanoj! Estas la kunveno necesa. Mankas al ni reciprokan koniĝadon, por esprimi unu al aliaj dezirojn, sentojn, fervorojn, entuziasmojn, entreprenojn, agemecon! La fervoro, espero kaj fido de ni aparte sentita bezonas kuniĝon por ke ili flamiĝante ardigu ĉiujn korojn!

La K. E. F., granda rondo de gesamideanoj, devas pridiskuti ĉiujn aferojn rilatantajn al la movado en nia lando. Kaj estas ĉies devo partopreni, pridiskuti kaj kunhelpi la organizadon kaj triumfon de tia movado. Ni devas rimarki ke, la entreprenoj ne fariĝas grandaj per la sola forto de unu homo, sed de multaj; ke la trium-

fon atingos ne unika sola homo, kvankam li estu heroo, sed multaj herooj, multaj homoj, multaj entreprenantuloj, ĉar nia movado ne estas aro da militistoj sed aro da batalantoj por ideo. Ni devas atenti ke nia movado ju pli granda estos, des pli multaj homoj ĝin deziras kaj klopodos grandigi, ĉar ĝi ne konsistas el unu homo sola, sed el ĉiuj samideanoj, tial ke la K. E. F. ne estas unu samideano, sed arego da samideanoj. Rimarku ke la triumfo de nia ideo ĉe ni, ne nur konsistas el la alvarbado de novaj kaj multaj samlandanoj, sed ankaŭ de nia bona direktado kaj organizado. Ni do, partoprenu ĉiuj senescepto en la elekto de nia konsilantaro; ni do, ĉeestu—ĉiuj sen escepto—en la 1.^a Kongreso de Katalunaj geesperantistoj. Ni elektu por nia Komitato klerajn kaj agememajn homojn, malgraŭ ili ne estu famaj; ni elektu kiel direktantojn niajn, kuraĝajn batalantojn.

Ni discipline plenumu nian devon, kaj ni agu kiel popolamasoj kiam aŭdas la voĉon de la estro: obei. Ni aŭskultu la voĉon de nia estro—la Idealo—kaj ni obeu ankaŭ. Ni ne atentu la bruajn kriojn de la ne amikoj: ni ne ŝanceliĝu; ni memoru pri nia devo kiel esperantistoj kaj ĝi nin rajte plenumu. For de ni la duboj!

De la kvar flankoj en nia lando vi venu partopreni en la 1.^a Kongreso de Katalunaj geesperantistoj. La kvinpinta verda stelo montras la aldirekton al ni: ĝin sekvu; ni marŝu post ĝi: ĉar resti hejme kaj forgesi la devon plenumontan ne decas la kuraĝa batalanto.

La koroj supren, gesamideanoj! Ni imitu la ekzemplon de la Naturo en la estanta tempo: ni floru: ni ekmontru promeson de plejriĉa fruktado. Kiel la tero, kiel la arboj, kiel ĉiuj plantaĵoj, ni fruktu: ĉar ni ankaŭ en ni havas grandan forton: (sed estas nia devo elmontri, kaj elpruvi tion; kial? Ĉiuj kunvenante en Sabadell, ĉiuj alestante al la 1.^a Kongreso de Katalunaj geesperantistoj.



FLUGADOJ

II

OFTE, eliĝante de mi mem, mia revo ĉie disvolvas kiel malkvieta spiritulo serĉante... mi ne scias kion; mi serĉas: eble *la homon*; ankaŭ eble *la feliĉon*; kaj mirindaĵo! eble iafaje mi min serĉas en la spaco, inter la estelaro...

Hodiaŭ mi forflugas *suben* serĉante entuziasmon, fortegon, virecon, junan sangon, abnegacion, akran sonon de bataloj.

Hodiaŭ forflugante tra la kataluna lando, mi ankora ŝripetas la toaston de la unua flugado: «Ni toastu amon, gekunfederanoj, per glaso da feliĉo, la esperantan sukceson... tra la sankta amikeco... ĝis mirinda disciplino»...

Mastro de la tempo, kvazaŭ dia fantomo, mi ordonas la anamasojn, kiuj rondirantaj, kiel fervorega Walkiraro, la cignon kiun rajdas Zamenhofo—nia Lohengrin'o forta batalanto pro Homareco. Li elvenas de Monsalvat'o, la *dolorplena vivo*, sed kie estas Templo de Sankta Graal'o, la *amigo*, donante nevenkeblan virecon. De Parsifal'o, mastro de Monsalvat'o, bona filo, kaj prefera filo de amo, Lohengrin'o rajdas tra la tempoj fratigante la homojn ĉiujn, triumfante malgraŭ perfidatado de Frederiko... Mi lin vidas, brilantan, helegan, kiel disverŝas benojn al la grandeguletoj malanoj.

De liaj okuloj eliras rigardojn de ruĝa fajro, kontraŭ la kora kaj pensa frosto... Per siaj manoj li dorlotas kaj kombas la frizitan dikharon de la Homaro, dum la kolombino de la Sankta Graal'o kantas: «frateco! amo!»

Verda stelnokto resendas en lian vizaĝon esperantan ĉielarkon... altege, la blua aero rebrilas la imagon de la *homo*, kiun mi serĉas en la hodiaŭa flugado.

F. SURROCA

Transcendemuloj...? 3. 9.



KIAL NE VERKI PLI ORIGINALE?

La esperanta nacio de antaŭ ne multaj jaroj mirinde vastigas siajn limojn kaj kun ili eksterigas siajn animajn energiojn, montritaj ĉu en sennombro de specialistaj societoj, ĉu en sia potenco gazetaro, ĉu fine en sia diversa, multhava kaj alloga Literaturo.

Interesaj sendube estas por la evolucio kaj disvastigo de nia benita lingvo la unua kaj dua de tiuj elementoj; sed multe pli interesa, pli radikiga, pli konvinka, pli memstara kaj daŭra estas la lasta el la cititaj faktoroj.

Efektive: rilate la direktorojn kaj organizantojn de rimedoj por

intensiva propagando, tre penetritan elmontras enhavi la ideon de esperantismo: tamen, la homa naturo estas malforta kaj post ripetitaj baroj ofte cedas la individuo, kaj eĉ pro unu persono salas iam anaro respektinda. Oni ne povas same paroli pri literaturaj verkoj: do, unue, la publikigoj estas ordinare destinataj longedaŭri: iliaj legantoj, kiel tiuj de kiu ajn naciero, posedas laŭdedukte la lingvon: la legado, dum ke ĝi estu iom agrabla aŭ instrua, postlasas en la spirito profundajn impresojn, persistajn rememorojn, superajn sentojn; kaj la verko pasas de unu al alia, kiel taŭga ilo al unuj por perfektigi, kiel ligilo de kunpenetro kaj solidareco al aliaj, ankaŭ kiel ĉiama propaganda instrumento al la indiferentuloj, inter kiuj ĝi realigas grandepovan kaj progreseman selekton por niaj jam dikaj vicoj.

La esperanta Literaturo entreprenis eksterordinaran flugon tra ĉiuj literaturaj klasoj kaj konataj regionoj. La stilistoj esperantaj okupas honoran seĝejon enŭitan de multe de naciaj verkistoj. Ilia famo etendiĝis tra la tuta homaro: ilia nomo estas riverencita de miloj kaj miloj de admirantoj: iliaj skribaĵoj estas legataj kun duobla, eĉ triobla ĝuo ol la mempatrujaj. Kiu ne sian ĉapon respektete demetos antaŭ la distingindaj nomoj de: la Majstro, Kabe, Grabowski, Vallienne, Lojko, Kofman, Boirac, Cart, Noel, Lengyel, Bourlet, Chavet, Dufentrel, Deshays, Meyer, Parisot, Giambene, Inglada, Loira, Pujulà, Sabadell kaj cent aliaj de sama aŭ plia merito? Dank' al ĉi tiuj grandmeritaj verkistoj ni povas ĉiuhore ĝui la literaturajn perlojn, en ĉiuj epokoj de la historio de la homa genio ĉien trapasinta, dissemiatajn: dank' al ili, ĉiu literaturo akiras novan senmortecon, ĉar estas tradukita en internacia idiomo kaj trakuras konsekvence la kvar mondajn partojn: dank' al ili, ĉiu malgranda patrujo estas nobligita kaj ĝentile akceptata de la ceteraj en la grandan socian kampon, reciproke penante dorloti unu la alian, kunhelpante treege al la intersia respekto, kiu baldaŭ fariĝas simpatio kaj finas iĝante feliĉa ligilo de amo inter ĉiuj popoloj de la tero; ligilo kiu ilin pli forte kaj fruktodone kunligas ol ĉiuj feraj katenoj kune kun ĉiuspecaj militiloj de la homo en sia frenezo elpensitaj.

Malgraŭ nia jam riĉa literaturo oni de tre longe en ĝi rimarkis grandan malplenon, des pli malfacile plenegeblan ju pli malfrue oni ĝin ekelizos. Mi rilatiĝas al nia preskaŭ nula *originala* literaturo. Ĉu mankas en nia kampo kreantaj genioj? Ĉu ne pruvis multaj el niaj verkistoj per broŝuroj kaj gazetoj posedi brulantan inspiron por produkti majstrajn verkojn?

Ĉu eble ili suspektas ke siaj produktaĵoj ne havos favoran akcepton kian povas atingi la tradukoj de la famaj genioj? Pri tiu ĉi punkto oni devas rimarkigi: ke la ĉefaj verkoj estas legeblaj en ĉiu preskaŭ idiomo: ke estas rigardataj kun prefera simpatio de la legantaro kaj esperantista gazetaro, la verkoj originale esperantaj: ke, post nelonge, oni postulos ĉe niaj ekzamenoj kaj esperantaj konkursoj profundan scion pri ĉi tiuj produktaĵoj, pli ol pri kiu ajn; kaj laste, ke iliaj nomoj enkapigos niajn katalogojn kaj brilos kiel unuagradaj steloj en la ĉielo de la esperanta literaturo.

Pli ankoraŭ: kio plej klare elmontras la *apogeon* kaj riĉecon de iu lingvo estas precize ĝia originala literaturo: ĉi tiu reflektas kvaazaŭ sur fidela spegulo la karakteron, la energiojn de iu tuta popolo: ĉi tiu prezentas antaŭ la okuloj eksterlandaj la vivantan historion de iu raso: ĉi tiu, kiu, ludante Tirtean rolon, bruligas la koron kaj imagon de la amasoj por daŭrigi glorajn almlitojn: ĉi tiu, kiu kantas niajn heroojn, festas agojn memorindajn, kaj senmortigas nian lingvon kaj nian popolon. Ĉu do ni restos indiferentaj antaŭ tiel rimarkindaj rezultatoj kaj dorlotemaj kvalitoj kiaj ornamas la originalan literaturon? Ĉu ne uzos siajn mirindajn talentojn la gravaj esperantaj literaturistoj por nin riĉigi per siaj geniaj kreaĵoj, ĉe kaj for de nia gazetaro, enpuŝante tre alten nian benatan lingvon? Se tiel estos, realiĝos en la esperanta raso la diro milfoje ĉe nia lando kopiita: «la popolo kiu sian lingvon honoras, sin mem-honoras»; kaj Esperantujo kun la dankema homaro kronos iliajn fruntojn per laŭro de la senmorteco.

s. PUBILL, sk.



NEĜA MATENO

Edzinet' la mia
alproksimiĝu min,
mia ama koro
varme vokas vin.
Alproksimiĝu varme,
ekstere estas la neĝ';
ni tuj vekiĝu ĉarme,
al am' ni kantu preĝ'.
En mia varma hejmo

ne sangos la veter',
en ĝi per nia amo
ĉeestados la somer'.
Aminda edzino mia,
de mia anim' la lum',
de miaj revoj celo,
de mia kor' parfum'.
Se min de l' ĉielo falas
neĝo ŝanceliĝanta,

ni gloru nian amon
per kanto varmiganta.
Falu, neĝeroj, falu,
ĉion malvarmigantaj,
sed ne niajn korojn
pro la varmeg' batantaj.
Se ekstere neĝo falas,
kaj ĉio blankigata,
himno al Sankta Amo
interne estas kantata.

• • • • •
Post, dum la Somero,

la floroj elirantaj,
ĝojigos niajn korojn
per flaroj odorantaj.
Patrin' Naturo zorgos
kreskantan floron sian;
kaj ni kiel Naturo,
amzorgos la flor' nian.
Alloge ni rigardos
kiel la flor' beligos
kaj patra nia amo
jam tiam plej satiĝos.

KROM

Transcendemulo? — 4-9

Vich 19^a Marto 1910.



ENKESTO

SE kion mi nun Esperante diros, ĝin dirus alilingve, tre kontraŭesperantiste mi agus; kvankam ĉi-tiu afero, parte, estas tute negrava, kaj ne nur enesperanta sed ankaŭ ennaturlingva: ĝi estas speciala gramatikaĵon ni povas ĝin elprezenti per la jenaj vortoj: «diferenco (gramatika) inter la artikolo kaj la adjektivo».

Kio estas artikolo? Kio estas adjektivo? La definojn pri ĉi-tiuj du gramatikpartoj mi ne memoras esti iam vidinta en Esperanto. Tial mi priparolos, laŭ la ĝeneralaj definoj ennaturlingvaj. Tiel oni povas konkludi la definojn pri artikolo, per, ĝi estas gramatikparto kiu *montras* la substantivon; kaj tiujn pri la adjektivo, per, ĝi estas gramatikparto kiu *kvalitas* la substantivon.

Nu! Ĉu la artikolo ne kvalitas la substantivon? Ĉu la adjektivo ne montras ĝin? Ekzemple: *la* homo kiu estas tie; *tiu* homo kiu estas tie. Ĉu estas ia gramatika diferenco inter *tiu* (adjektivo) kaj *la* (artikolo)?

Nun neniu diru — ĝi estus infana — ke se oni komparas alian adjektivon, ekzemple *tia* mem, oni vidas la diferencon; ĉar tiel oni konkludos ke *tiu* ne estas adjektivo sed artikolo.

Alie, en Esperanto okazas — kaj por tio ĉi posta mi diris la ĉion antaŭan — ke la artikolo ne estas gramatike same konsiderata kiel la adjektivo (postetempe mi priparolos pri la adjektivo *ies*): ĉi tiu estas deklinaciata kaze kaj nombre; tiu ne. Tamen katalune

ekzemple, kiel kastile, france, itale, k. c., ambaŭ estas konsiderataj gramatike same ambaŭ estas deklinaciaj nombre kaj sekse; angle, cetere, estas medeklinaciaj, sed ambaŭ same; k. t. p..

DELFI DALMAU.

Ĉu iu estos tiom dankinda ke honvolos ion plu diri pri ĉi tiu afero?

Ĉi tia enkesto celas nenion krom instrui.

D. D.

Aprilon de la 1910.^a

En Barcelono — Carrer Carme, 41.

✱ ✱ ✱

LA DU VINTROJ

Sekaj folioj jam falas
de l'arboj, alvenas vintro,
kaj mi jam sentas malvarmon
interne en la koro mia.
La grizaj venontaj tagoj
revenas kune kun pluvoj.
Alproksimiĝas frostadoj,
neĝoj, glacioj kaj nuboj.
Kiel falas la folioj
velkitaj de la malvarmo,
la mia koro velkiĝas,
la miaj esperoj falas.
Kaj, ankau, kiel la ventoj
dispecetigas foliojn,
disigas la malfeliĉoj
de mia kor' l'iluziojn.

Antaŭe, kiam alvenis
nigra vintro, la malvarmon
mi mokis; kaj sole pensis
ke poste, Printempo gaja
revenos kun sekvantaro
de gajeco, kaj parfumoj
de floroj, ludoj, movadoj,
aero, vivo kaj lumo.
Kiom mi ĝojis pensante
pri la noktoj stelplenaj
varmetaj kaj parfumataj
de la belega Printempo!
Sed nun, rememorigante
malgaje, ke ĵus alvenas
de la vintro la regadon,
malvarm' interne, mi sentas.

ANIZERO

★ ★ ★

ENLANDA MOVADO

BARCELONA

Grava Fako. — Pere de ĉi tiea esperantisto, kaj en la Kongreso de Boulogne — ŝajnas al mi ke ĝi estas — holanda blindulino ekĉiis pri blindulo de nia urbo, kaj ĉi tiu pri ŝi. Ambaŭ interkonatiĝis korespondade ĝis la V^a Kongreso, kiam ili ĉi tion faris parole.

Konsekvenco de ĉi tio, ili geedziĝis la 9^{an} de la ĵus pasinta Aprilo.

Ŝi estas la klera S^{no} de Chalmot, kaj li nia kara sampatrujano S^{ro}. Zapter. Kiel vi vidas unu estas holandino kaj la alia kataluno, kiu tamen povas dubi ke ili reciproke komprenis unu la alian, kaj tiel bone skribe unue, kiel parole poste?

Okaze de tiu fakto la Barcelona Esperantistaro, festis la novaj geedzoj per festeno kiu okazis la 10^{an} de Aprilo.

Cent dek geesperantistoj el ĉiuj ĉi tieaj grupoj partoprenis en la festeno kiu estis vere memorinda. La entuziasmo reganta en tiu festo, krom la honoro al la dirita fakto, elmontris, unu fojon plu, ke Esperanto definitive kaj ĉiasence sukcesis en Barcelono.

La prezida tablo estis bele ornamita, kaj sur ĝi, perfloure skribita «Vivu Esperanto». Meze sidis la gefestatoj, kaj je ilia dekstra flanko, S^{roj}. A. Sabadell, J. Rosals, kaj D. Dalmau, je la maldekstra S^{roj}. J. Bremón, M. Cases, kaj Balcels.

Post kelkaj minutoj dum kiu oni gaje manĝis, trinkis, kaj interbabiladis, komencis la toastoj. Nome de la festorganizintoj, S^{ro}. Ribera dankis la ĉeestantaro pro ilia partopreno, kaj nomis tiujn kiuj devis parolade toasti, samorde kiel mi iliajn nomojn jenskribas: S^{roj}. Lafuente, Casajona, Anglada, Borts, Vermúdez, González, kaj la prezidantaro.

S^{ro}. D. Dalmáu kiu diris ke kiam oni scias pri eksterordinare grandaĵo kia Esperanto, neniam oni estas plene konvinkitaj pri ĝia efikeco, ĝis kiam oni ĝin vidas kiel, ekzemple, en ĉi tiu okazo. Tial li daŭrigis kordezirante ĉiaman feliĉecon al ĵus geedziĝintoj.

S^{ro}. Balcels, nome de la societo «Paco kaj Amo» post toasti, kiel ĉiuj, bone konkludis ke nia lingvo estas fonto de paco kaj amo.

S^{ro}. Rosals, kiu diris ke tiu festo sentigas al li ĝojecon kaj malĝojecon: ĝojecon, li diris, ĉar ĝi estas honoro al tiu honorinda fakto; kaj malĝojeco. ĉar ĝi estas la adiaŭo al tiom simpatiaj gesamideanoj.

S^{ro}. Cases, nome de «Espero Kataluna» kiu legis bonhumoran toaston, kiu aliparte estis kortuŝa.

D^{ro}. Bremón, kiu faris elokventan paroladon, aplikis belan rakonton al nia okazo, dirante ke estis sultano kiu malgraŭ sia grandega riĉeco estis ĉiam malfeliĉa ĉar li estis blinda, sed tamen, de iam kiam li povis havi vidon, kvankam ĝi kostis al li sian tutan materialan riĉecon li estus feliĉa; pli bone okazas hodiaŭ al niaj blinduloj — li diris — danko al la grandega verko de D^{ro}. Zamenhof.

S^{ro}. Sabadell, kiu per elokventa parolado sciigis la devenon de la fakto kiun ni honoris, kaj priparolis ĝian gravecon.

Fine parolis la geedzoj kiuj vere emocipline dankis ĉiujn, finante ĉi tiu simpatia festo kun la himno de nia nova sento, kiun D^{ro}. Bremón bonvolis ludi fortepiane, kaj ĉiuj ĝin kantis.

Ankaŭ okazos je la finigo, baletto kiu ĝojigis la gejunuloj, kiuj multenombre ĉeestis la festenon.

La 18^{an} de Marto pasinta nia klera samideano D^{ro}. Bremón, faris paroladon, pri la temo «Solvo de la poblema de lingvo internacia» de la grava societo «Centre Autonomista de Dependents del Comerç i la Industria».

La konvinkegaj argumentoj pri tiu temo, jam konataj de preskaŭ ĉiu esperantisto, kaj la fameco de D^{ro}. Bremón, senkulpigas nin, pro ne raportii lian paroladon, por pruvi la Esperantistigecon de ĝi.

La ideo pri la Barcelona Esperantista Societo kiun mi priskribis en la antaŭa numero, rapide progresas entuziasme de ĉiuj tieaj esperantistoj.

Esperantistaj vendredoj. — La laborema esperantista grupo de «Ateneu Enciclopedic Popular» organizis kiel jam anoncis la ĉi tieaj ĵurnaloj, Esperantistajn vendredojn ĉe si.

Tiaj Esperantistaj vendredoj, konsistas el esperantaj pridiskutadoj kaj paroladoj: nun mi ne devas forgesi diri ke ĉi ties organizintoj gratulinde sukcesis, ĉar sia organizitaĵo estas multe ĉeestigata, malgraŭ la diskutadoj ne tiom sinpartoprenigataj.

La tagon 25^{an} de Februaro, nia honorinda pioniro S^{ro}. Pujulà inaŭguris tiajn vendredojn per esperanta elokventa parolado, pri *Ideologio de Sinibaldo de Mas*.

Post klarigoj pri la personeco de S^{ro}. de Mas, S^{ro}. Pujulà elmontris la fundamentan teorion, kaj ortografiajn — se oni povas diri! — signojn kun aliaj fonetikaj valoroj, de la Ideologio de nia samlandano,

Ni vidis kiel la fundamenta teorio, tre similas nian esperantan, kaj sekve alproksimiĝas al la vero; kaj ni konstatis kiom erare, de Mas post tiu logika kaj klera vido de la solvo falis en la komplikecon de hieroglifa skribado. Ankoraŭ ĉi tie, Sinibaldo de Mas, restas la logika klarividanta elpensinto. Mi povis tie rimarki la uzadon de afiksoj tute kiel en nia Zamenhofa lingvo, la simpligon de la konjugacio, kaj unuvorte, la simplecon relativan de la tuta sistemo. Sed la veran eraron li faris atribuant al ĉia signo arbitran fonetikan valoron, kiuj parolebligas la ideografion sed en maniero sovaĝa.

Cetere S^{ro}. Pujulà, celis pruvi, ke tradicio pri internacia lingvo ne mankas ĉe ni kaj ke krom Aribau, aliaj eminentuloj sin okupis pri la solvo de tia demando, ne nur teorie, sed reale, kaj sekve ni devas konsideri kiel devon la disvastigon de Esperanto, sola solvo de la problemo.

La 4^{an} de Marto, dua esperantista vendredo, okazis esperanta interdis-

kutado. Paroligi esperante, estas la precipa celo de la organizintoj de ĉi tiaj kunvenoj.

La temo pridiskutata estis «La Esperantismo en Barcelono», partopreninte en la diskutado S^{ino}. G. Rebours de Pujulà, kaj S^{roj}. Pujulà, Bremón, González, kaj Bacardit, memorante la historion de nia movado en Barcelono.

La 11^{an} de Marto, okazis parolado de nia klera samideano, D^{ro}. Bremón. kies temo estis ankaŭ «La Esperantismo en la Kataluna ĉefurbo». Li elmontris la vojon ĝis nun traŭrita de la Barcelona esperantistaro, kaj elokvente li elprezentis al ĉirkau kvar cent ĉeestantoj nian kvietecon kaj semagadon por Esperanto, konsekvenco de tro individualista karaktero kaj manko da organizacia unuiĝo, kies solvo — li diris — estas nia «Kataluna Esperantista Federacio».

La 18^{an} de Marto okazis diskutado, kies temo estis «Propono de temoj».

Tre interesa estis tia diskutado. Unue oni konkludis ke estas konveninda ne miksi politikon kaj religion en kunvenoj, sed baldaŭ oni vidis la malfacilecon de tio.

Tamen iu kies nomon mi bedaŭras ne scii, kredis kiel solvon diskuti temon pri arto aŭ scienco; tiam S^{ro}. Pujulà petis la parolon por rimarkigi ke politiko estas scienco, la scienco pri la regado; do — aldonis la alia — temo pri arto; kaj S^{ino} G. Rebours de Pujulà proponis diskuti pri «Salomé» kiu estas ja pri arta temo kaj tamen oni tuj enirus en la moralo, religio kaj politiko. En tiu afero partoprenis krom la nomitaj, S^{roj}. Bacardit, Balcells, González, Vermúdez kaj aliaj kies nomojn bedaŭrinde mi ne rememoras.

La 25^{an} el la sama monato, nia klera samideanino, la bela edzino de S^{ro}. Pujulà, faris paroladon pri la francaj lernejoj, sed pro manko da spaco, mi ne povas ĝin raporti nun.

La prezidanto de la grupo de la «Ateneu Enciclopedic Popular», kiu organizis tiajn kunvenojn, kaj ankaŭ prezidante ĉiujn, S^{ro}. Antoni Barrot, bonvolis fari de nun, la taskon raporti la esperantistajn vendredojn, pro kio mi kore lin dankas, ĉar mi ne havas la necesan tempon por ĝin fari bone, kaj krom ĉi tio, li faros ĉi tiu raporton, pli bone ol mi — D. D.

TARRAGONA

Fine la entuziasmo per nia internacia lingvo vekigis en nia urbo, kaj nia vekigo ŝajnas elmontri de la efiko de K. E. F. kies organo estis ĝoje akceptita kaj reentuziasmigus nian samurbanojn.

La ĉi tieaj oficialaj societoj kaj nia Urba Konsilantaro kaj Deputitaro sin montras tute favora al nia celo, kaj ni klopodas por ke antaŭ ne longe sia simpatio kaj favora akcepto por nia kaŭzo fariĝu reala.

Antaŭ unu monato la urbogardistoj komencis lerni Esperanton, kaj ĉiutage ili sentas pli da entuziasmo por Ĝi. Tio estas bona akiro, ĉar iamaniere la alilandaj esperantistoj povos antaŭ ne multe viziti nian historian urbon.

Okaze de la unua kongreso de katolikaj esperantistoj, la ĉi tiea Ĉefepiskopo sendis telegramon al la gekongresistoj.

La «Societat d'Atracció de Forasters» intencas publikigi gvidlibron de nia urbo, en kastila kaj esperanta lingvoj.

Multaj el niaj samideanoj ĉeestos en la 1.^a Kongreso de Katalunaj esperantistoj. — LA DELEGITO.

TERRASSA

Tiu ĉi grupo malfermis alian kurson por fraŭlinoj kiu estas farata de la fervora anino Gertrudis Cantarell kun laŭdinda lerteco.

Daŭrigas entuziasme en la montrita grupo la profitajn konferencojn kiujn mi raportis en la pasinta numero pri «Gramatikaj ĝeneralajoj», donataj de nia sperta gramatikisto S^{ro}. Quintín López helpata de la eminenta lingvisto D^r. Angel Sallent kaj la profesoro S^r. Johano Graells.

«Lumon» malfermis de antaŭ ne longe konton je sia kredo en la «Ĉekbanko Esperantista».

«Lumon» organizas esperantistan grupeton por infanoj kies inaŭguraĵa festo okazos la 1^{an} de Majo. Mi raportos detale tiun-ĉi rimarkindan feston en la venonta numero.

Impresigis la koron de la ĉi tiea esperantistaro la decidon okazigi la Unuan Katalunan Esperantistan Kongreson en la najbara urbo Sabadell. Terrassaanoj ni iru kune al la Kunveno! — LA DELEGITO.

SANTA PERPETUA DE LA MOGUDA

Eĉ en la plej malgrandaj vilaĝoj, nia bela lingvo havas entuziasmaj propagandistoj.

En tiu vilaĝeto oni fondis esperantan societon kiu sub la nomo «La Kamparo» batalos por nia afero.

Ni ricevis de ĝi koran saluton, por kiu ni restas tute dankemaj.

Nune estas *Prezidanto*, S^{ro}. Johano Soley, kaj *Sekretario*, S^{ro}. Mariano Angulo.

Antaŭen Ĉiam, samideanoj! Ni vin atendas tutkore ĉe ni.

IGUALADA

La ĉi tiea grupo «Igualada Esperantisto» ne plu loĝas en la Rambla Nova, n.^o 30. Ĝi havas nune sia sidejo ĉe «Ateneu Igualadí».

La komitato de tia grupo, estas la jena:

Prezidanto, S^{ro}. Justino Vilaró; *Sekretario*, S^{ro}. Jakobo Gomis; *Kasisto*, S^{ro}. Jozefo Rafegas; *Bibliotekisto*, S^{ro}. Johano Caballé; *Voĉdonantoj*, S^{roj}. J. Borràs, R. Gabarró, Ludoviko Ferrer; F^{inoj}. Katalino Vich kaj A. Cuadras.

Tiu ĉi grupo kune kun la grupo «Katolika Idealo», nomis delegiton de la K. E. F. al nia samideano Jakobo Gomis. Ni esperas ke la entuziasmo

kaj fervoro de nia delegito kaj la entrepreno de la du grupoj atingos plenan triumfon de Esperanto en tiu ĉi urbo kie antaŭ du jaroj Ĝi estis tiel kuraĝe propagandita. — LA DELEGITO.

VIC

La societo «Vika Esperantistaro» solenigis la 13.^{an} de Marto la inaguracian de sia nova socia loko, per literatura festo, kiu rezultis tre animoza, ĉeestante ankau en ĝi tre simpatiaj sinjorinoj kaj ĉarmaj fraŭlinoj.

Post la malferma parolado de S^{ro}. Albiñana rimarkigante la nepran bezonon de l'Esperanto ĉe l' Homaro, aŭdigis sian aĝrablegan paroladon, S^{mo}. Sanvicens studante la disolvecon de Esperanto tra la civilizita mondo, kaj vere altiris la atenton de l' aŭdantoj.

S^{ro}. Pujadas rimarkigis per sia parolado «Vortoj» la bezonon altiri la laboristojn el la maldecaj lokoj, kiujn ili tiel ofte ĉeestas, ilin alportante al instruaj lokoj kiel esperantistaj societo k. c.

S^{ro}. Casals legis sian belan poemon «Miaj amoj» vere senta verko, de ĉiuj tre entuziasme aplaŭdita. Oni legis ankaŭ ĉarman poezion de F^{ino} Pratdesaba.

S^{ro}. Terricabras, rakontis belan historieton «La patra amo», kaj la lerta astronomiemulo S^{ro}. Pratdesaba, sciigis al ni sian lastan sonĝon «La Astronomio kaj Esperanto» rajdante sur vosto de kometo, kiu rezultis tre agrabla.

Fine ĉiuj ĉeestantoj starante kantis nian himnon «La Espero». — LA DELEGITO.

OLOT

Antaŭ nelonge «Olota Stelo» ricevis programon kaj regularon de la Gerona kongreseto, kiu okazos en la tagoj 14.^a kaj 15.^a de l'Aŭgusta monato projektita de la Gerona Esperantistaro. Ne estos necese diri ke ni ĝojege akceptis tiun projekton vidante nur en ĝi bonan propagandilon por nia provinco, ĉar ni supozas, ke ju pli oni laboras ia maniere aŭ alia, neniam forgesante la vorton «unuigo» despli kreskas nia bela afero. Sed bedaŭrinde mi suferis disreviĝon, vidante ke la tieaj organizintoj ne estas aliĝitaj al la nia amegata K. E. F. almenaŭ ĝis nun.

Bona esperantisto, laŭ mia opinio, devas aparteni almenaŭ al unu el la grupoj el la urbo kie loĝas, kiel bona urbano kaj esperantisto, sed ankaŭ estas tute necesege, esti aliĝitaj al la K. E. F. kiel bonaj katalunanoj.

La anoj de «Olota Stelo» havas la intencon trairi ĉiujn apudajn urbojn, por ilin esperantigi iom post iom; pro tio baldaŭ oni komencos la ekskursojn. — LA DELEGITO.

REUS

La esperanta movado ĝis nun estas fruktoplana en nia bela urbo, ĉar ni ĉiutage konigas al Reus'aj urbanoj, nian belan idealon, por kiu ili montras gravan fervoron.

Ĉiuj la lokaj gazetoj, estas aliĝintaj al ni, sed unu el ili kiu sin priokupas pli ol la aliaj por nia afero estas «Foment» ĉar ĝi publikis diversajn artikolojn pri nia bela lingvo.

La esperanta societo «Nova Semo» decidis sin aliĝi al la K. E. F. kaj ĝi ankaŭ havas la proponon organizi dum la venonta somero kelkajn ekskursojn al la najbaraj vilaĝoj, por propagandadi la Zamenhofan lingvon. — LA DELEGITO.

SABADELL

La ĉi-tia grupo «Esperanta Semo» dum la pasinta monato, translokiis sian sidejon en la domon kiun de longe loĝas la kultura societo «Ateneo» — Placo de Pi y Margall, 10 kaj 11 — kies dua etaĝo estas nun parte okupata de tiu. La centreco de la loko rilate al la urba situacio kaj ĝiaj bonaj kondiĉoj, same pro la vasteco de la domo kiel pro la majesteco de la ties facado, aŭguras al la malnova esperantista societo estonton plej belan tial, ke la geurbanaro estos pli altirata de ĝi por ĉeesti kaj viziti ĝiajn kursojn kaj festaktojn venontajn, kaj ĉiuj samideanoj enurbaj kaj eksterurbaj povos trovi en la grupejo la komforton necesan kiu kun la gastamo posedata de la propra gaja geanaro, faros agrabla kaj amuza la tempon de ilia ĉeestado.

Ankaŭ la vasta societo «Aplec» Esperanta Grupo daŭras en la sukceso. Dum la lasta monato, ĝi malfermis esperantan kurson por virinoj kies klasoj sin sekvas plej esperige, pro kio meritas ĉies gratulojn sen distingo instruanto kaj lernantinoj.

En la lasta Aprila remajno eknalfermis kurson por katolikoj la «Esperanta Fako» de la «Academia Católica».

La ekscio pri okazo en nia urbo de la unua kongreso kiun alvokis la K. E. F., vekis entuziasmojn en ĉiu esperantista koro. La sabadell'anoj atendas ĝoje tiun okazon por esprimi sian afekcion al ĉiuj enlandaj gebatalantoj.



OFICIALA PARTO

Conforme anunciavem en el primer número de KATALUNO ESPERANTISTO, i tal com prevenen els estatuts, el Primer Congrès d'Esperantistes Catalans ha de celebrar-se els dies 15 i 16 de Maig, havent decidit el Consell Directiu (provisional) que dit Congrès tingui lloc a Sabadell.

El referit Congrès s'efectuarà segons l'adjunt ordre:

Dia 15 de Maig (diumenge):

Al matí. — Recepció a Cà la Ciutat, al «Gremi de Fabricants», a l'«Escola d'Arts i Oficis», i al «Centre de Dependents».

A les tres de la tarda. — Primera sessió (oficial), d'acord amb la següent ordre del dia:

Memoria raport dels treballs de constitució de la «K. E. F.» pel senyor Joan B. Albiñana, *secretari*.

Presentació i explicació de les finances, pel Sr. Joan Piferrer, *caixer-administrador*.

Donar compte dels delegats elegits en cada població.

Elecció de càrrecs del Comitè Directiu que ha de regir la «K. E. F.» en el curs de 1910 a 1911.

Designació de la localitat ont haurà de celebrar-se'l vinent Congrés.

A dos quarts de deu de la nit. — Vetllada organitzada pels esperantistes sabadellencs en honor dels senyors Congressistes, la qual tindrà lloc en els salons de l'«Ateneu», prenent-hi part distingits esperantistes.

Dia 16 de Maig (dilluns):

A les deu del matí.—Segona sessió. Discussió dels temes presentats, baix aquest ordre:

Tema primer. — «¿Es convenient, per al millor desenrotllament de la «K. E. F.», la designació de més d'un delegat en cada localitat?» — *Ponent*: Josep Palmerola, de Vic.

Tema segon. — «Per als *samideanoj* que viuen lluny, isolats dels centres ont hi han agrupaments, es necessari que'l Congrés acordi l'institució d'un Comitè per a que solventi i aclareixi ls dubtes i incomprensions que s'ocorren a dits companys, a fi de que puguin lograr posseir l'Esperanto al menys amb relativa perfecció». — *Ponent*: J. Ximinis Guri, de L'Escala (Girona).

Tema tercer. — «Necessitat de fer propaganda constant i assídua en els periodics i diaris locals, principalment en els de Barcelona, per ser els de més circulació». — *Ponent*: Antoni Martí, de Sabadell.

Tema quart. — «Que'l Congrés acordi la creació de *Maristan Komision*, que residirà a Barcelona, l'objecte de la qual serà la propaganda de l'Esperanto, per les claus *Ĉefeĉ*, entre ls marins dels vaixells estrangers que visitin el port de Barcelona». — *Ponent*: F. Pujulà i Vallés, de Barcelona.

Tema quint. — «Amb el proposit d'estimular als esperantistes, seria útil organitzar concursos literaris de treballs en Esperanto (originals o traduïts), concedint recompenses als que sortissin premiats. Projecte i manera de portar-ho a terme». — *Ponent*: Domenec Serdà, de Sabadell.

Tema sext. — «Utilitat d'introduir l'Esperanto en les institucions oficials, creant en aquest sentit, dintre de la «K. E. F.», seccions especials. — *Ponent*: Grup «Lumon», de Terrassa.

Aquests són els temes presentats fins al dia 28, lo qual demostra que hi ha vertader interès en fer alguna cosa pràctica, com així ho espera'l Consell Directiu.

El Consell Directiu ha cregut oportú la celebració d'un *Banquet de germanor*, el qual tindrà lloc el dia 15 (diumenge), a les vuit en punt de la nit, a l'esplendïd saló de l'Hotel de Espanya. El preu del cobert es de

quatre pessetes, havent d'enviar el llur nom al domicili de la «K. E. F.» tots els esperantistes que vulguin assistir-hi.

Durant l'últim mes han engruixit nostres rengles, esperantistes de L'Escala, Berga i Igualada, en les quals poblacions regna fort entusiasme per la nostra «K. E. F.» així com també s'han adherit els agrupaments «Espero Kataluna», «Esperanto Juneco», «Olota Stelo», «La Kvinpinta Stelo» i «Nova Semo», lo qual demostra una volta més la bondat de la nostra institució.

Se prega a tots els que tinguin intenció de quedar-se a Sabadell durant els dies 15 i 16, que a la major brevitat, ne donin coneixement, per postal, an aquesta Redacció (si volen que se'ls procuri allotjament) fins al dia 12 d'aquest mes.

Gracies a les gestions fetes pels nostres companys de Sabadell a l'Ajuntament de dita ciutat, «K. E. F.» tindrà a sa disposició 'l magnífic saló de sessions de dita corporació, com també possiblement una subvenció metàlica; lo qual, sens dubte, serà acordat en una de les proximes sessions de dit Ajuntament, fent patent això l'entusiasme que sent per la nostra idea.

El Consell Directiu (provisional) dona mil mercès a tots els senyors que han tingut la bondat de dirigir-li paraules d'encoratjament, ja per cartes rebudes en aquesta redacció, o desde altres periodics, ja que això ha demostrat a dit Consell que no's troba sol a la lluita, i que té qui'l segueix per a apoiar-lo si ho fa bé, o advertir-lo si s'equivoca.

Tots els senyors esperantistes que vulguin arribar a Sabadell a hora oportuna per a assistir a les recepcions de l'Ajuntament, «Gremi de Fabricants», «Escola d'Arts i Oficis», i «Centre de Dependents», poden sortir de Barcelona (estació del Nord) en els trens de les 8'23 i 9'50 del matí, i han de baixar al parador de la Rambla on ja hi haurà una nombrosa comissió d'esperantistes sabadellencs per a donar-los la benvinguda.



KORESPONDADO

Al niaj afablaj gekunlaborantoj ni devas insiste peti, ke ili sendu siajn manuskriptojn, *legeble skribitajn, nur sur unu flanko de la papero*. Plie, kvankam ni laŭ bezone korektos la alsenditajn skribaĵojn, ni unike korektos tiujn, kiuj ne entenos multajn erarojn, tiamaniere ke, por ilin enpresigi en nia gazeto, ni ne estos devigataj ilin verki novan fojon.

Fino T. P., S-ro J. Pratdesaba, J. M.^a T., J. P., A. B. kaj J. B. M.: Viajn alsenditajn verkojn estos baldaŭ publikigitaj.

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO □ OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

SENPAĜA POR LA ĜEFEDERACIANOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO

12. strato Gracia. — SABADELL
BARCELONA-HISPANUJO

AVIZO: La Redakcio konservas al si la rajton korekti laŭ bezono la manuskriptojn. Neakceptitajn manuskriptojn oni ne resendas.

ENHAVO: En Sukceso. — Raporto de la unua kongreso de katalunaj Esperantistoj en Sabadell. — Kongresaj Amuzadoj. — Tri komunikadoj. — Balado. — La sesa kongreso en Washington. — Enlanda Movado. — Gazetaro. — Oficiala parto.

EN SUKCESO

LA Unua Kongreso de Katalunaj Esperantistoj okazis sukcesplene. Kaj ne estas nia aljuĝo fakto, kiun al ni vidigas nia natura entuziasmo por tio kion ni kontribuis okazigi, sed la rezultatoj atingitaj per la ĉies klopodo.

Se ni estus el tiuj homoj, kiu kontrolas la sukcesojn per la amasoj de homoj partoprenintaj en la okazado de manifestadoj de ideoj; se ni estus el tiuj homoj kiuj unike aljuĝas per la eksteraj manifestadoj, vere nia Unua Kongreso ne estus kronita de gloro. Sed ni kontrolas la valoron de la okazaĵoj per tio, kio estas ĝia vera animo, ĝia vera vivo, ĝia vera valoro: kaj estas nediskutebla ke la valoro intima, efektiva, de nia Unua Kongreso estas en tio, kio determinas la vojon alkondukantan al plej baldaŭa atingo de la celo por kiu ni entuziasme klopodas; estas en tio, kio elmontras kaj vidigas ke apud ni, flankon ĉe la flanko estas amaso de lertuloj, de kuraĝuloj kiuj senhalte, senripoze laboras por nia Esperanto kaj por la peroj alkondukantaj al nia idealo, t. e. al Esperanto, kaj al pli grandigado de «K. E. F.»; estas sindonemuloj grandnombre kiu staras ĉe la piedoj pretaj por konkeri tion, kio estas por ni taŭgaj elementoj por la disvastigado de nia internacia lingvo kaj por alvarbi tiujn elementojn

kiuj plifirmigos nian estontecon. Kaj pro tio ni fiere asertas ke nia Unua Kongreso estis triumfo, kaj en la triumfo de la Kongreso estas ankaŭ, kompreneble, la triumfo de «K. E. F.»

Kaj tio ni ne konstatis nur en la urbo de la Kongreso, sed ĉe en la eksteraĵo: ne estas unike ni, kiuj proklamas ke nia organizado estas inda de la celo por kiu ĝi estis fondita, kaj ne unike ni, esperantistoj praktikaj, kiuj jesigas ke ĝi estas honorebla kaj ĉefa, sed la elementoj kaj organizadoj fremdaj al nia societo, la organizadoj kiuj estas la riprezentantoj de la urboj kaj ĝiaj direktantoj.

Jen; ĉiuj la kongresistoj per si mem tion povis konstati en Sabadell: tie lia Moŝto la urbestro je la nomo de la urbo deklaris sian protektadon al esperantistaro; la «Gremi de Fabricants» (Korporacio de Fabrikistoj), la «Escola Industrial» (Industria Lernejo), kaj la Centre de dependents del Comerç i de la Industria» (Societo de Komerĉindustriaj Oficistoj) proklamis ankaŭ sian bonvolecon kaj favoron por Esperanto — kiel ni raportas en alia loko de «K. E.» — kaj krome, dum la Kongreso oni sciigis ke lia Moŝto la Urbestro de Tarragona, je la nomo de la Urbestro petis al la Kongreso okazigi la Duan Kongreson en tiu ĉi fama kaj historia urbo. Kion pli ni povus esperi?


Ne estos de nun la esperantistoj kiuj devos iri de loko en lokon peti bonvolecon kaj favoran akcepton por nia ideo; ni konstatas ke la tempo alvenis, kiam nia konstanta agado komencis frukti; ni konstatas ke fine la ĉefaj elementoj de la urboj kaj sekve de Katalunlando komprenis ke ni ne batalos por utopio; oni fine deklaras ke ni estas forto kaj oni esperas de ni, konsekvence, agadon kaj sukceson.

Ni ne dormu sur la laŭroj: pro tio, ke ni ne estas herooj, pro tio, ke ni devas konkeri aliajn fortojn aliajn helpilojn, ni ne siestu! Nune pli ol antaŭe ni devas plej fervore klopodi, kaj en ĉia estanta klopodo ni sentos stimulon, kaj konsekvence saĝnapremion, pro tio ke ni konkeras praktikajn kaj videblan celojn.

Ni pretiĝu por ke en la Dua Kongreso de «K. E. F.» ni atingu plej valoran konkerojn; ni pretiĝu por korespondi al sindonemeco de la urbo Tarragona kiu deziras krom kunhelpi nin, nin ĉirkaŭbraki; ni pretiĝu senhalte por pli enradikigi nian «K. E. F.», t. e. Esperanto.

La Dua Kongreso de Katalunaj Esperantistoj estos alia triumfo!





UNUA KUNSIDO ĈE LA GRANDA SALONO DE LA SABADELL'A URBDOMO

RAPORTO DE LA UNUA KONGRESO DE KATALUNAJ ESPERANTISTOJ EN SABADELL

Tiu ĉi Revuo, organo de la «K. E. F.» ne estas kiu devas komentarii kaj apologii la taskon faritan de la organizintoj de la Federacio kaj de la kongresistoj: al ni nur apartenas priskribi la laboron faritan per maniero klara kvankam konciza, por ke ĉiuj, same tiuj kiuj plenaj je sankta entuziasmo klopodadis kaj klopodadas por doni formon kaj vivon al la «K. E. F.», kiel tiuj aliaj, kiuj pro malgrandanimaj egoismoj, antipatioj personaj aŭ de partio kontraŭagis ĝian fondiĝon, povu juĝi la aferon juste kaj klare.

Tamen, ni ja devas konstati ĝi noble kaj malkaŝeme ke nia agado tute nin kontentigis kaj kuraĝigis por la estonto, ĉar ni havas firman konvinkon pri tio, ke alvenos tago, ne multe malfrua, en kiu kuniĝinte ĉiuj katalunaj esperantistoj ĉirkaŭ ni, ni havos tian tutan forton necesan por atingi unu el niaj celoj, kaj montri, ke la kataluna esperantistaro estas unu vera sola familio.

Kiel estis anoncita per la oficiala organo de «K. E. F.» kaj kelkaj Barcelonaj jurnalaj, je la deka kaj duono matene alvenis ĉe la fervoja haltejo kelkaj samideanoj el Barcelono, Terrassa, Manlleu, Vilanova i Geltrú, Barbarà del Vallès, Vic, Tarragona kaj el aliaj urboj por partopreni en la taskoj de la Kongresaj Kunvenoj.

Ili estis atenditaj de niaj Sabadell'aj samideanoj, kiuj ĝoje manprenis la ĵus alvenintojn, kaj post la rubrikaj salutoj oni organizis gravan manifestacion kiu preskaŭ trapasis la tutan urbon vekante la scivolemecon de la urbanaro pro la esperantaj flagoj kiujn kunportis niaj Barcelonaj amikoj.

Unue, ni estis akceptitaj ĉe la instrua societo «Centre de Dependents del Comerç i la Industria» kies prezidanto Sro. D. Saló, post nia prezentado farita de la maljuna sabadell'a esperantisto Sro. A. Miralles Gual, gratulis kaj dankis al la «K. E. F.» por okazigi ĝian unuan Kongreson en Sabadell, kaj li finis dirante, ke la domo de ilia societo estas je la dispoŝo de «K. E. F.». Sro. D. Dalmau el Barcelono, je la nomo de ĉiuj, esprimis la dankecon kiun ni sentas por tia grava prezento.

Tuĵe ni iris ĉe la gravan societron «Gremi de Fabricants», en kies domo jam nin atendis sia prezidanto Sro. M. Duràn i Folguera, la sekretario-advokato Sro. G. Casals i Pena, kaj Sro. A. de P. Campmany. Sro. Duràn akceptis nin laŭdante Esperanton, lingvo kiu estas difinita, — li diris — por faciligi inter la popoloj el la plej malsamaj lingvoj la interrilatojn kaj la interŝanĝojn de industriaĵoj kaj komercaĵoj. La Komerca Ĉambro (sekcio de tiu ĉi societo) jam de longe akceptis Esperanton kiel internacia lingvo.

Sro. Delclos el Vic, dankis je nia nomo al Sro. Duràn pro siaj laŭdindaj paroloj por Esperanto, kaj rekomendis al ĉi tiu sinjoro ke la grava societo kiun li prezidas influu por ke esperantajn kursojn estu donataj ĉe la «Escola Industrial» el Sabadell, respondante sinjoro Duràn ke li klopodos por efektivigi nian proponon. Poste la sekretario Sro. Casals montris al ni tre antikvajn dokumentojn datumitajn dum la XV.^a jarcento, kiuj montras la antikvecon de Sabadell pro la fabrikado el lanteksajoj. Alia vizito estis farita al la «Escola Industrial d'Arts i Oficis» kie la klera sabadell'a esperantisto Sro. A. Lagarriga, per elokventa parolado prezentis la kongresistojn al la profesoroj, al kiuj li ankaŭ rekomendis nian lingvon por ke Ĝi estu instruota en tiel grava lernejo. Respondis la profesoro de meĥaniko Sro. Cortada je la nomo de la profesoroj, ke ili ĉiuj penos por ke dum la venonta kurso 1910-11, la deziroj de ni esprimitaj havu efektivecon.

Nia lasta vizito estis por la Urbestro, ĉe kies domo akceptis nin

la Urbestro Sro. F. Grier kaj kelkaj urbkonsilantoj al kiuj nin prezentis nia inteligenta samideano Sro. D. Serdà, kiu facilmaniere paroladis dirante ke, dum ĉiuj tempoj la sabadella Urbeŝtaro ŝimpatiis kun nia ideo, elmontrante tion, ke, se la urbkonsilantoj estas la esprimo de la urbo, nia tuta urbo estas enperantigita, pro tio, ke neniuj urbkonsilanto neis al nia afero ŝian helpon, kiam ni ĝin petis por nia propagando. Sro. Urbeŝtro post ŝaluti al la kongreŝistoj diris ke Sabadell'o ne havas grandajn aleojn, riĉajn konstruaĵojn, ĉion kio ornamas aliajn urbojn, ŝed tamen ĝi havas grandan junularon kiu ŝin priokupas ne nur pri la materiala laboro propra de urboj industriaj ŝed ankaŭ pri la venko de ĉiuj noblaj ideoj kaj artoj. Li finiĝis dirante: «tiu ĉi domo estas la domo de la urbo kaj mi je ĝia nomo diras, vi estas en via hejmo». Sro. J. B. Albiñana, dankis al la Urbestro la varmajn parolojn al ni dediĉitaj, promesante ke ni ĉiuj restos ĉiam dankemaj pro la gastemeco de Sabadell'o. Poste ni vizitis la diversajn urbajn oficejojn, akompanitaj de kelkaj urbkonsilantoj, ĝis nia eliro por iri tagmezmanĝi. Estis la unua kaj duono, kaj la unua kunsido devis okazi je la tria posttagmeze.

1^a KUNSIDO

La kunsidoj okazis en la ĉefa ŝalono de la Urbodomo. Prezidis ambaŭ kunsidojn Sro. Johano Piferrer, kasisto-administranto de «K. E. F.» kaj en ŝia dekstra flanko ŝidis Sro. J. B.^a Albiñana, Sekretario, kaj maldekstre, Sroj. A. Badia, Vic-prezidanto, kaj Sro. J. Ustrell, Vic-kasisto-administranto.

Je la 4.^a, Sro. Prezidanto malfermis la kunsidon. Li klarigis al multenombra ĉeestantaro ke nia estimata efektiva Prezidanto, Dro. J. M.^a Terricabras, ne povis ĉeesti kaj sekve prezidi la Kongreson, tial ke urĝaj neprokrasteblaj devoj de lia kuracista profesio katenigas lin en Viko. Li petis pardonon al Sroj. gekongreŝistoj, dezirante al Kongreso bonan sukceson.

Sro. J. B.^a Albiñana, ekkomencas la legadon de la raporto pri la klopodoj entreprenitaj ĝis la ŝtarigado de «K. E. F.».

Tiu ĉi raporto plej detale klarigas kial la organizintoj entreprenis la fondon de «K. E. F.», kaj plie liveras al ĉiuj la celojn por kiuj povas la federacianoj klopodi.

Ĝi estis aplaŭdita je la fino, kaj unuanime akceptata.

Sro. Johano Piferrer, Kasisto administranto, legis ŝian raporton pri financoj de «K. E. F.», kiun ankaŭ estis aprobita. Ni ĝin konigos katalune al niaj geabonantoj, kaj gefederacianoj.

La sama samideano, konigis poste la nomaron de la delegitoj de «K. E. F.» la nombro de gefederacianoj, kaj la aliĝintaj grupoj, laŭ la jena ordo:

Delegitaro de «K. E. F.»:

Sro. Delfi Dalmau, de *Barcelona*; Sro. Joaquim Garriga, de *Sabadell*; Sro. F. Mestres, de *Vilanova i Geltrú*; Sro. A. Bach, pbre., de *Vic*; Sro. J. Puigbonet, de *Barberà del Vallès*; Sro. M. Espar i Boquer, de *Balaguer*; Fino. J. Massagué, de *Cambrils*; Sro. Josep Pi, de *Olot*; Sro. B. Pineda, de *Terrassa*; Sro. Ll. Coll, de *Manlleu*; Sro. J. Molas, de *Tarragona*; Sro. P. Alsina, de *Premià de Mar*; Sro. F. Blanquer, de *Castellar del Vallès*; Sro. J. M. Brú, de *Tivissa*; Sro. Ll. Margenat, de *Sant Llorenç Savall*; Sro. J. Coll, pbre., de *Sant Feliu de Codines*; Sro. J. Solá, de *Mataró*; Sro. J. Ximinis Guri, de *L'Escala*; Sro. J. Cardona, de *Berga*, Sro. E. Aguadé, de *Reus*.

La nomaro de gefederacianoj kaj grupoj aliĝintaj al «K. E. F.», ni ekkomencas ilin publikigi en la 2.^a kaj tria paĝo de la kovertoj.

Pro tio, ke multaj el la aliĝintaj grupoj speciale komisiis privatan delegiton por ĉeesti en la Kongreso kaj partopreni en ĝiaj kunvenoj, Sro. Prezidanto permesis al ili paroli al la gekongresistoj. La grupaj delegitoj estis:

Sro. C. Urbez, el «*Espero Kataluna*», *Barcelona*; Sro. J. Serra, el «*Laboro Esperanta*», de *Vilanova i Geltrú*; Sro. J. Guillomia, el «*Uiam Antaŭen*», de *Sant Martí (Barcelona)*; Sro. J. Pujol, el «*Escola Universitaria*», de *Barcelona*; Sro. M. Lafuente, el «*Kvinpinta Stelo*», de *Barcelona*; Sro. J. Arnella, el «*Esperanta Nesto*», de *Barberà del Vallès*; Sro. J. Casajoana, el «*Komerca Fakoj*», de *C. A. de D. del C i de la I.*, de *Barcelona*; Sro. J. Molas, el «*Tarragono Esperanta*», de *Tarragona*; Sro. A. Martí, el «*Esperanto Semo*», de *Sabadell*; Ptro. A. Bach, el «*Vika Esperantistaro*», de *Vic*; Sro. Ll. Coll, el «*Esperanto Amo*», de *Manlleu*; Sro. S. Margenat, el «*Monta Grupeto*», de *Sant Llorenç Savall*; kiuj varme esprimis sian bondeziron kaj sukceson al «K. E. F.», kun plena fido atingi per la ĉies kunhelpo nian celon.

Poste, la Prezidanto anoncis ke, ĉar la organizintoj de «K. E. F.», deziris ne plu daŭrigi en la estraro de la Federacio pro tio ke sia organizanda laboro jam finiĝis, kaj pro la aliaj kialoj klarigitaj en la raporto legita de sinjoro la Sekretario, la Kongreso devas elekti la novan Komitaton por la periodo 1910-11, kaj li permesis kvin minutojn da libertempo por ke la gekongresistoj interkonsentu pri tiu afero.

Laŭ la balotado rezultis elektitaj Sroj. J. Bremon Masgrau kaj J. Pujol Montfort, el *Barcelono*; Sro. J. Delclòs, el *Vic*; Sro. J. Piferrer Rifà, el *Sabadell*; kaj Sro. V. Alavedra, el *Terrassa*.

Ni devas rimarki ke ĉi tiuj Sroj. estis elektitaj preskaŭ per la voĉdonaĵoj de ĉiuj, kio vidigas la interkonsenton de la gefederacianoj pri tiu afero.

Poste la sekretario legis du komunikaĵojn rilate al la loko kie ni devas kunveni en la venonta jaro.

Unu estis de la grupo «Vika Esperantistaro», kaj la alia de la Tarragona Urbestaro.

«Vika Esperantistaro» invitis nin por nia Dua Kongreso per varmaj vortoj. La delegito el Tarragona diris ke, ne nur estas la Urbestaro, kiu invitas al ni sed ankaŭ la Provinca Deputataro, kaj la societo «Atracció de Forasters», promesante ke ni estos tre bone akceptitaj, pro kio, ĉiuj akceptis ke nia dua Kongreso okazos en Tarragona dum la venonta jaro.

Kun tiu ĉi decido oni finis la unuan kunvenon, kaj la prezidanto invitis al la gekongresistoj por ke ili ĉeestu al la nokta festo, ĉe la salonoj de la societo «Ateneo».

2^a KUNSIDO

Ĝi komenciĝis je la dekunua matene sub la prezido de Sro. Piferer. Tiu ĉi sinjoro post peto de kelkaj kongresanoj, kiuj bezonis foriri tagmeze al Barcelono kaj deziris partopreni en la diskutado de la temo prezentita de Sro. Serdà, kies temo estis en la kvina loko de la programo, proponis ŝanĝi ĝian ordon en la senco ke, la temo 5.^a estu unue diskutata; kaj tiel aprobite, li cedis la parolon al Sro. Graupera el Sabadell, kiu legis la verkaĵon de nia amiko.

Jen kiel parolas Sro. Serdà, pri sia temo «Kun la celo stimuli al la Kataluna Esperantistaro, estus utila organizi esperantajn literaturajn konkursojn premiante la plej bonajn verkaĵojn (originalaj aŭ tradukitaj?). Projekto kaj maniero por organizi tion».

«Mi konstatis ke kio pli taŭgis por la disvastigado de la Kataluna lingvo inter katalunoj, ke kio pli taŭgis por instigi al katalunoj skribi katalune siajn verkojn, estis la «Floraj Ludoj» aŭ Literaturaj Konkursoj.

Kiu tion neos, tiu ne konas la veron. Tamen mi ne forgesas ke ne ĉiuj verkoj estis premiitaj en tiaj konkursoj kaj eĉ ĉiujn poetojn kaj prozistojn ne koniĝis al ni, tiu ĉi de la Katalunoj tiel ŝatata festo. Sed mi estus devigata fari multajn konsideraĵojn rilate al tiu afero. La ĉefa kaŭzo estas en la maniero kiel oni aljuĝas la verkojn, ĝenerale, en tiaj konkursoj. Mi tion konstatis de tre proksime, kaj mi sperte povas priparoli tiujn aferojn. Pro la *protekto al amikoj* niaj konkursoj kata-

lunaj fariĝis, ĝenerale ridindaj, kaj fariĝis infanaj ludoj, ĉefe tiuj kiujn oni okazigas en eksterbarcelonaj urboj. Ili fariĝis kiel necesega afero por niaj «Ĉefaj Festoj», kaj tiuj festoj rilatas al ni, kio rilatas al aliaj popoloj la «bovoviraj kuradoj».

Ni vidas, do, ke niaj katalunaj konkursoj havas flankon taŭgan kaj maltaŭgan; flankon utilan kaj malutilan: ni sciu elĉerpi la bonon, la taŭgon kaj la utilon por atingi per tiuj konkursoj en Esperanto, bonfaran agadon, kaj instigi per ili al niaj kamaradoj verki kaj perfektigi kiel verkistoj kaj kiel esperantistoj, ilin stimolante samtempe per rekompenco kaj distingo.

Taŭgas adapti al ni tiun ĉi peron por atingi de la katalunaj esperantistaj verkistoj, kiuj ne sentas inklinon liveri sian utilan laboron al ceteraj esperantistoj mallertaj, ke ili sentu sin de ĝi allogita, kaj povu ni tiel akiri aron da stilistoj se tio estas eble, kaj liveri samtempe literaturon riĉan kaj ekzemplan kiel originalan kaj tradukitan.

Cetere, per tiuj konkursoj ni starigos agrablan kaj mirindan feston, kiu montros ke Esperanto scias eltiri profiton el tiuj aferoj kiuj montras utilecon efektivegeblan, kaj starigante samtempe belan kaj sukcesan feston.

Jen la detala projekto:

Mi konsistigus la konkurson el du partoj:

Ordinaraj temoj kaj Ehsterordinaraj temoj.

Por la Ordinaraj temoj mi difinus:

Premio al plej bona kanto al *Amo*.

Premio al plej bona proza *Literaturaĵo*.

Premio al plej bona tradukita *Poezio*, el Katalune.

Premio al plej bona tradukita *Prozaĵo*, el Katalune.

Pri la du lastaj estos antaŭe difinitaj la verkoj por traduki.

Rilate al unua temo difinos premion la «K. E. F.», kaj rilate al la tri ceteraj, la organizintoj kune kun la loka kongresa komitato klopodos, por ke premion estus difinita de societoj aŭ personoj el kie okazos la Kongreso kaj la «Literatura Festo».

Mi donas tian preferon al tradukaĵoj, — ĉu en prozo, ĉu en verso — ĉar mi juĝas ĝin meritinda, pro tio, ke ne estas facile — laŭ mia opinio — verki perfektan tradukaĵon. Eble viaŭce, vi kredos ke estas multaj malfacilaĵoj por aljuĝi konscie, kiun el multaj alsenditaj tradukaĵoj estas la plej bone tradukita. Mi rimarkis ke en sama verko tradukita de malsamaj homoj, oni ĉiam konstatas ĉe kiu la stilo estas plej pura, la elturniĝoj pli belaj kaj harmoniaj, kaj la spirito de la verko pli fidele translokita kaj interpretata, kaj ĉe kiu tiu *savoir faire* tiel propra kaj karakteriza de la bonaj tradukistoj kaj de la aŭtoroj

mem, estas trovebla. Tiujn ĉi malsimilecojn kiujn mi citis, krom aliaj, mi konstatis en du Esperantaj tradukaĵoj faritaj de malsamaj tradukintoj de unu sola originalo. Pri la kapableco de la tradukintoj estas nenia dubo, ĉar unu estas Sro. Grabowski kaj Sro. Kabe la alia. La tradukita originalo oni trovos en la Enkondukanto, de Grabowski, kaj en *Pola Antologio*, de Kabe, sub la titolo *La Ĝimo de l' Mondo*.

Antaŭe mi devas konfesi que mi nek iomete konas la polan lingvon; sed en la atenta kaj kompara legado de ambaŭ tradukaĵoj, oni rimarkas — laŭ mia aljuĝo — ke tiu de Grabowski estas laŭlitere, dum tiu de Kabe ŝajnas, ke la tradukinto sciis tiel fidele interpreti la senton de la originalo, ke li atingis eltiri la tutan belecon kaj la senton; li ilin proprigis al sia personeco de esperantisto, kaj ilin disvolvis tiel belmaniere, tiel akurate, per florialesprimado, ke la pli malsperta homo ekkrius: «jen verko skribita rekta en Esperanto; jen verko skribita en patra lingvo, en lingvo kun kiu oni sentis, suferis kaj amis.» Ĉi tiu estas la impresoj kiujn mi sentis dum mia komparo.

Alian detalon mi povas ankoraŭ prezenti al vi. Antaŭ ne multe la «Germana Esperantisto» malfermis konkurson-ekzercon. Ĝi konsistis traduki el la germana lingvo artikolon originale verkitan de doktoro Foerster; kaj ĉu vi scias kiu plej bone ĝin tradukis? Do, Sro. Carlo Bourlet, franco. Vi vidas, sekve, ke ne estas tiel facila afero esperantigi, kaj pro tio la tradukado meritas konsideron kaj gravecon. Oni bezonas krom perfektan elkonadon de la lingvo tradukota, plenan elkonadon de tiu al kiu oni tradukos; oni bezonas plie, prilingvan kulturon kaj posedi facilecon de esprimado kaj de kompreno, kiujn ja estas malsimilaj en ĉiuj tradukintoj, pro tio ke ĉiuj ne posedas ilin egallajn, kaj kies malegaleco mi opinias ke ne estas malfacile aljuĝi. Kaj tion, kion mi konstatis ĉe esperantaj tradukaĵoj, kaj ĉe aliaj lingvoj, vi sendube ankaŭ konstatis.

Kiel *Eksterordinaraj Temoj*, mi akceptus ĉiujn, kiujn societoj, grupoj aŭ individuoj prezentas al ni kunigante premion al ili. Tiaj Temoj devas sin rilati al Esperanto aŭ al io koncernante al Ĝi.

Rilate al aljuĝado de manuskriptoj — kaj tion mi parte prunteprenis al «Esperantistaj Floraj Ludoj» — oni povus organizi laŭ la jena formo:

Prezidanto de la Konkurso: Sinjoro la Prezidanto de «K. E. F.»

Aljuĝantaro: — Rajtigi la Direktantan Komitaton de «K. E. F.» por ke ĝi ilin elektu, el kiuj oni nomos Sekretaron.

Pri la aljuĝantaro. — Ĉiu aljuĝanto estos samtempe: 1.^a juĝanto de una temo; 2.^a juĝanto de dua temo; kaj 3.^a juĝanto de tria temo;

t. e. li estos juĝanto de 3 malsimilaj temoj en malsimila ordo de aljuĝado, de tiuj temoj kiujn li antaŭe estus elektintaj kiam oni estus al li petata sian konkurson kiel aljuĝanto. Esceptinte la Prezidanton kaj la Sekretarion, la aljuĝantaro povos partopreni en la Konkurso unike en la temoj kies aljuĝontoj ili ne estos. La Prezidanto kribados la al li alsenditajn manuskriptojn: la plejbonajn verkitajn li sendos al 1.^a aljuĝonto. Tiu ĉi ilin sendos post aparta klasifikado, al 2.^a aljuĝonto de la sama temo, kiu faros ankaŭ sian klasifikadon kun klarigaj rimarkoj pri la manuskriptoj kiujn li opinias premiindaj. Tiun ĉi klarigojn kaj klasifikadon li verkos sur aparta papero (enfermata en koverto, kiun li sendos kune kun la aljuĝotajn manuskriptojn al 3.^a aljuĝonto. Tiu ĉi agos kiel la 2.^a sen malfermi la koverton entenanta la raporteton de ĉi tiu, kaj li sendos ĉion — t. e. manuskriptoj, raporteto de la 2.^a aljuĝinto kaj la sia — al la 1.^a aljuĝinto, kiu legos la raportetojn de la ceteraj aljuĝintoj kaj komparos ilin kun tiu de li farita. Li — la 1.^a aljuĝinto — verkos lastan raporton pri la de li farita laboron, kiun kunigos al la manuskriptoj kaj sendos al la Prezidanto.

En okazo de malkonsento inter la aljuĝantoj, la Prezidanto decidos.

Pri la cetero, mi sekvos la katalunan kutimon.

Jen, karaj gekongresistoj, mia propono. Se vi opinias ĝin inda, ĝin reformu aŭ ĝin akceptu entute; mi bonvole akceptos viajn reformojn al ĝi, se la gekongresistoj ankaŭ ilin akceptas. Mi restos tre kontenta se «K. E. F.» prenas sur sin ĉi tiun feston, kaj se mian celon oni atingas, mi sentos la ĝojon de tiu kiu plenumis sian devon.» — *D. Serdà.*

Ptro. Bach, el Vic, proponis ke ne estu la komitato de «K. E. F.» la komisiito por nomi la juĝantaron kaj laŭokaze decidi kiaj devas esti la verkoj premiitaj, sed ke por tio oni nomu ĉiaman juĝantaron kiu povus konsisti el personoj famekonataj en la Kataluna esperantismo, kies nombro pligrandigadus dume eliradus novaj kompetentuloj, rajtiginte prefere por eniri en tian juĝantaron la poliglotojn.

Sro. Serdà rimarkis al Ptro. Bach ke en okazo de konsento pri tio, kion proponis tiu ĉi, neeviteble kreigus oligarkio el kelkaj memrajtigitoj kies volo superus ĉiujn; kaj lia kompreno konsistis je tio ke la juĝantoj devus esti ŝanĝataj, por tiel profiti la personajn ecojn de ĉiu esperantisto, kiu dezirus esti preta por juĝi temon laŭ sia kompreno.

Sroj. Dalmau kaj Colet estas je la sama opinio kiel Sro. Serdà.

Sro. Pujol proponas ke la komitato de «K. E. F.» nomu la juĝantaron.

Sro, la Prezidanto kredas, ke la komitato de «K. E. F.» nur povus nomi la prezidanton por la arango de literatura konkurso.

Sroj. Serdà kaj Figuerola klarigas kelkajn punktojn pri la organizado.

Sro. Albiñana diras ke la Kongreso devas ĉiujare nomi la juĝantojn.

Sro. Serdà akceptas tiun aldonon kun la klarigoj, ke la Kongreso devas nomi ĉiujare tri organizantojn de literaturaj konkursoj, kiuj poste nomos la juĝantaron.

Tio estas aprobita por ĉiuj, kaj la prezidanto permesas kvin minutojn da libertempo, por ke la Kongresanoj interkonsentu pri la tri organizantoj, kiuj oni devas nomi, rezultante esti post baloto, Sroj. D. Serdà, el Sabadell, J. Rosals kaj F. Pujulà el Barcelono.

Pri la temo «Estas necese ke «K. E. F.» havu du delegitojn en ĉiu urbo por plibonigi ĝia disvastigado?» de Sro. J. Palmerola el Vic, parolis anstataŭ ĝia aŭtoro Sro. Delclos dirante ke povas okazi ke delegito malsaniĝas aŭ pro siaj aferoj, devas lasi la urbon, kaj «K. E. F.» restas sen delegito en tiu loko.

Li proponas do, starigi vic-delegiton por anstataŭi la delegiton, kaj ankaŭ helpi lin, ĉiuokaze.

La Kongreso decidas post la paroloj de kelkaj kongresanoj, ke la delegitoj mem nomu la vic-delegitojn anoncante tion al komitato de «K. E. F.» por la aprobo de la nomoj.

Sro. Dalmau defendis la temon de Sro. J. Ximinis Guri el L'Escala (Girona), kiu proponas starigi komision por klarigi la dubojn pri Esperanto, kiujn ofte havas la esperantistoj kiuj loĝas en urboj ne havantaj societojn esperantajn.

Pri tio la Kongreso decidis, ke anstataŭ komisio, estu la oficiala organo de «K. E. F.» kiu devas respondi aŭ klarigi la dubojn pri gramatiko, malfermante sektion en kiu ĉiuj gefederacioj estas petataj respondi ĉiujn demandojn. En okazo kiam la demandoj ne estos respondataj de niaj legantoj, la redakcio mem ilin respondos.

Sro. Martí legis sian raporton pri la temo «Ni devas propagandi konstante kaj ofte en la ĉiutagaj gazetoj, precipe en la Barcelonaj, pro tio ke ili estas la plej legitaj» kaj por ke niaj legantoj vidu la sencon de tiu temo ni publikigas ĝin sube.

«Mi ne pretendos, karaj geamikoj, per mia mallonga parolado, longe laŭdi la meritojn de la Propagando, tute konvinkita ke vi ĝin

konsideras kiel la plej bona ilo por igi enradiki kaj kreskadi ĉiujn ajn teoriojn kaj ideojn. Kaj kiam ni konsideras que Esperanto ne estas ankoraŭ atinginta la altegan lokon kiun Ĝi meritas pro siaj grandaj kaj geniaj ecoj, ni devas peti la helpon de la Propagando se ni ĉiuj volas ke la bela internacia lingvo estu nune respektata kaj estimata kiel ĉia verko naskita de la studado kaj la logiko; ke la muroj de ĉiuj lernejoj iĝante eĥoj, longe kaj senfine ripetante la vorton Esperanto, tiu ĉi estu kun entuziasmo akceptata de ĉiuj ĝeinfanoj, se ni volas, fine, ke, en proksima estonteco, kiel luma diino, forigu la konfuzon kiu, kovrante la homaron kun malluma mantelo, malpermesas ke la popoloj tute povu sin kompreni.

La plej bona ilo por propagandi estas, sendube, la gazetaro, tiu ĉi direktilo de la publika opinio, laŭ kies volo la urba vivado ĉu restas gaja kaj trankvila, ĉu sentas varmajn dezirojn de malamo kaj ribelo, ĉu iĝas entuziasmoplena pro la sciigo de ia ajn grava elpensajo. La gazetaro, do, devas esti la altega piedestalo de kie la Esperantismo proklamu senĉese al la mondo la regadon de la progresado kaj frateco, la publika tribuno kiu ĉien dissemu nian idealon. La «Kataluna Esperantista Federacio» havas sian revuon; sed tiu ĉi perfekte plenumos sian devon se atingas — kion sendube ĝi atingos — antaŭenirigi la entuziasmon de ni ĉiuj kaj, samtempe, sciigi al la fremda mondo esperantista ke, en nia Kataluna nacio, kreante literaturajn geniajn verkojn, fervore laborante, por la progresado de la aliaj belartoj; malsuprenirante en la grandegan kaj profundan maron de la Scienco kaj akceptante la renovigemajn idealojn kiel ankaŭ ĉiujn manifestadojn de kulturo kaj antaŭeniro, estas malkvieta popolo kiu batalas kaj sopiras por la libereco de sia patrujo.

Nia gazetaro, la gazetaro por la propagando, devas esti la ĉiutaga kaj ĉieiranta, la Barcelona gazetaro kiu sendube akceptos ĉiujn esperantajn elirojn el la multenombro da plumoj de la Kataluna esperantistaro. Doktrinaj artikoloj, opinioj de eminentuloj, kronikoj pri gravaj faktoj kiuj tute klare pruvas la praktikon kaj utilecon de Esperanto, estas temoj por kies defendo ne mankos certe la necesajn argumentojn kiuj, ne nur pligrandigos la esperantan rondon, sed ankaŭ konvinkigos tiulojn al kiuj, parolante pri la internacia lingvo la nescio florigas en siaj lipoj ironian rideton.

Sekve mi proponas: ke la direktanta komitato de la «K. E. F.» elektu la federacianojn kiuj, pro iliaj specialaj ecoj, plej bone scios propagandi per la gazetaro; kaj, samtempe, — se ne momente, pli antaŭnelonge almenaŭ — malfermu konkurson, kiel faris la «Germana Esperantisto», en kiu oni premias la propagandan artikolon: plej bone

verkitan. Tio, por la federacianoj, estos kiel sprono, kiu ilin devigos batali per la gazeta propagando. Batali estas vivadi, amikoj, kaj nur per nia senĉesa batalado

la popoloj faros en konsento
unu grandan rondon familian.

ANTONI MARTÍ

el *Esperanta Semo*

Post malgranda diskutado estis aprobita tiun temon, kaj atendi la Duan Kongreson por plenumi la duan parton de la temo kiu rilatas al la premio por la plej taŭga artikolo el la aperintaj en la ĉiutagaj ĵurnaloj.

La kvara temo, proponita de nia pioniro Sro. F. Pujulà Vallès pri la kreo de *Maristan Komisionon* por propagandi Esperanton en la maristoj el la eksterlandaj ŝipoj, kiuj vizitos la Barcelonan havenon, per *Ĉefeĉaj* ŝlosiloj, la aŭtoro prezentis la ĉi suban verkaĵon, ĉar sia saneco ne permesis al li ĉeesti en niaj kunsidoj.

«Estimataj gesamideanoj:

Mi bedaŭras, ke la malsano retenas min hejme kaj malpermesas al mi ĉeesti persone en tiu ĉi Kongreso, el kiu tiom da bonaj aferoj — mi estas certa — naskiĝos por la boho de nia individua moralo kaj de la ĝenerala movado de Esperanto en nia lando.

Mi estas devigata klarigi al vi la sencon de mia propono; tial mi petas bonvolu senkulpigi, ke mi trouzos kelkajn momentojn vian atenton. Aliparte, via senkulpigo estos des pli facile donebla, ke mi ne parolos longe.

Neniu el vi bezonas grandajn nek malgrandajn argumentojn por konvinkiĝi, ke la ĉefa celo de esperantista grupiĝo estas la propagando, la propagando, kaj ĉiam la propagando.

Bedaŭrinde, ni ne ankoraŭ atingis la tempon kiam ni tute simple uzos Esperanton ĉu por nia plezuro ĉu por niaj bezonoj. Bedaŭrinde ni ankoraŭ estas en tro granda malmultenombro. Amasoj, centoj, miloj da personoj pasadas apud ni sen ia ideo pri Esperanto en iliaj cerboj! Nia tasko ne estas finita. Apenaŭ ĝi estas en la komenco. Ni devas propagandi ĉie, ĉiam, al ĉiuj! Propagandi senhalte, senripoze, senlace, obstine!... Kaj nun, kiam lumo ŝajnas aperi sur nia lando, kiam ni fine komprenis ke unuiĝo estas forto, kiam ni ekhavas kun Federacio gravan instrumenton de disvastigo kaj propagando de niaj ideoj, ni devas profiti ĉiujn niajn fortojn kaj alcentrigi ilin al nia ĉefa celo.

La sperto montras al ni, ke la propagando, kiun oni faras al

fremdulo estas pli efika ol tiu, kiun oni faras al enlandano. La profetoj ĉiam estas fremdaj. Ĉe ni, ni povas rimarki kun kia indifereco samlandano nia aŭdas pri la aprobo al nia lingvo de nia eminenta literaturisto Joaquim Ruyra. Sed rimarku, kiel grande li malfermas la okulojn, kaj kiel ronde li rondigas la buŝon, kiam vi certigas al li ke la urbestro de *Fuji-Oma* aŭ de *Aŝeki-Lakama* aŭ de iu alia elpensita de vi vilaĝo de Japanujo, estas esperantisto!

Tiu ridinda inklinado de la animo, ne estas apanaĝo nia. Ĝi estas homa! En ĉiu popolo, en ĉiu lando okazas same! Kial do ne profiti tiun malvirteton por efikigi nian propagandon?

La fremduloj ne mankas ĉe ni. En nia haveno ni akceptas ĉiutage unu aŭ du fremdajn ŝipojn kun iliaj respektivaj maristaroj.

Ili venas de malproksime. Ili ofte tute ne konas nian lingvon. Ili kunportas malnovajn ĵurnalojn: librojn, kiuj estas multfoje legitaj... La fremdaj homoj multe pli legas ol niaj. Promenu tra la kajoj de la marbordo kaj vi vidos ilin — post la laboro — sidantajn sur la ferdeko, legantajn ĉu por instrui ĉu per kontraŭbatali la tedon... Ha, se ni povus enŝovi en iliajn manojn unu el tiuj mirindaj Ĉefeĉaj ŝlosiloj! Certe ĝi restus legita! Kaj certe tiu semo florus kaj fruktigus!

Mi estas certa, ke mi ne bezonas ĝeni vin plu! ke via konvinko jam ekzistas!

Kreu tiun komisionon, kiu tre certe ricevos helpon de ĉiu lando, kiu tre certe disvastiĝos al ĉiu haveno de la mondo kie estas esperantistoj, kiu nepre fariĝos internacia!

Mi ŝparas al vi la tedon de klarigoj pri ĝia funkciado, kiurj mi rekte donos al la sindonemaj samideanoj, kiuj sin proponos por tiu meritinda tasko. Mi diris. — *F. Puĵolà.*

La Kongreso ricevis per aplaŭdoj tiun ĉi temon kaj kore akceptis ĝin kune kun la personaj proponoj de ĝia aŭtoro, sed kun la klarigoj ke nun «K. E. F.» ne povas difini monon por tia propagando, ĝis la dua Kongreso, ĉar nune «K. E. F.» devas plifirmigi ĝian krediton.

Plie, tiu komisiono estos sekcio de K. E.

La temo sesa, proponita de grupo «Lumon» el Tarrasa, pri la enkonduko de Esperanto ĉe la Oficialaj Institucioj, kiel Industria Lernejoj, Universitatoj, Komercaj Ĉambroj, k. t. p., okazigis iom da diskutado, ĉar kelkaj kongresanoj opiniis ke tiu tasko estas pli facila al la lokaj grupoj ol por la komisiono, kiun, proponas krei tiu ĉi temo, kaj malgraŭ la bona defendo ke de la temo faris Sro. Colet, el «Lumon» la kongreso decidis rekomendi al la lokaj grupoj ke ili laboru por la atingo kiun celas tiu temo.

Post la temaj diskutoj, Sro. Piferrer proponis al la Kongreso esprimi la plej sincerajn dankojn al la Sabadell' a Urbeŝtaro pro ĝia morala kaj materiala helpo al «K. E. F.» kaj ankaŭ sendi salutan telegramon al Majstro Zamenhof, je la nomo de la Kongreso. La kongresistoj aprobis ĉiujn tiujn ĉi proponoj.



KONGRESAJ AMUZAĴOJ

DIMANĈON vespere la gekongresistoj solenigis la Kongreson per vespermanĝo kiu okazis en la «Hotel d'Espanya».

Nokte ili estis invititaj ĉeesti en literatura festo organizita de niaj sabadell' aj samideanoj je ilia honoro, kiun prezidis nia nova komitatano Sro. Delclòs.

La vastan salonon de la «Ateneu de Sabadell», kie okazis la festo, plenigis la geesperantistoj, kiuj aŭskultis la partoprenintojn. Sro. Dalmau faris apologion de Esperanto, komentariante samtempe la aldiraĵojn de niaj kontraŭuloj kun pravaj kaj konvinkigaj argumentoj.

Sro. Albiñana, per originala poezio *Deliro de studento*, prezentis belan verketon en kiu studento miksas kaj konfuzas la klarigojn en ekzameno, pro kio li atingas malsukceson. La subtileco kaj bonhumoro de tiu poezio ridigis kaj amuzis ĉiujn.

La sabadell'a samideano, la romantikulo — la de la fatalo ekbatita amiko J. Altura Pujada, tiu junulo kiu antaŭ longe baraktas sin kontraŭ tia malbona sorto, kaj kiu malgraŭ sia volo fariĝis okaza skeptikulo, ankaŭ partoprenis per originala verko *La Dona i l'Esperanto* kiun legis lia amiko J. Torra. Lia prozaĵo estas, laŭ nia aljuĝo, la unua ekrido kiun la amiko faras al sia jus entreprenita nova vivo; ĉar ja estas nova kaj alloganta vivo por koro poeta la atingo de amanta fianĉino kiu estas ĝentileco kaj subtileco: la atingo de dorlotema estaĵo kiu scios, ni ne pridubas tion, gajigi kaj ĝojigi la ekzistadon de nia agema amiko, kiun la fatalo grizigis antaŭtempe lian junecon. La de li disvolvita revo ŝajnas himno al virinoj, ŝajnas la dankesprimado al tiu fraŭlino kiu sciis doni al li esperon kaj kuraĝon, kiu sciis forgesigi al li la de li suferitan pasinton. Ke ĝi estu por lia bono!

Nia redaktoro Sr. Martí volis ankaŭ-li la fama flirtanto de la belo,

de ridoj kaj virinoj — festi en tiu nokto la virinoj kaj veki en la koro de la fraŭloj — eĉ eble en sia propra koro — la senton al amo. Kaj por tion atingi li legis *Leteron de amo*, tradukita prozaĵo elĉerpita en la libro *Romantics d'ara* de la kataluna verkisto Enric de Fuentes. Ĉu li trafis? Espereble: ĉe la fino, sur la vizaĝoj de ĉiuj gefraŭloj estis ekrideto de aprobo, eĉ sur tiu de la ironia kamarado Martí.

Poste samideano Ll. Coll, el Manlleu, legis poezion el *Krestomatio*



FELKAJ KONGRESANOJ KAJ SABADELLAJ ESPERANTISTOJ EN LA ARBARO
«CAN FEC»

kaj originalan tradukaĵon, per kiu nia malnova Manlleu'ano montris sian lertecon traduki.

Sro. Pujol, la simpatia samideano ĵus elektita Sekretarion, tiu fraŭlo kies partoprenado en la Kongresaj kunsidoj esperigas al ni ageman kunhelpadon kaj laboradon, improvizis paroladeton per kiu li dankis al kongresistoj sian elekton.

Fine, la festo-prezidanto Sro. Delclòs, dankis al alestantoj ilian ĉeestadon, kaj sciigante ke la Sabadell'anoj regalos ilin per *lunch*.

La festo finiĝis per dancado, en kiu ne mankis *La Rondo*. Kaj estas komprenebla ke la festo finiĝus tiel, pro tio ke la plej multoj

estas gefraŭloj, kaj la simpatio reciproka multan fojon postulas esti esprimata apud orele. Niaj fraŭloj ja estas ĝentilaj, kaj malgraŭ ili ne estas tiel lertaj ĝentijuloj kiel spertaj esperantistoj, ili klopodis por ke la festo estus estinta festo de gajeco, kaj ho ve! himno al Amo; sed ne al Amo: al amindumado, kiu ja estas ŝatata de la gefraŭloj, sed, ne havas tiom da adeptoj. tiel fervoraj Je la 1^a matene ĉiuj dissiĝis.

Kiel postkongresan ekskurson oni organizis ekskurson al kamparo en kiu partoprenis la gekongresistoj multenombre. Malgraŭ la postagmezo ne estis tiel ridema kaj gaja kiel estis estinta la mateno, malgraŭ la suno lumis tra nebulo, kaj la finiĝo de l'tago iom griziĝis, tamen ĝi ne influis en la promenantoj, kaj la gajeco estis nia devizo. Kaj tia devizo ne estis kiel devigata aŭ altrudita al ni afero, sed tute simpla naŭva gajeco kiun al ni liveris la plenumita kun sukceso tasko, — tio ja influis sur nin — kaj nia natura ĝojo, ĉar la geekskursantoj estis ĉiuj junaj. Kaj vi ja scias ke en aro de gejunuloj seriozaj nur sufiĉas unu sola gaja karaktero por sukcesi gajigi la ceterajn ŝajne mistikulojn kaj por foririgi la seriozecon kaj fariĝi ĉiuj ardanta ĝojo.

Estis interesa kaj samtempe alloganta vidaĵo tiu, kiu aperis kontraŭ niaj okuloj de observemulo, kiam ĉe la kamparo sen antaŭa konveno, ĉiuj la gesamideanoj kuniĝas iom post iom laŭ la karakterinklino aŭ pensomanieroj, aŭ tute simple laŭ simpatio! Pli ol unu mi vidis, kiu kvazaŭ flirtanta abelo elektanta la floron por suĉi, iris de unu al alia areto, elektis inter ĉiuj, por fine trovi sian taŭgan kamaradon inon, kaj estas ankoraŭ ĝojiga afero, rimarki kiel oni priparolis pri ĉio, kio koncernas al Esperanto ĉe ni, kiel oni priparolis pri ĉiuj punktoj indaj de rimarko de nia internacia lingvo, pri trafitaj tradukitaj vortoj, pri literaturo, pri ĉio, jen. Se la temo ne estus estinte tiel alloga, kiom bele silenti kaj aŭdi kaj aŭskulti nur! Sed multan fojon nia volo ne estas superreganta kaj la forto de la entuziasmo ĝin kontraŭstaras kaj venkas ĝin. Mi rimarkis — kaj ne estas la unuan fojon — ke la kamarado pro aspekto ne klera, nelerta, en kies okuloj la forto interna ne helas, subite vekigis kaj lia vekigo ŝajnas aŭroro por vi kiu lin juĝis male... Estas en tio sensacioj kiujn la koro tuje ilin kaptas por resenti ilin poste en la soleco, en la intima ĉambro de hejmo. Sed estas alia plej intima ĝojo kiam en karaktero humila, en simpatia vizaĝo oni vidas okulojn humanajn, montrantajn ne vulgaran klercon, kaj oni konstatas ke la de vi eltrovitan kecojn estas realaj. Ĉion tion ĉi mi elpruvis en tiu-ĉi ekskurso, krom la akiron de novaj geamikoj. Kiam ree, mi sabadell' ano, laŭ kutime vizitos novan fojon la kvietaj, silentaj, majesta arbaro; kiam mi laŭ kutime iros sidi ĉe la rando de «el pla de l'Amor» (la ebenaĵo de

l'Amo) kontraŭ tiuj altegaj rektaj pinoj, ĉio ŝajngos al mi la postkongresan ekskurson: mi ree vidos la amikojn en ludo — kvazaŭ ili estus infanoj — mi ree vidos kiel gefraŭloj kolektiĝas sub kverkoj kaj senorde sidas sur la de la folioj tapiŝita planko, mi ree aŭdos la spritaĵojn de ĉiuj, kaj sen ia dubo la bloveto similos al mi la paroladojn de estaĵoj kiujn mi amas, kaj sen ia dubo la bloveto ŝajngos al mi kanzonon: la kanzono de la feliĉo. Kak kiel mi sciigis de estimata poeto, mi ree iros sur tiuj vojoj kiuj vidis min feliĉa, por ke la sur vojrandojn falinta feliĉo ree min feliĉigus...

La adiaŭo alvenis, kompreneble: mi sentis nenian bedaŭron pro la disiĝo, pro tio ke la «ĝis la venonta Kongreso en Tarragona» restis ĉe mi kiel espero. Kaj tiu ĉi espero ŝajngas al mi, ke la dua Kongreso okazos morgaŭ mem, sed en morgaŭo tute proksima, en morgaŭo kiu ne estos paco kaj kvieto, sed alsopiro kaj laboro.



TRI KOMUNIKAĴOJ

Majstro Zamenhof post la apero de K. E. salutis al ni per tiu ĉi varmaj vortoj.

«Karaj Sinjoroj! La du unuajn numerojn de la KATALUNA ESPERANTISTO mi ricevis, kaj mi dankas; al la Federacio kaj al ĝia organo, mi deziras la plej bonan prosperadon. Via, *Zamenhof.*»

Jen la respondo al la telegramo kiun ni sendis je la nomo de la Kongreso:

«La Unuan Kongreson de Katalunaj Esperantistoj mi kore dankas la saluto, kiun ĝi sendis al mi. Via, *Zamenhof.*»

ALCALDIA CONSTITUCIONAL DE TARRAGONA.

Ĉar oni esprimis al tiu ĉi Urbertraro la deziron okazigi en nia urbo la proksiman Esperantistan Kongreson, mi havas la honoron prezenti al vi nian moralan kaj materialan kunhelpadon, kiujn estos je la atingo de nia Urbeŝtaro, en la kazo ke vi elektu nian urbon.

D. g. al V. m. j.

Tarragonon la 14^{an} Majon 1910^a

La Urbestro,

Pedro Cobos.

Sro. Prezidanto de la Kongreso de «K. E. F.» en Sabadell.

BALADO

Katalune verkis, J. López Picó.

Estis en la ekkomenco...

Ombro de la Nokto estis memfida bruna belulino. Vizaĝe ĉielen, kun la malligitaj haroj akvofale falantaj sur la malkovritaj ŝultroj, ŝi viglis la iradon de la steloj.

Kaj en la sereneco de ŝiaj okuloj veturis la astroj, kvazaŭ en firmamento de duondormo. Ombro de la Nokto, per etenditaj brakoj benis la ripozon de la mondo.

Ĉe la mondo ĉio floris.

La Vento estis amema kaj ĝentila fraŭlo. Li ŝatis ludojn kaj ŝatis spritaĵojn pri amindumado. Li sciis pri la mistero de la arbaro kaj la ensorĉado de la supromontoj. Li konis de la maro la tuta malavaran vastecon.

Li estis parfumita de la bonodoro de malproksimaj landoj.

En la sereneco de la ripozo la Vento kantis.

La Ombro enamiĝis je tiu kanto. Ŝi iĝis floro de deziro meze de la nokto.

Kaj la Vento svenis ĉe ŝiaj brakoj, ĉar li estis malsperta en aferoj pri amo.

...Diris la Vento sidanta ĉe la piedoj de la multe amata: «— Mi parfumos viajn harojn per la bonodoro de la arbaroj; mi faros vian dormadon malpeza per la kanto de la marondoj, mi ornamas por vi liton per la floroj de ĉiuj ĝardenoj»...

Kaj la Ombro respondis: «— Mi donos al vi la stelojn; mi donos al vi la pacon...»

La Ombro de la Nokto kaj la Vento sin kisis...

...Poste, ilia aminterparolado daŭris ankoraŭ...

— Ni havos filon kiu estos amo kaj lumo: mi lin enkondukos rigardi la taglumon kaj mi montros al li la limojn de la tero...

Li estos superreganto sur ĝi.

— Ni havos filon kiu estos ĝentileco. Mi restigos lin kun mi kaj mi volos lin lernigi kalkuli la astrojn... Kaj mi aŭskultigos al li

la malpezan spiron de la tero, kaj la ritmon de la vivo, kaj la plaŭdon de la akvo kunportanta freŝecojn kaj revojn, kaj la festojn de la kreitaĵoj en la mallumo.

La dezirata filo ne naskiĝis. Estis pala filino bruna kaj malsprita. Ŝia patro, la Vento, vidis ŝin nur unu fojon... Poste li foriris ŝin forlasante.

Ombro de la Nokto kisis sur la frunteto ŝian filinon kaj ankaŭ forlasis ŝin.

De post tiam, la Vento iĝis furioza kaj kruela. Li ĉion vipas kaj forkuras tra la mondo en dolora frenezeco. Krie li vokas sian perditan amantinon.

Ombro de la Nokto estas suspektama kaj perfida, malvarma kiel sinkso.

En la fundo de ŝiaj malhelaj okuloj nuboj kaj teruraj fumamasoj disiĝas. Ŝi etendas la brakon kaj palpas en la malplenecon.

La malpleneco al ŝi ŝajnigas amatan figuraĵon.

La astroj akceptis kiel fratinon la palan filinon brunan.

En la kvieteco de la nokto ĉio kantas...

Kaj tiel estas la kanzono:

La palbruna luno
en funebra vest'
ŝin vokas la panjo
ŝin volas la patr'.

Esperantigis
XAVIER SIMÓ



LA SESA KONGRESO EN WASHINGTON

ALVOKO!

14-20^{an} de Aŭgusto 1910

POR plene montri la utilecon de Esperanto en la Internaciaj Kongresoj estas necese, ke kiel eble plej multe diversaj nacioj kaj lokoj estu reprezentataj. Ni devas montri, ke kongresanoj el ĉiuj partoj de la mondo povas facile interparoli kaj interkompreniĝi sole per la Internacia Lingvo.

En la Sesa Kongreso estos ankoraŭ pli necese, ke Esperantisto ĉeestu el kiel eble plej multe diversaj nacioj de Eŭropo, Azio kaj Suda Ameriko, ankaŭ el Kanado, Meksiko, kaj ĉiu ŝtato en Usono. Tio estas superege dezirinda en la Usona Kongreso, ĉar kvankam oni diversloke en Usono uzas ĉiun Eŭropan lingvon krom la angla, oni faras ĉion kaj veturas ĉien en nia vasta lando, uzante nur la anglan lingvon. Tial la Usona publiko ne tiel profunde sentis la bezonon por internacia komunikilo kaj ĝis nun ne devis akcepti Esperanton tiel ĝenerale, kiel ĝi estas jam akceptita en multlingvaj regionoj.

Tial ni petas la Esperantistojn en ĉiu lando, regiono kaj urbo de la mondo, ke ili estu representataj de almenaŭ unu kongresano ĉe la venonta Kongreso. Ni proponas, ke ĉiu Esperantisto, kiu ne povas mem ĉeesti la Kongreson, donu iomete da monhelpo al iu elektita Esperantisto en sia urbo aŭ regiono, kiu havos la libertempon por veni, kaj kiu volonte venos por reprezenti siajn najbarojn ĉe la Kongreso, denonte al ili formalan raporton, se nur ili ĉiuj iom helpos lin pri la elspezoj de la vojaĝo kaj de la loĝado en la Kongresourbo.

Tuj grupigu vin, kaj elektu iun, kiu estos via reprezentato, kaj kies elspezojn vi prenos almenaŭ parte sur vin. Momoru, ke la Sesa Kongreso okazos en iu el la ĉefurboj de la mondo antaŭ la okuloj de la registaro de Usono kaj de la ambasadoroj de la aliaj nacioj de la mondo. Se ni faras bonan impreson sur ĉi tiun registaron kaj la ambasadorojn, tio multege helpos al la Esperantista Afero. Se la Usona Registaro vidos klare, ke Esperanto estas taŭga kaj praktika, kaj ke ĝi komencu mem uzi Esperanton, kiel oficialan internacian komunikilon, Estas grava devo de ĉiu Esperantisto en la mondo helpi en ĉi tio! Ĉu vi ne tuj komencu?

La Vojaĝo. — La Universala Esperantista Asocio afable konsentis aranĝi la detalojn de la vojaĝo de Eŭropo ĝis Nov-Jorko. Ĉiu, kiu intencas ĉeesti la Kongreson, sin turnu al tiu Asocio (8, *rue Bovy-Lysberg, Genevo, Svisujo*) por informo pri biletoj, kosto, k. t. p. Oni devus tuj fari tion, ĉar estas preskaŭ ĉiam necese aĉeti la ŝipbiletojn du aŭ tri monatojn antaŭ la foriro de la oceanŝipo. La veturado de Nov-Jorko ne kostos pli ol dek dolarojn (20 Sm.). Kredeble ni ricevos pli malgrandan prezon, se estos sufiĉe granda nombro da kongresanoj.

Loĝado. — La Organiza Komitatovolonte faros aranĝojn por la kongresanoj pri loĝado, k. t. p. La hotelo «Arlington», kiu estas rekte trans la parko Lafayette kaj tre proksime de la «Blanka Dom», estos la konstruaĵo, en kiu troviĝos la akceptejo k. t. p., kaj en kies grandaj haloj okazos kelkaj el la kunsidoj de la Sesa. En ĉi tiu hotelo la specialaj prezoj al kongresanoj estos la jenaj:

Loĝado sen manĝada (nomita «European Plan»): Unu ĝis du dolaroj (du ĝis kvar spesmiloj) por unu tago por unupersona ĉambro; sama ĉambro kune kun banoĉambro, du ĝis tri doloroj (kvar ĝis ses spesmiloj) por unu tago.

Loĝado kun manĝado (nomita «American Plan»): Tri dolaroj (ses spesmiloj) por unu persono en unu ĉambro; kvin dolaroj (dek spesmiloj) por du personoj en unu ĉambro. Banoĉambro kostas unu dolaron (du spesmilojn) plu.

Kelkaj aliaj hoteloj donos pli malkaran prezon, sed ili ne estas tiel proksime de la kongresaj sidejoj. Sed la komitato povas aranĝi por loĝado kaj manĝado en bona hotelo po du dolaroj (kvar spesmiloj) por unutaga loĝado kaj manĝado.

Aldone, la komitato ankaŭ aranĝas por loĝado kaj manĝado en loĝejoj, pensioj, k. t. p. La komitato havos multajn ĉambrojn, bonajn kaj purajn, en sufiĉe bonaj lokoj, po kvar dolaroj (ok spesmiloj) por unu semajno, kaj ankaŭ unu aŭ kelkajn manĝejojn, kie oni ricevos bonajn manĝojn po kvin dolaroj semajne. Kompreneble oni povas loĝi ĉe la «Arlington», aŭ alia hotelo, kaj manĝi aliloke.

Skribu al la komitato, se vi volas antaŭaranĝi pri loĝado, kaj skribu klare kaj plene, kion vi deziras. La komitato penos plenumi viajn dezirojn. Adresu la Sekretarion, Sro. Edwin C. Reed, *Chamber of Commerce, Washington, D. C., Usono*.

Kartoj, Poŝkartoj, Kongresmarkoj. — La kongreskartoj, kiuj enlasos la posedanton en ĉiun oficialan kunsidon kaj feston de la Sesa estas nun aĉeteblaj ĉe la Sekretario, en Washington, kaj ankaŭ ĉe la *Centra Oficejo*, 51, *Rue de Clichy, Paris*. La prezo de ĉi tiuj kartoj estas kvin dolaroj (dek spesmiloj), el kiu la duono (kvin spesmiloj) estos redonata al ĉiu, kiu venos el alia kontinento ol Norda Ameriko.

La belaj kongresmarkoj estas nun aĉeteblaj po dudek kvin cendoj (duono da spesmilo) por cent markoj, afrankite. La serio de dek kvin poŝtkartoj, de Washington'aj vidindaĵoj (Esperante priskribitaj) kostas dudek kvin cendojn (duonon da spesmilo),

LA URBO WASHINGTON

Washington estas unu el la plej belaj urboj en la mondo, enhavante proksimume tricent mil loĝantojn, kaj estas fama pro sia pureco, larĝaj stratoj kaj aleoj, belegaj arboj, pitoreskaj parkoj, majestaj konstruaĵoj el marmoro kaj granito, multaj lokoj interesaj,

inter kiuj estas la Blanka Domo, kiu estas la loĝejo de la Usona Prezidanto; la Kapitulo, kie kunvenas la Usona Kongreso; la Biblioteko de Kongreso, la plej bela kaj granda en la mondo; la Monumento de Washington, 171 metrojn alta, kiu estas la plej alta masonaĵo en la mondo, kaj havas interne rapidan elevatoron, kiu portas la pasaĝerojn ĝis la alteco de 155 metroj; la Nacia Trezorejo kun ĝiaj grandaj kasejoj; belegajn konstruaĵojn de la registaraj departementoj; la Corcoran (korkoran) Artgalerio; la Smithsonian'a, Nacia, kaj Kuracarta Muzeoj; Botanikaj Ĝardenoj; Zoologia Parko, k. t. p. En ĉiujn ĉi la enirado estas senpaga.

Aŭgusto estas nomata en Washington la «Monato Turista», ĉar ordinare estas pli multe da vizitantoj ol en ĉiu alia sezono de la jaro. La vetero dum Aŭgusto estas modere varma, la vesperoj estas malvarmetaj kaj refreŝigaj. Estos multaj plezuroj, ekzemple, ekskursoj lunlumaj al la Grandaj Akvofaloj de la Potomac (potomak) Rivero, al Glen Echo (glen eko), al Chevy Chase (ĉevi ĉejs) Lago, k. t. p. kaj veturadoj laŭ la bela Potomac Rivero per boatoj provizitaj je muziko, dancado, manĝetoj, kaj aliaj amuzadoj por la pasaĝeroj.

Ekskursoj estos aranĝitaj al Mount Vernon (maŭnt vernon), la originala domo kaj tombo de George Washington, kie oni povas vidi la meblaron, k. t. p., kiun li uzis dum sia vivo, ĝuste kiel ili estis antaŭ cent kvindek jaroj; al Arlington Cemetery; al Chesapeake Beach (ĉesapik biĉ), Cabin John Bridge (kabin ĝon briĝ), kiu estas la plej longa ŝtonarko en la mondo, Alexandria (alekzandria), la Nacia Hejmo por maljunaj soldatoj, Militŝipa Haveno, k. t. p. Je distanco de unu horo de Washington estas bonega salakva banado.

LA LITERATURA KONKURSO

KONDIĈOJ

1. Ĉiu verko devas esti originala. Nenia traduko estos akceptita.
2. Neniu manuskripto estos akceptita por pli ol unu konkurso.
3. Neniu manuskripto estos akceptita se ĝi jam estas plene aŭ parte publikigita antaŭ la disdonado de la premioj.
4. Se laŭ la opinio de la juĝantaro neniu sufiĉe bona manuskripto estas ricevita por iu konkurso, la juĝantaro havos la rajton malakcepti ĉiun manuskripton kaj ne doni la premion. Ili redonos tiun premion al la donacinto.
5. Ĉiu premiita verko apartenos al la donacinto de la premio,

dum unu jaro post la Sesa Kongreso, se la donacinto ne alie anoncas. Se la donacinto ne publikigis ĝin antaŭ la fino de tiu jaro, la verko tiam apartenas al la aŭtoro, kaj ne plu al la donacinto.

6. Post la Konkurso, la nepremiitaj manuskriptoj estos resendataj al tiuj aŭtoroj, kiuj antaŭ la 1a de Oktobro, 1910, sendos la necesan monon por pagi la poŝtan elspezon.

7. La verkoj devas esti skritaj sur *unu flanko* de la papero. Manuskriptoj skribmaŝine skribitaj ricevos la plej zorgan konsideradon. La juĝantaro rajtos tute ignori nelegeblajn manuskriptojn.

8. Sur ĉiu manuskripto devos esti skribita, krom la titolo, nur iu elektita pseŭdonimo de la aŭtoro. Fermita koverto, en kiun la aŭtoro metos sian nomon kaj plenan adreson, kaj sur kiu estas skribita nur la titolo de la temo kaj la pseŭdonimo de la aŭtoro, devos akompani ĉiun manuskripton. Oni povos ankaŭ laŭvole meti la resendpagon en tiun koverton.

9. Ĉiu manuskripto devos esti ricevata de la Konkursa Komitato ĉe la Ĉambro de Komercio, Washington, D. C., Usono, antaŭ la 1a de Julio, 1910. La sola escepto estas, ke manuskriptoj de la «specialaj» juĝantoj (anstataŭ la Kongresa Juĝantaro) devos esti sendataj rekte al tiuj juĝantoj. Sed la koverto enhavanta la nomon kaj adreson devos esti samtempe sendata al la Konkursa Komitato en Washington.

10. La juĝado estos farita de la Kongresa Juĝantaro, kaj ankaŭ de «specialaj» juĝantoj. La Kongresa Juĝantaro konsistos el Esperantistoj zorge elektitaj de la Organiza Komitato, laŭ la propono de la Konkursa Komitato.

«Specialaj» juĝantoj estos tiuj Esperantistoj, kiujn eble la donacintoj de premioj por verkoj pri pli-malpli teknikaj temoj petos doni sian servon. Donacintoj, kiuj volas tiajn juĝantojn, devos antaŭe ricevi la konsenton de la dezirataj juĝantoj, kaj anonci tion al la Konkursa Komitato samtempe kun la temo kaj premio proponitaj. Se la temo kaj premio estas akceptitaj de la Konkursa Komitato, la speciala juĝanto (aŭ specialaj juĝantoj) estos akceptita, kaj ties decido estos plene aprokata de la komitato. La «specialaj» juĝantoj sendos al la komitato en Washington ĉiun ricevitan manuskripton kune kun la anonco pri sia decido.

11. La Konkursa Komitato donos la manuskriptojn al la Kongresa Juĝantaro, kolektos ilin, faros liston de decidoj, kune kun la decidoj de «specialaj» juĝantoj, kaj fine malfermos la kovertojn, kiuj enhavas la nomojn de la aŭtoroj, por fari ĉiun arangon pri la anoncado kaj la festo por la disdonado de premioj.

12 Neniu juĝanto partoprenos en konkurso por kiu li mem estos unu el la juĝantaro.

La Organiza Komitato proponas la jenajn temojn kaj medalojn al la premiitoj:

Universala Frateco.—Prozaĵo de 1,000-2,000 vortoj. Versaĵo de 20-50 linioj.

Rakonto (prozaĵo de 2,500-3,000 vortoj).

Rakonto (prozaĵo de 2,500-3,000 vortoj) verkita de junulo aŭ junulino inter la aĝoj de 15-20 jaroj.

La Simileco inter Zamenhof kaj Lincoln.—La verkoj de Zamenhof, lukse binditaj.

La Utileco de Esperanto por Blinduloj.—«Braille» libroj (speciala juĝanto, Prof. Cart, 33, Rue Lacépède, Parĭs, Francujo).

Traktato pri la Biblio.—Proponata de Ulysses G. B. Pierce, Pastro de la Usona Senato.—Libro de Sintezaj Lekcioj pri la Biblio, aranĝita de la pastro mem, kun antaŭparolo de Edward E. Hale, fama antaŭa Senatpastro. En la libron estas metita aŭtografletero de D-ro Hale.

La Utileco de Esperanto en la Komerco.—Proponata de la Washington a Ĉambro de Komerco.—Arta objekto je la valoro de dudek spesmiloj.



Oni ne devas admiri ĉe la homoj iliajn vestojn; nur iliajn bonajn morojn.



Ju pli malproksime de la malpura urbo loĝas la homoj, despli ili estas pli fortaj kaj pli liberaj.—*P. U.*



Estas pli elportebla la morton sen pensi pri ĝi, ol la pensado pri la morto estante sendaŭgere.—*El Pascal.*



Pli frue la vanteco trudas al ni agi kontraŭ nia volo, ol la prudento.

ENLANDA MOVADO

BARCELONA

La 24^{an} Aprilon lastpasintan, okazis mara ekskurso organizita de la societo «Espero Kataluna».

Ĉirkaŭ 200 gesamideanoj enŝipigis en *Golondrina* (nomo de la ŝipo) kies posedanto Sro. Anglada, nia kara samideano, bonvolis donace meti ĝin sub la Esperantistara dispoŝo dum la mateno de la dirita tago; tial ni dankas tium malavaran samideanon.

Kun esperantaj flagoj, turnigante ĉies atenton al ni, ni pasigis tre agrablan matenon, interbabilante pri ĉiaspecaj aferoj, ĉar en tiu gaja kunveno kune troviĝis belaj fraŭlinoj, fraŭloj, gemaljunuloj, k. t. p.

La laborema esperantista grupo «Semo» de Ateneu Enciclopedic Popular organizis esperantgazetara ekspozicio, kies inaŭguracion oni okazigis la 7^{an} de la ĵuspasinta Majo per plaĉa koncerto farita de kvinteto, kies anoj estas la junuloj Sroj. Solsona, Baell, Ametlla, Mullor kaj Escofet, kiuj aplaŭdinde ludis muzikaĵojn de Beethoven, Mozart, Bertini, Mendelsohn, Chopin kaj nia himno *La Espero*.

Por ke vi povu konsideri la gravecon de ĉi tiu ekspozicio, ni nur devas sciigi al vi ke ĝi konsistas el ducent tridek malsamaj esperantaj gazetoj, kion ni ŝuldas precipe al la malavareco de la kolektantoj Sroj. Bacardit kaj Amades.

La Esperantista grupo «Ĉiam Antaŭen», el Clot (Barcelona), organizis, la 10^{an} de Aprilo, frumatenan ekskurson tra Horta kaj Sant Ciprià.

Estis ĉirkaŭ tridek kvin geesperantistoj el «Ĉiam Antaŭen», «Espero Kataluna» kaj «Esperanta Frateco», kiu entuziasmigitaj praktikadis esperanton, sin amuzante.

«Espero Kataluna» inaŭguros en sia nova sidejo (Tallers, 81, pral.) sep kursojn de Esperanto, por viroj kaj por virinoj.

La grupo «Barcelona» ankaŭ malfermis du novajn kursojn.

La grupo «Kvinpinta Stelo» elektis por la nuna jaro la jenan komitaton: *Honora Prezidanto*, Dro. Zamenhof; *Prezidanto*, Sro. M. de la Fuente; *Vic-prezidanto*, Sro. E. Budi; *Sekretario*, Sro. J. Llorach; *Vic-sekretario*, Sro. D. Viger; *Kasisto*, Sro. J. Valero; *Kalkulisto*, Sro. C. Pipó; *Bibliotekisto*, Sro. J. Escandell; *Voĉdonantoj*, Sroj. J. Agell, S. Puig, B. Asencio kaj P. Corba.

Esperantistaj Vendredoj. — Grupo esperantista de «Ateneu Enciclopedic Popular».

Plezure mi akceptas la taskon raporti al la K. E. la laboron de la Esperantistaj Vendredoj; tio kion mi neniam akceptos, estas la neĝustaj frazoj, kiujn Sro. Dalmau direktis al mi en tiuj ĉi paĝoj, pro tio ke mi ne raportos pli bone ol li.

1^{an} de Aprilo: interdiskutado. Temo: «Ĉu la Esperantistoj devas partopreni en la Barcelonaj Majaj festoj?»

Interesa polemiko, en kiu partoprenis Sroj. Pujulà, Dalmau, Bacardit, González, k. t. p.

La ĉefa konkludo estas la neceseco ke la Esperantistoj zorgu la eldonigon da Esperantaj programoj dum venontaj festoj.

8^{an} de Aprilo. Antaŭ amaso de geesperantistoj kiuj okupis tute nian grandan salonon, Sino. H. de Chalmot, faris tre belan paroladon. Duonŝerco kaj serioze, ŝi rakontis al ni, serion da amuzajoj, kaj okazintaĵoj, ĉiam nepraj dum longaj vojaĝoj, kiel en la karavano de la «U. E. A.» al la V^a Kongreso, temo de tiu ĉi parolado.

Ŝi ankaŭ pentris al ni, per tre belaj frazoj, la ĉarman fratecon, la armonion, kaj entuziasmojn, kiujn neniam mankas inter la diverslandaj esperantistoj, tuj kiam sin trovas kunigitaj por plej kreskigi Esperanton.

15^{an} kaj 22^{an} de Aprilo: interdiskutadoj. Temo: «La plej efikaj rimedoj por la propagando de Esperanto en Barcelono.»

En tiuj ĉi Esperantistaj Vendredoj, okazis gravaj diskutoj. Oni pritraktis la «Esperantista Barcelona Societo». Ĝia zorganta komitato aŭdis, dum tiaj kunsidoj kuraĝigajn konsilojn, kaj aprobajn parolojn, al ilia ideo.

Partoprenis Sroj. Urbez, Dalmau, Pellicer, Bacardit, González, Bermudes, k. t. p.

La 29^{an} Aprilon okazis interesa konferenco de Sro. Dalmau, pri la Federacio.

La graveco de tia temo, pro tio ke estis la unua fojo kiam oni parolis pri la «K. E. F.» publike kaj ĝenerale, altiris ĉe nia grupo, malgraŭ la pluvema nokto multajn samideanojn.

Sro. Dalmau religie aŭskultita, klarigis per facilaj kaj konvinkigaj argumentoj la celon, kaj la laborojn de «K. E. F.», kaj rimarkis la necesecon de unuiĝo inter la katalunaj Esperantistoj por atingi en nia lando la plenan sukceson de nia sankta afero.

Se ni povas kalkuli la simpatiojn de la Federacio, ĉe Barcelono, per tiu ĉi Esperantista Vendredo, ni povas certigi servertime ke la plej brilanta sukceso kronigos la klopodojn de la Barcelona Delegito. — A. B.

TERRASSA

Celante enkonduki Esperanton ĉe la infanaro, por konkeri la morgaŭulojn en la vicoj de la militanta Esperantismo, «Lumon» decidis krei

grupeton por infanoj kies sciigo mi jam raportis en la pasinta numero, kaj kies inaŭguracia festo okazis la 1^{an} de la Maja monato ĉe la salono de la «Joveniut Catolica» de tiu ĉi urbo.

Sro. Cases sendis leteron bedaŭrante sian neĉeeston. Sroj. Pujulà kaj Terricabras, sendis kuraĝigajn leterojn, esprimante sian bondeziron por la ŝus naskiĝanta junulgrupeto.

Junuloj deklamis kelkajn tradukaĵojn jenmaniere: *En la nit*, katalune, J. Bertran; *La Rozeto*, kat.-esp., R. Rodó; *Mi rakontis*, kat.-esp., F. Ballbé; *La sankta graalo*, kat.-esp., D. Badiella; *La sangaj strekoj*, kat.-esp., S. Gotsens; *La Blindulineto*, kat.-esp., fraulineto R. Ortiz.

Samtempe partoprenis ĉi tiun feston: ano el «Aplec» de Sabadell, kiu trafe parolis pri *La pau i germanor universal, fi primordial de l'Esperantisme*.

Sro. Graells legis kelkajn pravajn amuzajn konsilojn dediĉitajn al la geinfanoj, kiujn li eltiris el la observado de la infanoj. «La Homaro atendas de vi — li diris — vian frukton; vi fruktos. Dume ĝoju, ridu, ĉar estas tempo por ridi kaj ĝoji; sed ne bedaŭru morgaŭ la kruelan, kaj veran vivadon, kiu aperos antaŭ vi, sin trudante minacega, terura, sed homa kaj pasia.»

Esperantiano, raportis detale pri Esperantismo kaj «U. E. A.»

Sro. Ferrer klarigis la nekompreneblan timon kiun havas la plimulto kiam kredas kontraŭbonon la interfratigado de malsamaj popoloj. Li certigis ke la civilizacio dum ĉiuepokoj devenis de la maro, sed malgraŭ la homoj obstine venkis la mardanĝerojn ili ne povis sin kompreni, ili parolis malsame; nun ni homoj el ĉiesflankoj de la mondo, nin komprenas dank'al Esperanto.

Fine, la aninoj de «Lumon» donacis standardeton al la novgrupeto «Esperantista Junularo» bele ornamita kaj zorge brodita. Sino. Sicart legis entuziasman saluton kaj donis ĝin al la Prezidanto de «E. J.». Sro. Jozefo Girona gratulis la esperantistinojn pro tiu multvalora donaco «kiu — li diris — estos nia orientstelo kiu montros al ni la veran vojon.» Ni tion esperas.

Finiĝis ĉi tiu ĉarma festo per nia himno *La Espero*. — LA DELEGITO.

REUS

La saĝa laboro de niaj bonvolaj samgrupanoj, ĉiutage multe progresas aliĝinte al nia grupo kelkaj novaj samideanoj.

Je la 30^a Aprilo la ĉi tiea societo «Centre de Lectura» fermis siajn kursojn, t. e., la kursoj de Esperanta, Franca kaj Angla lingvoj.

Pro tio oni organizis fratan tagmanĝon kiu okazis la pasintan dimanĉon en kampdomo de Nova Sem'ano, toastinte dum ĝi por la grandaj progresoj kiun faras la Zamenhofa lingvo en Katalunlando per la «Kataluna Esperantista Federacio». — LA DELEGITO.

MATARÓ

Jus fondita en tiu ĉi urbo la unua esperantista grupo sub la nomo «Stelo de Mataró», malfermiĝis kurso partoprenata de 30 gelernantoj. Je la dimanĉo 15^a de Majo iris tien delegitoj de la Societoj jenaj: de «Esperanto kaj Patrujo», Sro. Anglada; de «La Kvinpinta Stelo», Sro. Valero; kaj de «La Rondo», Sro. Bermúdez, kiuj estis afablege akceptitaj de la Mataró'anoj. La restejo de la supre citita grupo estas ĉe «Foment de la Sardana». La saman tagon okazis tre simpatia noktofestoj inaŭguracia en kiu oni diris diversajn propagandajn paroladojn kaj legis esperantajn poeziojn, kiujn estis varme aplaŭdataj de la multenombra ĉeestantaro; poste okazis dancado, en kiu «La Rondo» ludis la ĉefan rolon. Ni deziras plej plenan sukceson kaj grandajn progresojn je la tasko esperantigi tiun gravan lokon de nia lando.

IGUALADA

Jen la novaj komitatanoj de la grupo «Katolika Idealo» de tiu ĉi urbo kiu havas sian sidejon ĉe la societo «Centre Catolic Obrero».

Prezidanto, Sro. Bonaventura Rafegas; *Vic-prezidanto*, Sro. J. Serra Abadal; *Sekretario*, Sro. Gabriel Castellà; *Kasisto*, Sro. Ramon Miserachs; *Bibliotekisto*, Sro. Pere Botet.

La societanoj sekvas kun granda intereso la disvolviĝado de Esperanto, sed speciale de nia kara «K. E. F.». — G. C.

PALMA

Malgraŭ la el la ĵurnaloj eltirita novaĵo alvenos iom malfrue ĉe la samlandanoj, ni devas anonci ke en kataluna konkurso okazonta en Palma de Majorko, estas la jena temo proponita de la «Klubo Palma»: *L'Esperanto com a medi d'expressió de les noves idees*.

La konkurso kiu plej bone trafos estos premiata per artaĵo.

Oni devas sendi la manuskriptojn al Sro. Nicolau Dameto Cotoner, *Sekretario*, strato Samaritana, antaŭ la 10^a Junio.

Ni fidas ke niaj samideanoj ĝustatempe sciigis pri tiu ĉi konkurso kaj espereble la temo nek restos dezerta, nek sen trafi.



GAZETARO

Interŝange ni ricevis la jenajn gazetojn:

Rumana Esperantisto (oficiala organo de la «Rumana Esperantista Societo»): n^o 1, 2, 3, 4.

Mitteilungen, el Dresdeno: Januara, Februara, Marta kaj Aprila numeroj.

Nova Sento, el Bilbao (organo de la «Vaska Esperantistaro»): Aprilo.

La Londona Gazeto: Aprilo. (Organo de la Federacio de la Londonaj Grupoj Esperantistaj).

Pages Folles: 24^{an} Aprilon 1910^a. Administrejo, 92, rue Saint-Lazare, Paris.

Tiu-ĉi franca ĉiusemajna bonhumora gazeto ekmalfermas grandan konkurson de rebusojn en ses serioj por geesperantistoj.

La celo de tiuj konkursoj estas — laŭ la franca teksto — la jena:

«Ĉar Esperanto estas el ĉiuj pruvoj de internaciaj lingvoj ĝis nun aperintaj tiu, kiu pli da adeptoj varbis, ni juĝas utila liveri al esperantistaro okazon por sin kalkuli.

La elpruvo ne povus esti entreprenata de la specialistoj, pro tio, ke ĝi konservus la karakteron de scienco eksperimenteja elpruvo.

Estas elpruvo publika kinn ni entreprenas. Ni donas al ĝi la formon de rebusa konkurso. Kaj per kuraĝigi la seriojtojn, ni difinis serion da belaj premioj por la venkontoj. La turniro daŭros ses semajnoj (t. e. ĝuste ses numeroj de *Pages Folles*). Oni nur devaŝtrafi la rebuson apudestantan kaj tiujn, kiuj estos publikigitaj en la kvin sekvantaj numeroj post aperontaj. La hodiaŭa estas sentenca frazo, lom da studo kaj duonkonado de Esperanto sufiĉos por trafi ĝin. Ni senpartie konstatos la nombron de geesperantistoj kiuj estos partoprenintaj en la konkurso. Ni troe ne scios admoni la partianoj de la internacia lingvo tion entrepreni malgraŭ ili nur solvus unu el la proponitaj problemoj. Tio estos amuzado samtempe ol publika manifestado kiun ni organizas je ili. Ni diros, plie por fini, ke la problemoj estis verkitaĵ de unu el la plej famaj esperantistoj.

La premioj estas 50.»

Tiu-ĉi gazeto poste klarigas ke la legontoj de ĝi ne konantaj nian Zamenhofan lingvon ricevos afrankitan ŝlosilon, laŭ mendo.

Ni opinias ke tia gazeto trafis bonan rimedon por la vendado de ĝi, ĉar estas ne dubbla ke multaj gesamideanoj partoprenos en tiu ĉi konkurso. Ĝi ja estos taŭga propagando de nia lingvo, certe, sed estos ankaŭ tiu-ĉi gazeto kiu eltiros plej grandan profiton ol Esperanto. Tamen ni ne malaprovas tian konkurson: tute ne. Ĝi elmontras ke nia movado estas grava, kaj multenombraj niaj samideanoj, kaj plie, ke Esperanto perfekte taŭgas por la komerco-propagando.

Per tiu konkurso tute simple oni liveros al ni pruvon de ĝia komerc-utileco. Ni marŝas!

Sveda Esperantisto (oficiala organo de la «Sveda Esperantistaro»): Aprila numero.

Esperanto-Nouvelles (trimonata folio por propagando kaj informoj de Esperanto): Aprila numero.

La Propagandisto (trimonata propaganda folieto organo de la «Internacia Propagandejo Esperantista», de Londono): Marta numero.

Normanda Stelo (monata bulteno, organo de la «Esperantista Federacio de Normande»): Maja numero.

Lorena Stelo (monata gazeto, organo de la «Francorienta Esperantista Federacio»): Aprila numero.

Rumana Gazeto Esperantista (organo de la «Esperantistaj societoj el Rumanujo»): Maja numero.

La Suno Hispana. Direktoro: Sro. A. Jiménez Loira. Pintor López, 3, Valencia. Maja numero.

Ĉirkau la Mondo (monata gazeto, germane redaktita de Prof. Dr. Siegfried Lederer): Januara, Februara, Marta, Aprila kaj Maja numeroj.

Ruslanda Esperantisto (oficiala organo de la «Ruslanda Esperantista Ligo»): Marta numero.

Germana Esperantisto (monata gazeto por la vastigado de la lingvo Esperanto, kaj oficiala organo de la «Germana Esperanto-Asocio»): Januara, Februara, Marta, Aprila kaj Maja numeroj.

Gazeto Anda'uzia (esperanta monata revuo): Maja numero.

Semo (monata gazeto, eldonata de la grupo «Paco kaj Amo»): Maja numero.

Pola Esperantisto (monata organo de polaj esperantistoj): Januara, Februara kaj Marta numero.

Tutmonda Espero (monata revuo eldonata de la societo «Espero Kataluna»): Maja numero.

Al ĉiuj ni dankas pro ilia ĝentileco, kaj precipe al kiuj laŭdis nian modestan publikaĵon. Koran saluton kunbatalantoj!



OFICIALA PARTO

La Redaĉcio de K. E. prega a tots els federats que dispensin el retras en la sortida d'aquest número, puix a causa de l'agombolament de treball no ha pogut sortir amb l'acostumada puntualitat.

Reunits, els senyors nomenats per formar el Consell Directiu durant el curs 1910-11, en el domicili del Dr. D. J. Bremon Masgrau, després d'un

breu exordi de D. Joan Piferrer (administrador dintre 'l Comitè Provisional i reelegit per a formar part del nou) donant compte de l'estat i marxa de «K. E. F.», acordaren desempenyar els carrecs en la següent forma:

President, Dr. D. Bregon Magrau (Barcelona); *Viç-President*, D. J. Delclòs (Vic); *Secretari*, D. J. Pujol Montfort (Barcelona); *Caixer-Administrador*, D. J. Piferrer Rifa (Sabadell); *Comptador*, D. V. Alavedra (Terrassa).

Dits senyors immediatament prengueren els següents acords:

1.^a Donar les gracies a l'Ajuntament de Tarragona per son oferiment, i notificar-li l'acord del Congrés de celebrar el segon a Tarragona.

2.^a Notificar a tots els agrupaments esperantistes de Catalunya, la constitució del Comitè Directiu de «K. E. F.», i comunicar els nomenaments que's feren a Sabadell, an els respectius interessats.

3.^a Distribuir-se 'ls treballs del Comitè en forma que'n surti beneficiada la bona marxa de «K. E. F.» i sa propaganda, reunint-se per a aitals motius sempre que'l senyor President ho cregui convenient.

El Comitè saluda coralment a tots els esperantistes sens distinció, i espera dels que formen part de «K. E. F.» llur apoi moral i material per a assolir el grau d'esplendor a que es acreedora nostra institució.

A prec's d'alguns esperantistes socis de «K. E. F.», aquesta Administració posarà desde aquest número la nostra revista a la venda; emperò, tenint en compte que aquesta publicació es solament per als senyors socis, son preu serà 'l següent:

Tot federat que'n necessiti algun exemplar, a més del que se li envia, el podrà adquirir per 20 centims de pesseta; i, tot comprador no federat, mitjançant 40 centims.

A Barcelona, estarà encarregada la venda a la llibreria den J. Rosals (Porta-ferriça, 30); i, per a les demés poblacions, pot reclamar-se an els respectius delegats, o directament an aquesta administració.

Sens dubte 'ls nostres llegidors observaran que la qualitat del paper amb que's confecciona la nostra revista no es igual an els dels dos números anteriors.

Apart de que s'hi han posat cobertes, que portaran desde ara tots els números, ens hem vist obligats a canviar el paper, per l'excessiu pes que representava, lo que ens exigia una gran despesa en franqueig postal.

No obstant, creiem que tothom veurà amb gust la reforma introduïda.

La Redacció de K. E. prega a tots els delegats que tinguin la benvolença d'enviar les ressenyes del moviment esperantista de llurs localitats abans del dia 20 de cada mes, car després tot es agombolament de treball; i que 'ls originals siguin escrits sols d'una cara, i amb lletra intel·ligible.

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO □ OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
SENPAĜA POR LA ĜEFEDERACIANOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
12. strato Gracia. — SABADELL
BARCELONA-HISPANUJO

AVIZO: La Redakcio konservas al si la rajton korekti laŭ bezono la manuskriptojn. Neakceptitajn manuskriptojn oni ne resendas.

ENHAVO: Por la ne federaciaĵoj. — Flugadoj. — El Valencio: Esperanto Praktika. — Enketo. — Pri la kaj tiu. — Studkomisio pri ĉiulanda verkaro. — 1^a Kongreso de Universala Esperanto-Asocio. — Enlanda Movado. — Oficiala parto. — Korespondado.

POR LA NE FEDERACIANOJ

NI konstatas ke en plejmultaj landoj, la ĵus naskiĝintaj grupoj baldaŭe starigas «ĝeneralan societon» por plej efike propagandi kaj disvastigi la internacian lingvon, kaj la grupoj ĉiuj grandiĝas ĉirkaŭ la ĉefa societo kvazaŭ idoj ĉirkaŭ ilia patrino.

Ĉe ni, en Katalunlando, okazis tute malsame. Kaj ja estas interesindaj la diversaj kialoj, kiuj kaŭzis tian fakton. El ili ni nur intencas preparoli pri unu, pri tiu, kiu niaj kontraŭuloj juĝas la ĉefan.

Kaj tio ne estas fantaziaĵo. Ĉiuj, kiuj kun ni daŭrigis la klopodojn kaj entreprenojn por atingi la kreon de «K. E. F.» sciigis kiel ni mem, pri tiaj kialoj, kaj almenaŭ ilin povis suspekti ĉe iuj.

La ĉefa motivo de niaj kontraŭbatalantoj estas en tio, ke ni ne rajtas krei Federacion de geesperantistoj katalune parolantaj, pro unu gravega kaŭzo: pro tio, ke en la Hispana Ŝtato—kies Katalunlando estas parto—ekzistis jam de longe Societo kiu prenis sur sin celon similan al la nia. Vane ni kontraŭdiris ke Esperanto respektas kaj firmigas ĉiujn naturajn lingvojn; vane ni asertis ke Boulogna kongresa deklaro certigas nian rajton; vane ni citis ke, en aliaj Ŝtatoj similaj al la nia ekzistas ankaŭ prilingvaj societoj eĉ regionaj Federacioj; vane ni klarigis per ĉiuj konvinkigaj argumentoj niajn alsopirojn.

Spite ĉio kaj ĉiuj, niaj malmultenombraj kontraŭuloj ne konvinkigis kaj daŭrigis sian vojon kontraŭ ni.

Feliĉe antaŭ longe iuj komprenis la veron kaj la veran sencon de la cititaj tialoj, kaj ili kunigis ĝoje al ni. Niaflanke ni ilin akceptis kiel fratojn, kiel verajn samideanojn ne hontigantajn pro ilia iama malpravo. Ili sin montris bonaj, bonkoraj kaj pripensemaj, kaj estas tre laŭdinda la agado de tiuj, kiuj konfesas sian malpravecon kaj fakte elpravas esti erarintaj.

Nin kedu: nia akcepto ne estas tia: tio estas aliĝo, tute natura. Ni fidas tiom — iajn fojojn eĉ plie — al tiuj, kiuj konfesas sian erarecon kaj al ni alkuniĝas, kiom al tiuj, kiuj propramove, eĉ fojon senpripense, kunigas tuje, ĉar tiuj ĉi ne ĉiam estas konvinkigitaj aliĝuloj.

Ĉar ni opinias esti pravaj, ĉar ni kredas ke iam niaj estantaj kontraŭuloj konvinkigis, ni prenis sur nin la jenan devizon:

La kontraŭulojn, konvinkigi.

La indiferentulojn, alvarbi.

Al samcelanoj, saluton.

Al ĉiuj, respekton.

Kaj tiu ĉi estos nia ĉiama devizo, ĉar ni unike celas unuigi, kunigi: ni volas kunigi fortojn por ke la tutaĵo estu potenca kaj multepova. Kaj estas nia opinio ke la tempo kaj klopodoj de ni uzataj por kontraŭbatali por mallaŭdi sen ia fundamento aŭ grava intereso, samideanojn t. e. esperantistoj, taŭgos plej bone por alvarbi novsamcelanojn.

Ni difinas jene nian agadon: unue klopodi por la loka grupo: baldaŭposte por «K. E. F.» kaj fine por universalaj societoj aŭ por privataj celoj: t. e., laŭ natura ordo. Ni unue donu niajn entuziasmon kaj agemecon al la enlanda ĝenerala movado por igi ĝin plej forta kaj vasta kiel eble; la ceterajn entuziasmon kaj agemecon ni donu al internacia movado, kiu ja ankaŭ ilin bezonas. Vi rimarku ke ju pli enradikiĝos la Esperanta sento en nia lando, ju pli ni fortikiĝos Esperantismon ĉe ni, des pli forta kaj vasta kreskos kaj enradikiĝos la universalaj kaj privataj celoj. Kaj estos aberacio kredi ke ni intencas nei nian kunhelpon al tiuj ĉi lastaj entreprenoj. Male; ni konsideras utilan ilian ekzistadon kaj celon, kaj ni devas ilin kunhelpi laŭ la apartaj inklinoj aŭ sentoj. Kiu povas po unu doni, tiu ĝin donu: kiu povas doni po cent, tiu ĝin donu: kiu povas kunhelpi krom la enlandan movadon la eksterlandan tiu ĝin kunhelpu. Sed tiu esperantisto kiu unike povas kunhelpi la enlandan ne decas kunhelpi la alilandan malgraŭ ĝi estu internacia.

Ĉu pro egoismo? Tute ne, samideanoj, sed pro natura sento. La

kunhelpo liverita al neenlanda societo helpos malmultege la enlandan movadon, kaj konsekvence malrapidigos la alvarbadon de novaj samideanoj; sed ja utilos por la difinita celo la kunhelpado al la enlanda societo.

Se ĉiuj katalunoj estus antaŭ nune same opiniante, kredeble nia «K. E. F.» estus efektiviĝinte antaŭ multe, kaj ĝi estus plej prospera. Ni sciu ĝin kompreni!



FLUGADOJ

KIEL eble plej baldaŭ mi superflugas pro laceco de homaj aferoj. Des pli bone, se mi aerflugante altegen, flirtante horizonton povus suĉeti ambrozion de ripozo. Ĉiam ripozas mi, kiam ludas kun kamparaj feinoj, per mia forteco pli ol per la vento, ĉifitaj malkviete, siaj senkolornubaj ventajoj.

Mi honte agus tiel, se miaj manoj maldiskrete tuŝus mortantan virgulinon.

Kompreneble, la feinoj disvolviĝas tiel facile! Siaj iluziaj korpoj nenial sangadultiĝas nur kuraĝas mi, ŝteli plenmanon da blondaj haroj por montri al naivulino, pruvon de feina ekzisto.

Ĝis mi la babilado de ĉiuj esperantistoj el diversnaciaj, alvenas tro varma de entuziasmo, kaj mia enspiro tiamaniere tro malfacile min devigas pli alten reflugi.....

Nedisiĝanta birdaro, kies trudema krio bruetas miajn orelojn, skuas mian tro lacan penson, kvazaŭ mi forvaloru ilian gravan kvaliton, bekbatas kaj ŝiras mian spiriton, ameme allogante min al kuseno de ĝia belega plumaro, dolĉa lanugo.

Tiamaniere oni min gvidas ĝis altaĵeto, la altaĵeto kien la naivulo X. de Maistre supreniris iun tagon kune kun aminda Rozalio. En ĝi nun, mi rigardas belan Vik'aninon, Margarido'n Orriols, novan edzinon de nia Johano Cunill kasisto el *Vika Esperantistaro*.

Je verda helega naturo, miriĝas la geedzoj; ĝis ama drinkado reciproke ili amuziĝas.

Dume, aperante la kvinpinta stelo super iliaj kapoj, en iliajn vizaĝojn resendas feliĉegon de senmakula espero.

Via dinamiko estas amo, nur amo pura, viva, ne interesa amo.

F. SURROCA

Transcendemulo? 3-9.

EL VALENCIOESPERANTO PRAKTIKA

ESPERANTOLERNADO - AMKORESPONDADO - GEEDZIĜO

I

ANTAŭ du jaroj Sinjoro Emilio Baez estis nia kunlernanto kaj kungrupano ĉe la Valencia Grupo Esperantista. Li, same kiel ĉiuj preskaŭaj esperantistoj, ankoraŭ lernante nian sukcesplenan lingvon, komencis la multpraktikan korespondadon esperantan ĉiulanden per poŝtkartoj. Inter siaj gekorespondantoj, li ĉiam, de la komenco, plejaj-tentis lertan belganinon nomatan Blanche Guillier. Ĉiam en liaj oreloj sonis tiu nomo; ĉiam antaŭ liaj okuloj elsaltis ŝia portreto. Sendube ĉe la belganino ankaŭ okazis same rilate al li, ĉar post kelkdeko da interŝanĝitaj poŝtkartoj

*Ekamis la konato**Kaj reciproke ŝi...*

II

En Februaro de 1909, li veturis Bruselon, urbo de la fianĉino, kien li alvenis, ĉiam gvidata kaj helpata de la *esperplena verda stelo*, kiu neniam forlasas.

Dum la vojo li estis ĝoje kaj bonvene akceptata kaj helpata de la gesamideanoj, kiujn li renkontis traveture.

En Bruselo oni lin akceptas per malfermitaj brakoj en la stacidomo.

*...Kaj niaj geamatoj**Jam estas kor' ĉe kor'*

III

De tiam li loĝas en Bruselo

*Kaj per solena beno**De l'pastro ĉe la Fin'*

La pasintan 2^{an} de Aprilo 1910^a, la lerta brusela esperantistino Blanche Guillier kaj nia iama valencia kungrupano Sinjoro Emilio

Baez geedziĝis meze de ĝenerala ĝojo, bondeziroj kaj laŭdoj al Esperanto nura komprenigilo por tiu transcenda fakto de la homa vivo, kaj de tiam

*En ĉarma harmonio
Ekvivas edz'edzin'
Najbaroj kun envio
Rigardas lin kaj ŝin.*

Nian gratulon al novaj geedziĝintoj!

Vi, karaj geedzamikoj, ne forgesu nin, kaj se ankoraŭ restas en la mondo iu, kiu dubas pri la praktika eco de Esperanto prezentu Vin antaŭ lin!

NOVEJARQUE (ANGELO)

Valencio, Majo 1910.



ENKETO

EN Maja numero de KATALUNA ESPERANTISTO, nia samideano Sro. D. Dalmau malfermas enketon invitante al ĉiu esprimi lian opinion pri tiu gramatika temo: «Diferenco (gramatika) inter artikolo kaj adjektivo». Mi bonvole partoprenos en la diskutado pri ĝi, kunlaborante per mia modesta opinio al ĝia klarigado.

Antaŭ ĉio, nepran rimarkon: laŭ opinio de Sro. Dalmau, artikolo estas gramatike samvalora ol adjektivo kaj por elpruvi tiun samecon li anstataŭigas la artikolon en la frazo «La homo kiu estas tie» per la montra pronomo «tiu» la frazo restante samsenca. Tial do, por bone kaj pli klare pritrakti tiun aferon mi konsideros du parte onigita la temon, tiel: 1.^a Diferenco inter artikolo kaj adjektivo; 2.^a Anstataŭebleco inter artikolo kaj montra pronomo.

Diferenco inter artikolo kaj adjektivo. — Kontraŭe al la opinio de la iniciinto de tiu ĉi diskutado, al mi ŝajnas tre malsamaj la artikolo kaj la adjektivo: adjektivo kvalitas la substantivon; artikolo difinas ĝin; tiu esprimas kondiĉojn, cirkonstancojn kiuj kunestas kun la substantivo; tiu ĉi montras nur rilaton inter ĝi kaj la persono al kiu ni parolas. Se ia ajn substantivo perdas kvaliton aŭ atingas ian novan, nepre tiu substantivo suferis ŝanĝon, sed tiu sama substantivo povas esti difinita aŭ nedifinita nenion ŝanĝante en ĝi, ĉar tiu ĉi cirkonstanco estas tute sendependa de ĝia esenco (substantivo) kaj de ĝiaj kvalitoj (adjektivoj) nur dependante de la persono al kiu ni pri ĝi parolas. Kon-

klude: la ideo esprimita de adjektivo estas *objektiva* kaj tiu esprimita de artikolo estas *subjektiva*: estas do grava diferenco inter ili.

Anstataŭebleco inter artikolo kaj montra pronomo.—Se oni uzas artikolon por difini, por montri la substantivon, kaj la montra pronomo taŭgas al tio sama, kompreneble ili estos kelkajn fojojn anstataŭeblaj; tamen ekzistas inter ili ia diferenco.

Artikolo nur difinas substantivon; montra pronomo krom difini ĝin pli precize ankaŭ reprezentas ĝin. Tial, ia ajn montra pronomo valoras substantivon difinitan de artikolo kaj estas ĝenerale uzata por eviti ripetado de vortoj, ekzemple: «La birdoj estis sur arbo, *tiuj* kiuj forflugis, sin savis, la aliaj estis mortigitaj» la montra pronomo *tiuj* same valoras ol la difinita substantivo *la birdoj* kaj ĝin reprezentas en la dua parto de l' frazo; neniam estas eble forigi substantivon kaj lasi nur artikolon ĉar tiu ĉi sola nenion signifas.

Kelkajn fojojn oni uzas montran pronomon difinante substantivon, ĉar tiu ĉi estas pli konkrete difinita de kondiĉoj antaŭe esprimitaj kaj nesufiĉe montreblaj per artikolo, ekzemple: «Ekzistas personoj kiuj ĉiam estas gajaj kaj scias gajigi la aliajn per sia simpatia babildado, *tiuj* personoj plaĉas al mi.» En tiu ĉi frazo la montra pronomo *tiuj* (difinanta la substantivon *personoj*) enhavas la signifon: *pri kiuj mi antaŭe parolis*, neesprimebla per simpla artikolo. Sed se tiu aŭ tiuj kondiĉoj estas esprimotaj tuj post la substantivo, en tiu ĉi okazo oni povas uzi ĉu montran pronomon ĉu artikolon, ekzemple: «*tiuj* personoj, kiuj ĉiam estas gajaj k. t. p. plaĉas al mi» aŭ «*la* personoj kiuj ĉiam k. t. p. plaĉas al mi». En tiu ĉi frazo kiel en la ekzemplo de Sro. Dalmau (kiu plenumas la antaŭdiritan kondiĉon) artikolo kaj montra pronomo estas anstataŭeblaj.

Jen mia opinio pri tiu interesa gramatika afero; mi tre deziras vidi opiniojn de aliaj samideanoj kaj precipe respondon de Sro. Dalmau, en la espero ke tiu ĉi enketo atingos la maloftan finon de interkonsento inter ĉiuj la partoprenantoj.

Sabadell'

A. LAGARRIGA



★ ★ ★

PRI LA KAJ TIU

EN la maja numero de KATALUNA ESPERANTISTO mi legis enketon pri tiu afero, kaj kredante ke mi povus diri ion pri tio, mi sendas ĉi tiujn liniojn.

Al vi, Sro. Dalmau, de tiu momento respektinda amiko, mi petas bonvolecon, kaj ankaŭ al ĉiuj legantoj.

—*Artikolo.* Katalune artikolo faras la sekvantajn servojn: montras substantivon, determinas, aŭ nedeterminas ĝin, montras ĝian sekson, kaj fine ĝian nombron.

En la lingvoj kiuj ne havas artikolon, kiel la latina, la substantivo mem anstataŭas ĉiujn servojn de la artikolo, kaj la senco de la propozicio anstataŭas ĝian determinecon aŭ nedeterminecon.

En Esperanto la artikolo nur servas por determini la substantivon, ĉar ne ekzistas nedetermina artikolo, kaj ĉiuj aliaj servoj al si faras la substantivo mem. Se oni volas, eĉ la determinan artikolon oni povas forigi, restante la senco de la propozicio por konprenigi la determinecon aŭ nedeterminecon de la substantivo.

Ĝeneralgramatike artikolo estas konsiderata kiel vorto kiu servas por limigi la ampleksojn de la substantivo, kiam la artikolo estas determina; aŭ por doni vagecon al la amplekso de la substantivo, kiam la artikolo estas nedetermina. La artikolo determinas aŭ nedeterminas la substantivon, neniam kvalitas ĝin. La determinado de la substantivo ne estas kvalitado: la determinado ne aldonas kvaliton: simple precizigas, difinas la etendon, la ampleksojn de la substantivo, kiu estas ricevonta la kvalitado de la adjektivo. La artikolo ne aldonas novan ideon al la substantivo: montras nek esencon nek akcidenton de la substantivo, nur montras manieron kiel ni rigardas la substantivon, aŭ kiel ĉi tiu prezentigas al nia konsidero; estas pro tio ke gramatikuloj enigis la artikolon en la grupon de *Idealaj vortoj* (Bardina).

Estas strange al ni ke la artikolo Esperante ne konformiĝu sekse, nombre kaj kaze kun la substantivo (katalune konformiĝas sekse kaj nombre); sed la logiko aprobas ĝin: oni povus konsideri la artikolon kiel simplan determinan prefikson.

Katalune kaj alilingve la artikolo prenas sur sin elementojn aŭ asignojn de la substantivo, kaj estas tre logika ke en la aferoj komunaj ili konformiĝu.

—Kio estas *tiu*? *Tiu* iafaje estas vera determina artikolo, kiel en la ekzemplo de Sro. Dalmau, aliaj estas vera demonstrativa pronomo, kaj multaj estas korelativa pronomo: pro tio la gramatikuloj enmetis ĝin en la grupon *Artikolo-pronomoj*.

Estas kompreneble ke kiam oni uzas *tiu* kiel artikolo, ĝi devus esti neŝanĝebla aŭ nekonformiĝebla, kaj kiam ĝi estas pronomo, necesege devas esti konformiĝebla: estas pro tiu malfacilaĵo ke ĉiam oni uzos tian vorton kiel varieblan vorton.

Mi konkludas ke nek *la* nek *tiu* povas, laŭ mia senvalora opinio, esti konsiderataj kiel adjektivoj.

J. B kaj F.

Moncada, 1910^{an} majon.



STUDKOMISIO PRI ĈIULANDA VERKARO¹

KATALUNUJO

Rimarkoj de Sro. Fred. Pujulà pri *La Patrino*, tradukaĵo de sinjoro Alfonso Sabadell, lingvokomitatano por kataluna lingvo.

Ne estis eble al mi klasigi la rimarkojn. Ofte en la sama frazo estas samtempe rimarkindaj kelkaj vortoj, la stilo kaj la tro libera traduko en okazo kiam laŭvorta traduko sufiĉas. Tamen mi klopodis kiel eble klasigi ilin laŭ vortoj kaj stilo.—Ŝajnis al mi necese, aldoni al la kritikitaj frazoj (Sab.), la originalan katalunan tekston (Orig.), kaj la, laŭ mia opinio, korektan aŭ pli ĝustan tradukon de tiu ĉi (Rap.). Mi devas konfesi kaj averti, ke tiu ĉi traduko nur celas la komprenigon de la kataluna teksto por la personoj, kiuj ne konas la katalunan lingvon, kaj ebligis la komparon kun la tradukaĵo de Sro. Sabadell.

Plej ofte en la originala kataluna teksto mankas la sintakso, kaj la leganto devas diveni aŭ supozi la sencon de la frazo per konjektoj. Mia celo ne estis do fari literaturan tradukon de frazoj, kiuj havas nenian literaturan kvaliton. Oni ne povas postuli de Esperanto tiajn miraklojn. Tial, sekve, mi ne precipe faras rimarkojn pri *La Patrino* kiel tradukaĵo sed kiel esperantaĵo. — LA RAPORTINTO.

AL en rekta komplemento.

Sabadell. . . — «la mizero ankaŭ al mi ne timigas». (52)

Originalo. . . — *a mi tampoc me fa por la miseria.*

Raportinto. — Ankaŭ min ne timigas la mizero.

1) Sro. Pujulà sendis al ni tiun-ĉi kritikon. Domaĝas ke ni ion rimarku pri ĝi, pro tio, ke ĝi estas serioza kaj serena. Se iu ajn ĝin ne juĝas tiel, kaj kontraŭe opinias, ne estas nia nek de nia amiko la kulpo, ĉar nur li estus kulpa se en tia kritiko estus ludinta rolon, simpatio; favoremeco, malsimpatio malfavoremeco, vidmanieroj, aŭ ia homa pasio.

Ni decidis ĝin publikigi pro tio, ke ĝi efike helpas la klasifikadon de la bonaj kaj malbonaj tradukaĵoj kaj tradukistoj; pro tio ke ĝi taŭgos por vidigi la aliandulojn ke nia kataluna literaturo ne estas tia, kia ĝin prezentas iuj tradukistoj, kaj pro tio, ke kiu nur kapablas marŝi, paŝo post paŝo, ne decas kuri.

Gajnos Esperanto kaj ni! — «K. E.»

- Sab. — palpante al ŝi. (144)
 Orig. — *locant-la*.
 Rap. — tuŝante (aŭ palpante) ŝin.

AL, kiel prefikso.

- Sab. — Alberto (aldonante karbkrajonon al Manuelo). (122)
 Orig. — *Albert (donant carbó an en Manel)*.
 Rap. — Alberto (donante karbkrajonon al Manuelo).

- Sab. — mi alvenas pro afero de granda intereso. (27)
 Orig. — *vinc per assumpto de gran interès*.
 Rap. — mi venas pro afero de granda intereso.

- Sab. — Mi... kredu min... ne estus kuraĝinta vin alvenigi... sed... (38)
 Orig. — *Jo... creguin-me... no'ls hauria gosat fer venir... però...*
 Rap. — Mi... kredu min... ne estus kuraĝinta vin venigi... sed...

- Sab. — Ĝustatempe ci alvenas, ĉar se ci ne estus alveninte, tiam
 mi estus irinta trovi cin. (55)
 Orig. — *Arribes á punt, perquè si no arribes a venir jo t'hauria anat a
 buscar*.
 Rap. — Ĝustatempe ci alvenas, ĉar se okaze ci ne estus veninta, mi
 estus irinta renkonti (aŭ serĉi) vin. (Rimarko pri «trovi».)

- Sab. — Se mi ne estus alveninta vidi cin! (76)
 Orig. — *Si jo no hagués vingut a veure-t!*
 Rap. — Se mi ne estus veninta vidi cin! (aŭ pli ĝuste) renkonti vin!

- Sab. — Oni alvenas viziti min. (94)
 Orig. — *Me vénen a veure*
 Rap. — Oni venas viziti min.

AMI.

- Sab. — mi ne amas enuiĝi. (59)
 Orig. — *no m'agrada amoinar-me*.
 Rap. — mi ne ŝatas enuiĝi. (pli ĝuste) min ĝeni; aŭ priokupiĝi.

Daŭrigos



1^A KONGRESODE UNIVERSALA ESPERANTO - ASOCIO

AUGSBURG (BAVARUJO)

28 Julio - Aŭgusto 1910

KARA SAMIDEANO,

Ni havas la honoron inviti vin partopreni en la 1.^a Kongreso de U. E. A. (por Eŭropo), kiu okazos en *Augsburg* (Bavarujo) de la 28^a de Julio ĝis la 3^a de Aŭgusto 1910.

La celo de tiu unua Kongreso de nia Asocio estas duobla: unuflanke interŝanĝi ideojn kaj projektojn pri la plivastigo de U. E. A. aŭdi pri ĝia nuna situacio, ĝiaj metodoj, ĝiaj principoj, fiksi la grandajn liniojn de ĝia laboro dum la venonta jaro, esprimi la bezonojn kaj dezirojn de la Esperantianoj laŭ kiuj la Komitato poste agados; aliflanke ebligi pli intiman konatiĝon kaj amikiĝon inter niaj ĉiuregionaj membroj, ilin elproksimigi dum kelkaj tagoj tiel ke ĉiu povu profiti la sperton de la alia kaj per tiu kunlaborado, kiun ebligas la dumkongresa kunvivado, pligrandigi la sento de solidareco inter Esperantianoj kaj la fervoreco pri U. E. A.

La urbo Augsburg kuŝas en la centro de Eŭropo; ĝi do estas facile alirebla por ĉiuj popoloj. Plie, krom la labora parto interesa kaj originala, la Kongreso prezentas ne kompareblajn allogaĵojn, kiuj solaj valoras la vojaĝon Augsburgon: vizito de la mondfamaj reĝaj kasteloj de Füssen-Neuschwanstein kaj, tuj post la Kongreso, ekskurso al Munĥeno, Oberammergau, kie okazas la tutmonde konataj Ludoj de la Kristisuferado (nur ĉiudekjare) kaj al Bavaraĵ Alpoj, en plej favoraj kaj certe neretroveblaj kondiĉoj.

La loka organizantaro fervore laboras por la aranĝo de la Kongreso kaj oni de nun povas esti certa pri gastema kaj samideana bonakcepto.

Dum la sama epoko okazos en Augsburg Kongresoj de *Germana Esperantista Asocio*, de *Tutmonda Esperanta Kuracista Asocio* kaj aliaj fakaj societoj.

Ni do esperas, Kara Samideano, ke vi bonvolos fari ĉion eblan por ĉeesti en tiu grava manifestado kaj sendi al ni *kiel eble plej rapide vian aliĝilon*.

La Komitato de U. E. A. : H. BOLINGBROKE, Mudie, Prezidanto. H. HODLER, Vic-Prezidanto, Administra fako.

Centra Oficejo de U. E. A. : 10, rue de la Bourse, GENÈVE.

GRAVA AVIZO. — La personoj, kiuj tute ne povas ĉeesti la Kongreso estas insiste petataj mendi *helpkongresan karton* po 1 Sm Tiu karto celas faciligi la financon aranĝon de la Kongreso; ĝi rajtigos al senpaga ricevado de la Kongresa Raportaro. Personoj, kiuj aliĝas kiel helpkongresanoj, povas ĉiam poste aliĝi kiel Kongresanoj, pagante 2 Sm plue.

PROVIZORA PROGRAMO DE LA KONGRESO

Honora Prezidanto: Sro. WOLFRAM, ĉefurbestro de Augsburg

Jaŭdon 28 Julio. — 5 h., Solena Malferma Kunveno. — 7 h., Granda komuna festeno.

Vendredon 29. — 9 h. 1/2, 1^a Labora Kunveno (pri Administra fako). — 3 h., 2^a Labora kunveno (pri Financa fako). Vespere, Amuzaĵoj.

Sabaton 30. — 9 h. 1/2, 3^a Labora kunveno (pri fakoj konsuloj kaj Esperanto-Oficejoj). — 3 h., 4^a Labora kunveno (pri Junula fako). Vespere: Mitingo kaj paroladoj.

Dimanĉon 31. — Komuna ekskurso al la reĝaj kasteloj de Neuschwanstein kun komuna manĝo.

Lundon 1^a Augusto. — 9 h. 1/2, 5^a Labora kunveno (pri komerca fako). — 3 h., 6^a Labora kunveno (pri komerca fako). — 5 h. 1/2, Malfermo de la Kongreso de TEKA. — 8 h. 1/2, Granda Vesperfesto.

Mardon 2. — 9 h. 1/2, 7^a Labora kunveno (pri turisma fako). — 3 h., Ferma kunveno; alprenado de la deziresprimoj. — 5 h. 1/2, kunveno de TEKA. — 7 h., Granda komuna festeno.

Merkredon 3. — Kunvenoj de TEKA kaj diversaj Esperantiaj Asocioj kaj Entreprenoj. — Ekzamenoj de la Instituto de Esperanto.

Jaŭdon 4, Vendredon 5, Sabaton 6. — Vizito de *Munĥeno*.

Dimanĉon 7. — Vizito al la prezentado de Oberammergau ka eventuale ekskurso al Bavariaj Alpoj.

* * *

KUNVENOJ. — La Kunvenoj okazos en la belega hotelo 3. Mohren. La *detala* tagordo de tiuj kunvenoj aperos en «Esperanto» kaj estos sendata al ĉiuj kongresanoj.

LOGADO. — Estos eldonataj 3 klasoj de kuponaroj. En ĉiu kuponaro estas entenataj 6 noktoj, kun frua matenmanĝo, tag-kaj vespermanĝoj dum la tuta kongreso kaj ekskurso al Neuschwanstein (kun

vagonaro, vizitado de la reĝaj kasteloj kaj manĝoj). La fruaj matenmanĝoj okazos en la hoteloj; la festenoj en la hotelo 3. Mohren, kaj la komunaj ĉiutagaj tag. kaj vespermanĝoj en bierhalo. La diferenco de prezo inter la tri klasoj estas kaŭzata de la diverseco de la ĉambroj; la manĝoj kostos saman prezon por ĉiuj kongresanoj. Oni rimarku, ke la kosto de la ekskurso (10 Sm) estas entenata en la kuponaro.

VOJAĜOJ. — Jen la kosto de la vojaĝo Augsburgon de kelkaj urboj:

Basel, II^a klaso Sm 12,60, III^a klaso Sm 8,20; *Genevo*, II^a 17,85, III^a 12,15; *Marseille*, II^a Sm 32,95, III^a 16; *Milano*, II^a 23,30, III^a 14,10; *Genova*, II^a 25,10, III^a 16,95; *Nancy*, II^a 14, III^a 9; *Parizo*, II^a 24, III^a 16,05; *Bruselo*, II^a 21,25, III^a 13,40; *London*, II^a 34,35; *Rotterdam*, II^a 22, III^a 14,25; *Hamburg*, II^a 17,85, III^a 11,60; *Breslau*, II^a 18,75, III^a 12,20; *Praha*, II^a 13,20, III^a 7,70; *Wien*, II^a 15,85, III^a 9; *Budapest*, II^a 24,45, III^a 12,75; *Firenze*, II^a 25,90; III^a 16,20.

Por ricevi la prezojn de iro kaj reiro oni duobligu la suprajn prezojn.

La personoj, kiuj dezirus uzi rondvojaĝan bileton, trovos la necesajn informojn ĉe la stacidomoj de la ĉeĵaj urboj.

KONGRESKARTOJ. — La Kongreskarto kostas 3 Sm. Ĝi rajtigas al ĉeestado je ĉiuj kunvenoj kaj senpaga ricevado de la dokumentoj; ĝi estas necesega por la ricevo de la kuponaro.

Karto de helpkongresano kostas 1 Sm; ĝi rajtigas je senpaga ricevado de la dokumentoj; ĝi estas difinita por la personoj, kiuj ne veturas al la Kongreso. Helpkongresanoj povas ĉiam fariĝi kongresanoj, pagante 2 Sm pluajn.



ENLANDA MOVADO

BARCELONA

Ekskursoj—La 8 an de Majo, la societo «Espero Kataluna» organizis ekskurson al Rabassalet, bela fonto kiu estas sur nia najbara monto Tibidabo.

La geekskursanoj, ĉirkaŭ 20, kunvenis en la malsupra placo de la funikulara stacidomo, kaj sin direktis al la loko sur kies supraĵo staris esperanta flago.

La ekskurso plene sukcesis malgraŭ dum ĝi la vetero malboniĝis kaj ne estis eble manĝi en la arbaro kiel oni intencis. Por reiri al la funikulara vagonaro ili estis devigataj atendi la finon de la pluvado, kiu vespere, je la 5.^a, falis de la

jam de longe minacantoj nuboj, sed la ekskursanoj revenis Barcelonon tute kontentigitaj pro la tago pasigita sur la montoj.

La sama societo la 22 an de Majo vizitis la ŝipon «Cocodrilo'n» en kiu estas la «Comisión Oceanográfica». Kelkaj oficiroj de la ŝipo afable montris al gevizitintoj la interesajn fiŝojn kiujn la muzeo kaj akvario enhavas.

La vizitintoj iris kaj revenis de la ŝipo per la vaporŝipetoj «Golondrino» kies mastro metis je ilia dispono.

La 11 an de Junio la grupo «Barcelona Stelo» vizitis la «Observatori Fabra». En tiu ĉi ekskurso partoprenis multaj esperantistoj kiuj ne bedaŭris malprofiti la noktan ripozon por sin instrui per Esperanto, kaj samtempe disvastigi ĝin.

La «Komerca Fakoj» de «C. A. de D. del C. y la I.» okazigis la 7 an de Junio, sian ordinaran kunvenon por elekti la novan Komitaton por la jaro 1910—11^a kaj unuanime estis elektita de la ĉeestantoj Sroj. D. Dalmau, *Prezidanto*; J. Mussons, *Vic-Prezidanto*; J. Bubé, *Sekretario*; A. Massana, *Vic-sekretario*; F. Casademont, *Bibliotekisto*.

Dum la kunsido oni ankaŭ legis raporton pri la agado de la antaŭa Komitato, kaj fine oni aprobis proponon por pli oportuna agado, kaj atingis de sinjoro Dalmau ke li faros esperantan kurson dum la nuna somero.

En la societo «La Familiar Obrera de Sans» okazis grava konferenco pri Esperanto, organizita de la grupo «Forigu Barojn» en kiu partoprenis niaj amikoj Sroj. D. Dalmau, M. Jordi, Dro. J. Bremon—prezidanto de «K. E. F.»—kaj Navarro, laŭdante ĉiuj nian karan lingvon kaj vekante la entuziasmon de la ĉeestantaro.

La kurso kiun oni malfermis, en la sama societo estas tre ĉeestata de la loĝantoj el la antaŭurbo Sans, kiuj tre avide sekvas nian movadon.

Ni ankaŭ devas sciigi al la gelegantoj de K. E. la edziĝon de nia samideano Sro. Salvatore Casanovas kun Fino. Tereso Comas. Al ili ni deziras la plej longan vivadon kaj feliĉecon.

GIRONA

La Komitato de «K. E. F.» plej atente petis min plenumi la taskon kiel delegito en la ĉi tiea urbo. Tion ekentreprenante mi sendas al la organizintoj de tia vasta rondo miajn gratulojn, kaj samideanajn salutojn al ĉiuj samcelanoj en ĝi partoformantaj.

La esperantista movado en Girona multe sveniĝis, sendube pro la etaj malkonsentoj ekzistantaj—bedaŭrinde—inter la estraranoj de la du grupoj «Amo kaj Espero» kaj «Gerona Esperantistaro», kaj laŭ mia aparta vidmaniero, estos tute efika kunigi ambaŭ societojn je unu sola sub nova nomo kaj nova estraro, ĝin konsiderante kiel novnaskiĝintan grupon: kaj tiam per volo kaj entuziasmo, kiuj ja ne mankas ĉe neniuj gerona esperantistoj, oni prosperos kaj atingos

disvolvigi nian internacian lingvon, unuigante de post la unua momento la samlandanojn por baldaŭ poste unuigi la alilandanojn.

—Oni organizas provincan esperantistan kongreson, pri kies sukceso klopodas la anoj de la organiza komitato. Ni scias ke ĉiuj samideanoj de la ĉirkaŭaj vilagoj intencas kunhelpi tiun ĉi kongreseton per ilia klopodo kaj alesto.

Pliajn detalojn mi ne povas liveri al la legontoj ĝis venontaj raportoj. —
LA DELEGITO.

TARRAGONA

Jene estas la nova Komitato de la grupo «Tarragona Esperanta» elektita por la nuna jaro.

Honora Prezidanto Dro. Zamenhof; *Prezidanto* Sro. Joan Molas Sabaté; *Vic-Prezidanto*, Sro. J. Vidal Ras; *Sekretario*, Sro. D. Roig Cubells; *Vic-Sekretario*, Sro. Francisc Menaranch; *Kasisto* Sro. Joan Llagostera; *Kalkulisto*, Sro. Pau Olivé Sanromà; *Bibliotekisto*, Sro. Joan Solé Granell.

La sciigon pri la okazo de la «Dua Kongreso de Katalunaj Esperantistoj» en nia urbo, gaje kaj ĝoje akceptis ĉiuj Tarragonanoj kaj oni sin promesis ĝin kunhelpi per ĉies fortoj.

Danko al la okazonta Kongreso ree naskiĝis en tiu ĉi urbo la fervoro por nia internacia lingvo. Novan kurson por virinoj estas ekkomencita en ĉi tiu montato, al kiu alestos la fraŭlinoj multenombre. Ĝi estos instruita de Sro. Joan Molas.

En la 26^a Junio okazis ekskurso al «Poblet», en kiu partoprenis ĉiuj katalunaj societoj porekskurso, organizita de la «Centre Excursionista de Catalunya».

Nia grupo delegis Sron. Molas por reprezenti ĝin en la ekskurso, kaj nia samideano Sro. Solé Granell, estis deligita de la «Centre Excursionista de Tarragona». —LA DELEGITO

BARBARA DEL VALLES

La 12 an Junion okazis en ĉi tiu vilaĝeto la ĉiujara festo de la grupo «Esperanta Nesto».

Je la naŭa kaj duono matene ĉiuj grupanoj kunvenintaj en la societa sidejo, aliris kun la standardo al la vilaĝa preĝejo, kie Pastro diris solenan meson. Pastro Cardona diris longan predikon pri Esperanto.

En la komenco kaj fino de la meso, la esperantistoj kantis *Ave-Mario'n*, kaj kiam oni forkunportis la standardon, Sro. Puigbonet ludis fortepiane la *Esperantan Himnon*.

Posttagmeze je la 4 kaj 1/2 ekkomenciĝis Esperanta Festo. La ĉeestantaro estis ĉirkaŭ 200. Prezidis Sroj. Prezidanto, Vic-Prezidanto kaj Sekretario de la grupo. Dekstre de la prezidantebloko sidis sinjoroj la vilaĝestro, juĝestro kaj ceteraj aŭtoritatoj; maldekstre estis geanoj kaj protektantoj de nia «Nesto». La prezidanto Pastro Sro. Jozefo Planas, malfermis la feston, kaj baldaŭ poste sinjoro Puigbonet diris longan paroladon. Ankaŭ paroladis Sro. Joan Arnella.

Ankaŭ partoprenis en la festo gefraŭloj el la grupo legante poeziojn kaj poemojn.

En la fino, nia kara Prezidanto faris belan kaj konvinkigan paroladon, kiu multe plaĉis al ĉiuj ĉeestantoj, kaj li meritas nian gratulon pro tio, ke per ĝi li sukcesis pligrandigi nian «Neston», kaj kontentigi ĉiujn. — LA DELEGITO.

SABADELL

Kun malĝojo hodiaŭ mi devas raporti pri la morto de du el niaj pli malnovaj sindonemaj kaj entuziasmaj amikoj: Sro. J. Camps kaj J. Sanllehí.

La unua, ankoraŭ Esperanto ne estis disvastigata en nia urbo kiel nun, kiam li proponis en laborista kongreso kiu okazis en Sabadell dum la jaro 1904^a ke ĝi akceptus kiel internacian lingvon, Esperanton, por la rilatoj kun eksterlandaj laboristaj societoj, propono kiu estis aprobita de ĉiuj, kaj ĝis nun li ĉiam estis apud ni batalante por nia lingvo, ĉu kiel ano de «Esperanta Semo» ĉu de «K. E. F.» laborante private por alvarbi novajn batalantojn.

Al lia vidvino kaj filoj, niajn plej sincerajn kondolecojn.

Sro. J. Sanllehí, estis alvarbita al nia movado de la jaro 1906^a kaj li estis ano de Aplech «Esperanta Grupo» kaj ankaŭ de «Esperanta Semo» ĝis lia forvojaĝo al Buenos Aires, kie la morto surprizis lin je la dudek tria jaraĝo, Li estis ĉiam entuziasma propagandisto de nia lingvo.

Al lia patrino kaj frato, ni petas bonvolu ricevi niajn kondolencojn. — LA DELEGITO.

OLOT

Kia ĝojo, karaj gelegantoj, kiam iun tagon post noktomanĝi estante ni ĉe nia esperanta lernejo frapis la pordon hotelservisto portante leteron esperante skribitan!

Gaja surprizo! Sro. D. Serdà, Direktoro de nia amegata gazeto, ĵus alveninta ĉi tien!

Kompreneble, ĉiuj federaciaĵoj pretiĝas manpremi kaj saluti lin, kiu post la vizito de tri ĉi tieaj samideanoj aliris al la sidejo de «Olota Stelo».

Tuj kiam li eniris en la sidejo, komencis paroli esperante dum du senĉesaj horoj, ĉarmante ĉiujn la facilmaniero paroli nia lingvo.

Same li faris la duan tagon montrante al ĉiu, ke li estas inda je la rolo kiun al li komisiis «K. E. F.»

Ni volonte estus aŭskultinte konferencon pri Esperanto sed bedaŭrinde ne okazis tion pro sia sano.

Lia restado ĉe ni dum tri tagoj plivekiĝis entuziasmon por nia lingvo. — LA DELEGITO.



OFICIALA PARTO

El Comitè Directiu de «K. E. F.» ha rebut un atent comunicat de l'Excma. Diputació de Tarragona en resposta a la comunicació que's féu a dita corporació de que'l segon Congrés de «K. E. F.» tindrà lloc en aquella ciutat. En ell se'ns ofereix tot l'apoi necessari per a portar a bon terme el nostre Congrés.

No es, doncs, d'extranyar que desde ara s'auguri un exit.

Repetidament alguns senyors socis se queixen de que no reben la revista; i, com sigui que l'Administració expedeix tots els exemplars necessaris, prega als que's trobin en aquest cas que facin el favor de reclamar el número al repartidor de la correspondència, i en tot cas donar-ne avís an aquesta Administració, per postal, a fi de posar-hi'l correctiu corresponent.

Si algun senyor soci's troba en el cas de que li falta algun número de «K. E.», pot enviar nota, que seguidament se li enviarà, puix l'Administració sols desitja que tothom estigui ben servit.

L'Administració prega a tots els senyors delegats de «K. E. F.» i particulars que han de saldar comptes amb ella, que ho facin a la major brevetat, puix resulta que la marxa administrativa sempre es millor tenir-la en bon ordre que no pas en desordre, i an això hi han d'ajudar no solament l'administrador, sinó també en primer lloc els delegats, i en segon els particulars, car l'obra de «K. E. F.» es de tots, i tots hem de contrubuir-hi.

En un dels nostres proxims números publicarem, en aquesta mateixa secció, un detallat estat de comptes pera que'ls nostres amics puguin veure l'estat satisfactori de «K. E. F.» i per això es que fem el prec de més amunt.



KORESPONDADO

Sro. A. Melis, Fino. U. U. Viaj manuskriptoj aperos baldaŭe. — Sro. R. M. Via tradukita verso sendube estas vere interesinda kiel kanzono, sed ne kiel verso. — Sro. J. V. Verki originale ne estas je via atingo; pro tio viaj prozaĵoj ne taŭgas. Rilate al viaj versoj, ni ne povas ilin publikigi, tial, ke ni nur enprezigos *poeziojn*, sed ne versojn. — Federaciano: Ni diras al vi tion, kion ni diras al Sro. J. V.

Avizoj. — Denove ni petas al niaj afablaj kunlaborantoj, skribi plej legeble siajn al ni alsenditajn manuskriptojn. Manuskriptojn ne plenumante tian kon diĉon ni eĉ ne legos.

Kiam oni skribu al tiu ĉi Redakcio, ĝin faru poŝtkarte.

Manuskriptojn alsendotajn al ni, afranku laŭ tarifo «original pera impremta.»

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO □ OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

SEN PAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO

12. strato Gracia. — SABADELL
BARCELONA-HISPANUJO

AVIZO: La Redakcio konservas al si la rajton korekti laŭ bezone la manuskriptojn. Neakceptitajn manuskriptojn oni ne resendas.

ENHAVO: 21^a Julio. — Unua Kongreso de Katolikaj Esperantistoj. — Studkomisio pri ĉiulanda verkaro. — La Patrujo. — Revo. — Rakonto. — Enlanda Movado. — «Internacia Asocio de Instruistoj». — Korespondado.

21^a JULIO

ANTAŭ unue aparte ni kunhelpis starigi la monumenton al Amo al la Homaro. Private kaj ĉien ni klopodis por ke ni ne estus estintaj solaj en tia kunhelpado. Hodiaŭ kiam ni atingis nian plenaĝon, kaj nia forto estas pli granda, hodiaŭ kiam ni atingis vastan rondon kaj riprezentadon de multaj esperantistoj, ni festas tute ĝoje la datrevenon de la 21^{an} Julion. En tia dato ni vidas stimulon por antaŭeniri ĉiujare, kun espero atingi la plenan triumfon, kaj la 21^a de Julio estos la dato kiun la homaro gravuris sur la piedestalo de la monumento al Frateco; kiun Zamenhof, la majstro, ekstarigis sur la mondo, per la aperigo de la unua libro pri Esperanto.

Kaj tiu monumento kiu estos vere starigita de la esperantistaro, kiel triumfo de Frateco, de Amo, estos samtempe la monumento kiun la homaro dediĉas al elpensinto de nia kara internacia lingvo; monumento kiu daŭros eterna, ĉar ĝi estas starigita en la koro de ĉiuj, kaj estos ankaŭ en la koro de ĉiuj postvenontaj homoj.

LA REDAKCIO





KELRAJ DIVERSLINGVAJ KONGRESANOJ, INTER ILI KVAR KATALUNOJ

UNUA KONGRESO

DE KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ

Tiu ĉi kongreso okazis en Parizo dum la lasta Aprilo. Ĝi estis elokventa montro de la disvastigado de Esperanto ĉe la katolikoj, kaj konsekvence denove estis pruvita ke la Eklezio, ne rifuzas novajn sukcesojn, progresojn de la scienco, sed kontraŭe ĝi estas preta partopreni en ĉiuj veraj kaj sciencaj movadoj.

Tiu ĉi kongreso esceptinte la oficialajn Internaciajn Kongresojn estis la unua Internacia Kongreso kunvenita.

Ĝia celo estis servi samtempe al la katolikismo kaj al Esperanto. Pro tio, raportoj estis prezentitaj al la Kongreso, je ĉi tiuj du vidpunktoj.

«La unueco de la kristanoj; la unuforma elparolado de la latina lingvo, la kulta organizado; la katolika socialagado; propagandoj kaj informoj katolikaj per la peroj de Esperanto; la katolika protektado per internacia esperantista ligo» jen raportoj pristuditaj kaj diskutitaj en la grandaj salonoj de l'«Institut Catholique» kie okazis la kunvenoj. Ĉiuj raportadoj estis tre interesaj, tre gravaj, tre praktikaj, sed oni devas rimarki kiel la plej praktikan kaj efikan, la lastan ri-

late al la katolika esperantista ligo. Ĝi estis kordezirita de multjar-
oj de multaj katolikoj! Nun ĝi estas jam efektiviĝinta!

Restas starigita Katolika Unuiĝo. Esperantista Internacia, kies
celo estas disvastigi Esperanton ĉe la katolikoj kaj servi al la Kato-
likismo per Esperanto. Ĝi konsistas el Internacia estraro kies sidejo
estos Parizo, kaj kies organo estos fame-konata revuo *Espero Kato-
lika*. Ĝi konsistas ankaŭ el estraroj regionaj, aŭtonomaj en ĉiuj lan-
doj kie estos almenaŭ 20 esperantistoj aliĝintaj al la K. U. E. S.;
tiuj estraroj klopodos por disvastigi Esperanton en siaj landoj kaj
nomos membrojn de la ĝenerala straro proporcie al la numero de
siaj anoj. En nia lando estas ĵus ekkreata kataluna ligo. Por de-
mandoj, informoj kaj aliĝoj sin turnu ĉe la «Kataluna Ligo de Ka-
tolikaj Esperantistoj» (Porta-ferriça, 13, principal, Barcelona).

Utileco de nia kara Zamenhofa lingvo estis pruvita en la eks-
kursoj de la Kongresanoj al *Versailles*, *Trianon*, *Vincennes*, *Mont-
martre* k. t. p. kie kongresanoj esperante aŭdis informojn pri la
interesaj aferoj tie loĝantaj.

Dum la kongreso anoj festis kunvenojn katolikajn kun kantoj
kaj predikoj esperante.

Ankaŭ okazis frata manĝo en la granda *Palais d'Orleans*, en kiu
inter multaj proponoj estis akceptata jenan; okazi la duan kongres-
on en Hago (Nederlando) en la venonta jaro dum la septembra
monato.

Kongresanoj ĉeestantoj estis 700, el 14 nacioj. Nia Katalunlando
alportis 60 aliĝojn el kiuj ĉeestis 7 samdanlandoj kiel reprezentantoj.
Inter la katalunaj aliĝoj oni devas rimarki aliĝon de Lia moŝto arkie-
piskopo de Tarragona, Lia moŝto episkopo de Barcelono, kaj diversaj
societoj inter kiuj «Espero Kataluna», «Espero Priorata», «Joven-
tut Catòlica» (Barcelona); «Esperanta Akvofalo» (Ripollet); «Ac-
ción Social Popular» (Barcelona); «Esperanta Nesto» (Barbará);
«Joventut Catòlica» (Sabadell) kaj aliaj.

Nia kara majstro Dro. Zamenhoff sendis tre entuziasman leteron
al la kongreso dankante katolikojn pro ilia partoprenado en la gran-
da kaj belega esperanta movado.

Nia *unua* sukcesis kaj ni esperas ke ankaŭ sukcesos sia ido «Ka-
tolika Unuigo Esperanta Internacia».

DRO. JOAKIMO COLL

Sant Feliu de Codines.



STUDKOMISIO PRI ĈIULANDA VERKARO

(Sekvo) ¹

KATALUNUJO

ANONIMO

Sab. — Mi tiam estus dirinta al la juĝantaro, al tiuj ĉi ŝveligaj anonimoj. (70)

Orig. — *Jo li hauria dit an el jurat, an aquests inflats anonims.* (Manko de rilato inter, *aquests* kaj *jurat*.)

Rap. — Mi estus dirinta al la juĝantoj, al tiuj malplenaj anonimuloj.

ANTAU MULTE DA JAROJ

Sab. — Antaŭ multe da jaroj, mi enmetas en la fornon ŝtipojn... Kaj nun mi laciĝus? (123)

Orig. — *Fa una restallera d'anys que n'hi poso de llenya al forn; i ara'm vindria'l cansar-me?*

Rap. — Jam de post amaso da jaroj mi enmetas en la fornon ŝtipojn, kaj ĝuste nun mi laciĝus?

APUDESTI

Sab. — Ĉu ne estas nia devo resti apud ci? Bone, apudestu la seĝegon. (56)

Orig. — *No es el meu dever fer-te costat? Vaja, faci costat an el silló.*

Rap. — Ĉu ne estas mia devo akompani vin? Bone, nun akompanu la apogseĝon. (La kataluna frazo: *fer costat*, ne signifas, esti apud, nek esti flanko, sed, esti apudaĵo, esti apogilo, esti subtenanto. La ludvorto estas malbonega en la originala lingvo mem, kaj mi opinias ke nur la verbo akompani, povas iom konservi la fluecon en la dialogo.)

AVO anstataŭ MASTRO, MAJSTRO aŭ io simila.

Sab. — Sciu, avo, ke mi dezirus fali en ĝin! (6)

Orig. — *Saben, avi, que jo hi voldria caure a dintre!*

Rap. — Ja, mia mastro, al mi plaĉus fali en ĝin!

BONNOVAJO

Sab. — Ĉu vi diras bonnovaĵojn? (27)

1) Vidu la numerojn 4^{an}

Orig. — *Una bona noticia, diu?*

Rap. — Ĉu bonan sciigon?

DA

Sab. — Da kvardek jaroj mi jam estas almozulo! (14)

Orig. — *Ja ĉa quaranta anys que jaig de pobre!*

Rap. — Jam de kvardek jaroj mi laboras kiel almozulo!

DES MALPLI

Sab. — Montru al mi la fingrojn. — Mi tute ne ĝin tuŝis. — Eĉ per la nazo? — Des malpli, ĉar ĝi estas tre proksime de la buŝo, kaj vi komprenas...? (11-12) (Vidu eĉ.)

Orig. — *Aveiam els dits. — No la só tocada ni gota. — Ni amb el nas? — Menos, perquè es massa aprop de la boca, i sabeu...?*

Rap. — Montru la fingrojn. — Mi ĝin tute ne tuŝis. — Nek per la nazo? — Ho, ne! Ĝi estas tro proksima de la buŝo, kaj... ĉu vi komprenas...?

Kion ci DEZIRU nomi

Sab. — Sciu pentristo, ke el tio ĉi, kion ci nomas glori-laŭro aŭ famo, aŭ nomo, aŭ tio, kion ci deziru nomi, ci ĝin havos. (61)

Orig. — *Sapigues, pintor, que d'això que'n dius llover, o gloria, o nom, o'l que vulguis, en tindras.*

Rap. — Sciu, pentristo, ke tion kion vi nomas laŭro, aŭ gloro, aŭ famo, aŭ kiel vi volos (aŭ iel ajn) vi havos.

DRINKIGI kun la senco EBRIIGI

Sab. — Mi eĉ kredas, ke multfoje ci drinkigis min per vortoj. (63)

Orig. — *Jo fins he cregut, moltes vegades, que m'has emborratxat de paraules.*

Rap. — Mi eĉ ofte (aŭ multfoje) kredis, ke vi ebriigis min per vortoj.

DUM anstataŭ TIEL-KIEL

Sab. — Sed dum la infanoj deziras rememori la vortojn mi deziris rememori la kolorojn, la liniojn kaj precipe la esprimadon. (39)

Orig. — *Però, així com les criatures volen recordar les paraules, jo volia recordar les linies, els colors, i sobre tot l'expressió.*

Rap. — Sed, kiel la infanoj klopodas (intencas, volas) rememori la vortojn, tiel mi klopodis (intencis, volis) rememori la kolorojn, la liniojn kaj precipe la elŝajnon (aŭ la korpan esprimon).

VE EL

Sab. — Ha ve el ci! (45)

Orig. — *Ai de tu!*

Rap. — Ve, vi!

EL

Sab. — Kiel komencis cian aldonitecon? El la infaneco. (39)

Orig. — *Com te va venir l'afició? — De criatura.* (La respondo ne rilatas la demandon.)

Rap. — De kiam datumas cia artinklino? — De lia infaneco.

EL EKSTERE

Sab. — La metio estas tre bela, tre, vidata el ekstere. (44)

Orig. — *L'ofici es molt hermós, molt, vist per fora.*

Rap. — La eksteraĵo de la metio estas tre, tre bela.

ELĴETI EN

Sab. — Ĉiam eljetante jarojn en la fornĉon! (136)

Orig. — *Sempre tirant anys al forn.*

Rap. — Ĉiam (en) ĵetante jarojn en la fornĉon!

EMINENTECO anstataŭ EMINENTULO

Sab. — Li revenas kvazaŭ li estus; eminenteco! (129)

Orig. — *Ens torna fet una «lumbera».*

Rap. — Li revenas al ni eminentulo.

ENTENI

Sab. — Ŝajnas, ke mia brusto disvastigas kaj ke ĉiuj povus enteni en ĝi! (53)

Orig. — *Sembla que'l meu pit s'aixampla i que tothom hi capiga a dintre!*

Rap. — Ŝajnas, ke mia brusto plilargigas, kaj ke ĉiuj povas enteniĝi en ĝi! (pli bone: ke ĝi povas ĉiujn enteni).

FARI kaj stilo

Sab. — ... sed por li mi faros tion, kio mi estas devigata esti: egoista, sovaĝa, besto, kaj eĉ malbona. (99)

Orig. — ... *però per ell em tornaré lo que'm lingui de tornar: egoista, fera, i fins dolenta.* (Ĉu egoista kaj sovaĝa ne estas ja malbona?)

Rap. — ... sed por li mi fariĝos ĉio ajn: egoista, sovaĝa, kaj eĉ malbona!

FARI KOPII AL MI ANSTATAŬ IGI MIN KOPII

Sab. — ... la instruisto faris kopii al mi figuraĵojn... (39)

Orig. — ... *el mestre m feia copiar estampes...*

Rap. — ... la instruisto igis min kopii bildojn...

FLARI ANSTATAŬ ODORI

Sab. — Ke ĉe ni flaris, kvazaŭ ĝi estus muelilo. (79)

Orig. — *Que a casa feia flaire de moli.*

Rap. — Ke nia hejmo odoris, kiel muelejo.

FRAPITA DE LA SUNO

Sab. — Bajlet estas frapita de la suno. (77)

Orig. — *El bailet està colrat.*

Rap. — La knabo estas (sun) brunigita.

(*Daŭrigos*)



LA PATRUJO

Amu vian patrujon civitanoj; sed vi ne faru el ĝi ekskluzivan celon de via volo, de via sento, nek de via penso. Estas alia patrujo pli granda; la tero.

El la tero vivadas ĉiuj homoj, ne el la sola nacio al kiu ili apartenas. Kiel mizere kaj maloportune ni vivadus, sen la produktoj el la restanta Eŭropo, sen tiuj el Afriko, el Ameriko kaj el Azio!

La ideo, pri la aparta patrujo, estas sub multaj vidpunktoj malbonega. Ĝi ekscitas kaj subtenas la ĵaluzaĵojn kaj malpacojn inter la nacioj, provokas konfliktojn, bruligas militojn. Ĝi devigas la subtenon de grandaj militistaroj kaj armeoj, kaj la fortifikadon de la landlimoj. Ĝi kreis la doganojn kaj malebligas la liberan interŝanĝon de produktoj.

Nur la limigo de landoj apudaj, kiom da luktoj ĝi naskis! Kaj dum la nacioj estas ĉiuj pretaj kontraŭbatali sin pro colo da tero kiun oni uzurpis al ili, aŭ pri kiu ili pensas ke oni uzurpis, rigardas indiferece kiel iliaj landanoj elmigras.

Se la ideo de aparta patrujo, almenaŭ igus respektata tiun de la aliaj popoloj! Sed, en nomo kaj pro intereso de la aparta patrujo, oni konkeras la patrujon de aliaj, kaj oni igas kolonioj, insulojn kaj eĉ marbordojn de malproksimaj kontinentoj. Tie estas mia patrujo, kie estas mia standardo, diras nun la nacioj.

Kiom da sovaĝaj sentoj, vekas la ideo de malgranda patrujo!

Ne ekzistas krueleco nek barbareco, kiun la patriotismo ne naskis kaj legitimis. Estas la patrujo la altaro en kiu pli da viktimoj oni oferas. Puraj estas la oferoj kiujn en ĝi oni faras: nenion valoras kaj nenion signifas tiuj, kiujn oni faris al dio Molok kaj al la aztekaj dioj.

Ni do laboru, kaj senĉese sopiru por la granda patrujo. Nur kiam ni ĝin havos en la tuta tero, ĉesos verŝi sangon la altaro de tiu moderna Molok, kaj oni vidos en la homoj, nur membrojn de unu sola familio.

F. PI I MARGALL

Tradukis J. B.



REVO

DUM la kvietaj kaj silentaj horoj de la stelplena nokto, mi turnas mian rigardon kaj penson al la senfina spaco; mi, dronante en ĝia grandega majesteco, lasas erarvagi mian penson por ĝui ĝiajn ĉarmojn. Kaj en mia avido kaj klopodo admiri la belajojn kaj harmonion de l' kreitaĵo mi ekrajdas sur steltvoston kaj ĝi per ĝia kapturniga forkurado min transportas tra novaj mondoj de unu suno al alia suno, de unu nebulozo la alian kaj en la stelcentraĵon. Tie-ĉi mi ekvidas la konstruigon de nova mondo, kiu elnaskiĝinte el ĥaoso pasos tra la diversaj aliformiĝoj ĝis fariĝi, eble, loĝejo de inteligentaj estaĵoj... Pli malproksime, mi rigardas aliajn mondojn enhavantajn riĉoplenan vivon je la plej diversaj formoj; plej malproksime aliaj solidiĝintaj turnos centjarojn post centjaroj tra la spaco, atendante novan *Fiat Lux*... Kiam mi rigardas kaj meditas pri la solidareco reganta en ĉiuj tiuj-ĉi, de lumo kaj vivo plenaj sferoj, plenumantaj la de l' Dio altrudita astrovojo, tiam en tia rava ekstazo, mi memoras pri nia mondo, pri nia tero, pri nia lando, pri nia Katalunlando, kaj ĉefe pri *Esperanto*. Kaj mi pensas ke se la dia verko formis la kreitaron kunigante multe diversajn kaj multenombrajn formojn por fari tian majstroverkon, kia estas la kreitaro, tian harmonian tutajon,

tiel ankaŭ *Esperanto* kunigas la multediversajn rasojn, gentojn, popolojn, homojn; unuvorte: la tutan homaron eltirante el iliaj diversaj malsimilaj lingvoj, tutajon ankaŭ harmonia, kunigantan ilon, entenantan inklinon al plibonigo kaj perfektigo de la homaro: kaj jen kiel ni iras al Dio, al la senfina perfekteco.

J. PRATDESABA



RAKONTO

EN la krisna tempo vivadis Raja'o nomita Kurono, kiu ĉiumatene, antaŭ ol matenmanĝi disdonis inter la malriĉuloj du mil orajn monerojn. Li estis mortigita en batalo kaj kiel rekompenco al siaj bonfaroj eniris en la paradizon. Tie li trovis orajn montegojn, kaj unu el la gardistoj de tiu ĉiela loĝejo diris al li: «Ĉiuj tiuj-ĉi riĉaĵoj apartenas al vi. La oro kiun vi disdonis helpeme surtere, multiĝis en la ĉielo.»

Tamen la Raja'o malsatis kaj soifis; li petis ian nutraĵon kaj la gardisto al li diris: «Se kiam vi loĝis en la mondo vi estus regalinte al la soifantoj kaj malsatantoj, kion vi estus doninta, ĉion vi trovus multiĝita same kiel la oron. Pripensu, ĉu vi faris ian bonon el tiu ĉi speco?»

Post longa pripenso la Raja'o diris: «Mi memoras, ke, ian tagon dum miaj najbaroj disdonis manĝaĵojn al la brakmoj, malsatanta malriĉulo demandis al mi kiu estis la domo kie estis preparita la festeno; mi tiam per la fingro montris ĝin.»

«Pro tia bonfaro — respondis la gardisto — vi ricevos rekompencan. Suĉu la fingron kiu faris tiun signon al mizerulo.»

La Raja'o enmetis la fingron en la buŝon kaj tuje la malsato kaj soifo foriĝis.

Farinte tion ĉi, mallongan tempon li pripensis kaj diris: «Se per la fingro signinte rifuĝon al malfeliĉulo oni recompencas min tiele, kia estos la rekompenco por tiuj kiuj estos sidigintaj ĉe sian tablon la brakmojn?»

La vera helpemo, do, konsistas, ripari per si mem rekte la necesajn de la malriĉuloj.

JOSEF PI

Olot'o.



ENLANDA MOVADO

BARCELONO

Festo. — Por solenigi la fermon de la kurso kiun faris ĉe la «Juventud Católica» pastro Joan B. Sabaté, oni organizis, la pasintan Junion, literatura-muzikan feston.

Kanoniko Dro. Portolés prezidis tiun feston* je la nomo de la episkopa moŝto Dro. Laguarda kaj en ĝi estis reprezentataj kelkaj societoj kaj grupoj esperantistaj. Sroj. Anglada, González, Solé kaj Torruella reprezentis respektive «Espero Kataluna'n», «Kvinpinta Stelo'n» kaj la Esperantajn Fakojn de la «Academia de Sabadell» kaj de la katolika grupo de Tarragono.

La lernantoj fraŭlinoj Noguer, Lloret kaj Bosch, pastro Lloret kaj doktoroj Ribera kaj Salvá legis per bonega elparolmaniero kelkajn esperantajn verkojn. Sro. Sala Bonfill diris versajon verkitan de li mem, kaj Sro. Urbez deklamis alian. Finoj. Farriols kaj Bosch, kaj pastro Sabaté ludis kelkajn muzikaĵojn kaj Sro. Cerdà legis paroladon de pastro Coll, al kiu same ol al la aliaj partoprenantoj oni multe aplaudis.

La festo finiĝis per malmultaj vortoj de Dro. Portolés kaj la esperantista himno. Sro. C. de Ibanza invitis, tuj post la festo, ĉiujn la partoprenantojn al luksa festeneto.

Konferenco. — La 18^a de la pasinta Junio okazis ĉe la «Ateneu La Familiar Obrera» esperantista konferenco organizita de la grupo «Forigu Barojn» de la dirita «Ateneu».

Antaŭ multenombra ĉeestantaro Sro. M. Jordi legis belan verkon tradukitan de franca revuo, per kiu li historiis nian karan lingvon.

Sro. D. Dalmau faris bonan defendon por Esperanto, pruvante ke ĝi estas tre simpla kaj plie ke ĝi malebligas la malamikecon kiu eble estus inter la popoloj se oni elektus iun ajn vivantan lingvon kiel internacian kaj li finis petante ke ĉiuj lernu la internacian lingvon Esperanton.

Tuj post la bela parolado de Sro. Dalmau, la prezidanto de «K. E. F.» Dro. Bremón faris konvinkantan paroladon, dum kiu post kompari la nunajn kaj pasintajn lingvojn kun Esperanto, pruvis la grandegajn profitojn kiuj efektiviĝus se ĉiuj lernus ĝin kaj li klarigas per granda nombro da ekzemploj la utilojn kiujn faros al la homaro nia lingvo Esperanto; lingvo kiu alportos la fratecon al ĉiuj la homoj kaj popoloj de la tero, kaj li finis memorante tiun ĉi frazon de Pi i Margall «ke ĉiuj la homoj bonkoraj kaj bonvolantaj estis devigataj lerni tiun lingvon, ĉar ĝi estos kiu efektivigos Pacon kaj Amon inter ĉiuj la popoloj.»

La parolintoj estis tre juste aplaudataj kaj Sro. Navarro finigis la kunvenon dirante ke la proksiman semajnon oni malfermus klasojn senpagajn. kiuj okazos lundojn, merkredojn kaj vendredojn, vespere de la 9.^a ĝis la 10.^a.

Festeno. — La lernantoj de la kurso kiun faris Dro. Bartomeu ĉe la «Colegio de Farmacéuticos» organizis, je lia honoro, festenon kiu okazis la 21^{an} de Junio en la restoracio Miramar.

Dum ĝi kaj pro la sukceso kiun atingis la dirita kurso, oni decidis fondi Esperantan Fakon en la «C. de F.». La prezidanto kaj sekretario de tiu nova fako estos eble Droj. Ribalta kaj Bartomeu.

La ĉeestantoj petis de la Direkta Komitato de la «C. de F.» ke la «Colegio» aliĝu al la VI.^a Internacia Esperantista Kongreso en Washington kaj ilia propono estas jam akceptita.

La «Colegio de Farmacéuticos» de Barcelono, estas, do, eble la sola farmacia societo en Hispanujo, kiu kongresaniĝis al la VI.^a. Ni gratulas ĝin pro la helpo, kiun ĉiam donas al Esperanto.

Ekspozicio. — Dum la monato Junio okazis en la societo «Ateneu Enciclopedic Popular» grava Esperanta Gazetara Ekspozicio.

Prave povas fieriĝi liaj organizintoj, ĉu pro la sukceso, ĉu pro esti ĝi la plej granda okazinta ĝis nun en nia lando; faktoj kiel tiu ĉi honoras Esperanton kaj la Esperantistoj kaj samtempe propagandas nian aferon inter la neesperantistoj. Kiu povas dubi pri la utileco kaj efektivegebleco de Esperanto antaŭ 230 eldonitaj kaj eldonataj jurnaloj? Ĉu tio ne pruvas ĝian praktikon, utilecon, kaj antaŭ ĉio ĝian triumfon tra la mondo?

De la malfermo, ĝis la fermo ĝi estis vizitita de la Barcelonaj samideanoj.

Estis ekspoziciitaj tie, de la plej riĉaj, belaj, kaj gravaj gazetoj, ĝis la plej modestaj kaj malgrandaj, diversinkaj presitaj, kaj volografaj; la unua kiu aperis en la mondo, *La Esperantisto* eldonita ĉe Nuremberg, en la 1888^a jaro, la unua kiu aperis en Ameriko *L'Esperantiste Canadien* ĉe Montreal en 1889^a jaro, la unua en Hispanujo *La Esperanto* ĉe Santander en 1900^a jaro, la unua en Katalunujo *Espero de Katalunujo* ĉe Ceret en 1905^a jaro, kaj ankaŭ la katalunaj gazetoj *Tutmonda Espero*, *Jen*, *Semo* kaj *Kataluna Esperantisto*, kiuj okupis specialan lokon. Oni vidis tie, ankaŭ, la klopodojn de la Esperantistoj el tio malsamaj landoj, kiuj eldonis kaj eldonas jurnaloj, batalante ĉiam por la homa interkompreno. Kiom da entuziasmo, fervoro, kaj sindonemeco verkita sur tiom da paĝoj.

Estas ja monumento konstruita al nia kara Esperanto. — LA DELEGITO.

TARRAGONA

La urba konsilantaro de tiu ĉi urbo en sia lasta kunsido decidis aĉeti Esperantaj lernolibroj por la urba gvardio, ĉar estas necese ke kiam okazos la kongreso de «K. E. A.» en nia urbo la kongresanoj, trovu eĉ la stratŝtonoj esperantigitaj.

Por tiu ĉi okazo nia urbestro ricevis multajn dankojn de niaj samideanoj.

La grupo «Tarragono Esperanta» decidis eldoni gvidlibron de nia estimata urbo. — LA DELEGITO.

LLEIDA

En tiu ĉi urbo dum la venonta Septembro, oni ekkomencos, Esperantan kurson instruata de la klera instruistino el la Normala Lernejo. Fino. A. Millan Arbiol. Tiu kurso nur estos por virinoj, kiu okazos sendube ĉe la societo «Círculo Comercial».

Iom post iom, oni esperantiĝos tiu ĉi urbo, ĉar mi scias ke kelkaj da junuloj ankaŭ lernas Esperanton ĉe la societo «Centre Republicà Radical» kaj baldaŭ oni starigos aliajn kursojn en aliaj politikaj societoj.

La ĉiutaga ĵurnalo *El Correo de Lérida* publikigis kelkaj propagandaj artikoloj pri Esperanto katalunlingve, subskribitaj sur la nomo *Josefo*.

Mi ankaŭ sciigas al la legantoj ke iaj pastroj lernas nian lingvon private. — LA DELEGITO.

VIC

Esperanta karavano al Torelló. — Antaŭ kelkaj semajnoj, societanoj el ĉi tiea societo «Vik'a Esperantistaro» organizis propagandan ekskurson al najbara vilaĝo Torelló, kiun decidis aliĝi ankaŭ kelkaj esperantistoj el Manlleu.

Gajaj kaj decidaj la Vik'anaj batalantoj por nia doktrino eliris el Vik kiel vera karavano konkeranta novajn landojn por nia Esperantujo, kaj kiel vera armeo por ĉeli tiun novan konkeradon rekrutis dum sia preterirado tra Manlleu, la esperantajn soldatojn el ĉi tiu vilaĝo pretajn por kunhelpi tian propagandan fakton jam de longe tiom bezona en Torelló, kie ne estis eĉ unu esperantisto.

Tie, tre ĝentile oni akceptis la ekskursanojn en la loĝejo de la societo «La Barretina», en kies ĉefa salono oni pretigis konferencon de Esperanta propagando.

Post prezento de la esperantistoj farita de la Prezidanto de la Literatura fako el tiu societo, al ĉeestantoj, parolis nia kuraĝa kunulo, la laboristo Basols, kiu inter kelkaj spritaĵoj prezentis ĝeneralajn utilaĵojn de Esperanto por la tutmonda laboristaro.

La entuziasma oficiala instruisto el Vik Sro. Navés prezentis kaj pruvis la nepran bezonon de internacia lingvo post la nacia sed ke tiu lingvo ne devas esti unu el la nunaj naciaj lingvoj sed tute internacia kaj tial artefarita.

Sro. Coll, nelaciĝa batalanto, tre interese klarigis la naskiĝon kaj la diversajn disvolviĝojn de Esperanto dum ĝia trairado tra la mondo.

La tutezorgema Sro. Albagés, oficiala instruisto el Vik, klarigis sur nigra tabulo la ĉefajn regulojn de la Zamenhofa lingvo, por montri al ĉeestantoj ĝian facilecon kaj logikecon neatingeblajn de aliaj lingvoj.

Kaj fine la Prezidanto de la ĉi tiea societo Sro. Palmarola rimarkigis la amon kaj fratecon kiun oni sentas ĉe la tuta esperantistaro, eĉ ĉe personoj el malsama opinio aŭ religio, ĉar Esperanto havas nur unu devizon: *Amo por la Homaro*.

Ĉiuj parolintoj estis tutkore gratulataj de la aŭdintaro, kaj mi esperas ke tiu paca karavano havos baldaŭ la ĝojon esti konkeranta por Esperanto alian vilaĝon el pia Katalunlando, ĉar ilia semado estas disjetita sur fruktiĝan kaj akcepteman teron. — Vik, Julio 1910. — KROM.

REUS

Esperanto daŭrigas fervore, kaj ĉiam antaŭe en nia urbo.

La 10^a de Julio, ni faris ekskurson al Riudecanyes kaj Argentera. Kiam ni estis vizitinte la grandagvejo de Riudecanyes, ni piediris ĝis la antikvan vilaĝon Argentera, kie ni manpremis kun la saĝa kaj inda kunbatalanto Sro. Jozefo Pamies, paroĥestro. Li invitis nin al sia domo, en kiu oni rakontis al ni sian ekskurson al Parizo por ĉeesti al la «Unua Katolika Esperanta Kongreso».

En nia urbo oni eldonas literaturan duonmonatan gazeton sub la nomo *Foc nou*, kaj liaj eldonistoj petis de ni nian kunhelpon por disvastigi nian amatan idealon, kaj ni akceptis korege. — LA DELEGITO.

MANLLEU

Ankaŭ la loĝantoj el Manlleu ne volas resti la lastaj en nia batalado. Dum la monato Julio, oni malfermis du Esperantajn kursojn: unu ĉe la societo «Centre Aucellaire», donita de nia amiko Sro. B. Noguer; kaj la alia de sinjoro J. Grivé, tiu tre lerta esperantisto, kiu jam en la lasta monato finis kurson donita al dekok junuloj. Nun li instruas al dekdu fraŭlinoj, kiuj scivolemaj kaj entuziasmaj ne sin laciĝas. Kvankam ili estu mokitaj de siaj kamaradinoj.

Kelkaj el ni ĉeestis al la ekskurso al Torelló, kie okazis grandan propagandon per nia ideo. — LA DELEGITO.

SABADELL

Ĉu pro la varmeco, ĉu pro aliaj aferoj, ŝajnas ke la Esperanta movado en tiu ĉi urbo restas iom haltigita, ĉar de kelkaj semajnoj, nenian, mi povis raportiri pri nia afero, krom la novaĵo ke baldaŭ estos starigita «Katolika Esperanta Societo».

Se estas vera la novaĵo, estos pruvo ke nia movado jam atingas tiom da sukceso, ke ĝi permesas krei specialajn societojn esperantistajn ĉe en la urboj kiuj ne havas grandajn popolamasojn.

La grava societo «Centre de Dependents del Comerç i l'Industria» ricevis esperantan leteron el Bukareŝt (Rumania) petante al ĝi kelkajn notojn kaj klarigojn pri la labora organizado en nia lando. — LA DELEGITO.

GIRONA

«Geronprovinca Esperanta Kongreso». *Cirkulero* 3.^a. — Tiu ĉi Organiza Komitato havas la honoron sendi al vi, por ilia elstudado, la ĝis nunajn prezentit-

ajn proponojn, kaj ankaŭ al vi komuniki ke la tempo por prezenti proponojn daŭros ĝis la 15 de tiu-ĉi monato.

Pri la propono 17, ĉiu aliĝinta Grupo povas — kaj ĝi estas tre petata ĝin fari — redakti regularon: la al ni senditaj regularoj estos pridiskutataj de la Kongresanaro aŭ de la Komitato kiu estos elektita por tia celo. — Geronon, Julion 1910^a. — LA O. K.

Proponoj por diskuti ĉe la Kongreseto: — 1.^a Estos tre necese, por la bona propagando kaj disvastigado de lingvo «Esperanto», ke la societoj kaj grupoj de Ĝerona provinco kreos «Provinca'n Federacio'n». (Proponinto: Sro. Lusilla.)

2.^a La Provinca Federacio (se ĝi efektiviĝos) penos por ke en ĉiu Hispana provinco ankaŭ oni kreu Federacion same kiel en Geronprovinco; ke Federacio de sama regiono formos Regionan Federacion, kaj ke la Regionaj Federacioj elektos Nacian Komitaton kiu havos sur sin la reprezentadon de Hispana Esperantistaro por ĉio, kio estu internaciaj Esperantaj aferoj, kaj por sin turni, kiam tion bezonos, al la estraroj ĉu urbaj, ĉu regionaj, ĉu naciaj. (Proponinto: Sro. Lusilla.)

3.^a Se efektiviĝos la Federacio, ĉu estus konvena aliĝi al la «Kataluna Esperantista Federacio» por propagandi la ideon de la 2.^a propono? («Kataluna Esperantista Federacio» povus esti la «Kataluna Regiona Federacio», laŭ la organizo citita ĉe la 2.^a propono.) (Proponinto: Sro. Lusilla.)

4.^a Ĉu estos eble ke la Grupoj de Ĝerona provinco helpos tiun grupon, kiu petos helpadon al ĝia urbestro? (Proponinto: «Amo kaj Espero», de Palafrugell.)

5.^a Ĉu estos eble fondi Gazeton organo de la «Grupoj de Ĝerona provinco»? (Proponinto: «Amo kaj Espero», de Palafrugell.)

6.^a Kredante ke la Kongreseto celas krei «Federacion», ĉu estos konvena ke tia Federacio aliĝus, kiel Esperanta Asocio, al «Universala Esperanto-Asocio» por uzi la servojn de tiu-ĉi Asocio? (Proponinto: Sro. Amik.)

Ni varme deziras ke la penadoj de niaj Ĝeronaj samideanoj fruktedonos, kaj fervore ni petas al niaj tieaj aliĝintoj ke ili alestu ĉiuj en la Kongreseto por partopreni en la pridiskutado de tiuj temoj, celante varbi la nealiĝintojn al nia «K. E. F.» Ne forpelu nek forlasu la okazon, amikoj, kaj kunhelpu la sukceson de la Kongreseto! — «K. E.»

Inutil dir que la «Federació Catalana d'Esperantistes» hi enviarà representació, i que directa i indirectament hi prendrà part. Sens perjudici de lo que els nostres delegats puguin exposar, ens creyem en el dever de fer alguns comentaris a les proposicions presentades a discussió, amb el bon intent de contribuir a que tinguin efectivitat immediata i pràctica.

I mereixen predilectament nostra atenció les proposicions 3.^a i 5.^a, car amb elles va intimament lligat el fi que's proposa la «K. E. F.»

En primer lloc, (cal que ho remarquem) la «Federació Catalana» no es

incompatible amb la creació i existència de Federacions comarcals, ni provincials, ni de ciutats; ans al contrari: com més agrupats els esperantistes estiguin, millor i més prompte triomfarem, més forsa compacta i més poixança. Però s'ha de tenir molt compte en no crear noves institucions sinó quan les necessitats de circumstància i medi hi obliguin, mai quan no obeeixin an aquesta necessitat, car foren prematures i difícilment viurien: seria pujar la casa per la teulada.

Fem els fonaments primer, i sobre tot afermem i enrobustim bé les institucions existents; car l'afany o'l prejudici de crear noves institucions que no repongessin a les necessitats per les quals fossin creades enfeblirien necessàriament les existents i contribuirien ineludiblement a la llur mort. No vull dir que 'ls gironins no tinguin dret ni estiguin encertats en crear la «Provincia Federació». Ells, més que nosaltres, coneixen el llur estat, i deuen saber si aquesta es menester. I molt menys negarem que hi tinguin dret; ans al contrari: el fet de que vulguin crear la tal Federació afirma implícitament el dret d'existència de la nostra, i, com he dit abans, la nostra no es incompatible amb cap Federació parcial o universal.

Altrament, si 'l Congrés de gironins acorda la fundació de la seva Federació, opinem que de fet se fan solidaris de la nostra, i conseqüentment han d'aderir-s'hi. Ells, com nosaltres, se proposen (aixís se desprèn de les adjuntes proposicions i de la *Regularo* remès apart) fer Esperanto, amb la diferència que ells concreten llur camp d'acció a Girona, mentres que «K. E. F.» l'extén a Catalunya. Fóra, doncs, d'esperit mesquí, raquític, isolar-se: millor, opinem que tal isolament seria suïcida. Per què? Aduim totes les raons que's puguin aduir per a demostrar que ha de crear-se la Federació de la província de Girona. I pareu ment: si algú atribueix a «K. E. F.», o als seus directors, propòsits amagats, igualment poden atribuir-se (sens cap mena de fonament, es clar) a qualsevol entitat o agrupació, si es que's creu que hi ha despreocupats capaços de fer tort al reglament pel qual se regeixen. Està en l'ànim i en els propòsits de «K. E. F.» excitar la creació de Federacions consemblants. Millor que's fundin per propria iniciativa, car aixís se demostra que hi ha vida esperantista. I no està concretada aquí encara la nostra acció, sinó que anem molt més enllà: aspirem a iniciar, o a contribuir al menys, a la creació de la Federació Mundial. Avui es una utopia encara, car hi manquen els fonaments. Per això nosaltres treballem els de nostra terra, per a arribar-hi; i 'ns plau, particularment, que no siguem sols a encaminar-nos-hi.

Prop. 5.^a — Veus-aquí 'l gran anhel de tot grupo: publicar un periodic! Convinc amb un amic, qui fa pocs dies que a *Tulmonda Espero*, anteriorment un altre a *Jen*, se planyien de massa periodics! Amics! Es una preocupació la creença que molts periòdics signifiquin revelació de vida! No i mil voltes no! Jo us convido a que reflexioneu un moment, i considereu quant més valdria, per exemple, que 'ls tres periodics que a Catalunya 's publiquen ne componguessin un no més: el preu de cost fóra 'l mateix que'l nostre, amb l'aventatge de poder ser espléndid i curull d'informació i de text!

Actualment (i això no es cap acusació per a ningú) cap dels nostres pot

comparar-se, per exemple, al *British*, a la *Germana*, etc.! I pensar que podriem assemblar-nos-hi!

Nosaltres ho declarem sincerament: un nou periodic traurà, avui per avui, vida i concurs als existents, i no respondrà a cap necessitat ineludible. I creiem que tal procedir fóra suïcida. Si vosaltres, correligionaris de Girona, opineu convenient tal medi de comunicació, us proposem que envieu petició al Concell de «K. E. F.» sollicitant una part del portaveu KATALUNA ESPERANTISTO pera la vostra secció oficial. Desde ara va nostre apoi a vosaltres. Sobre tot, uniu i tendiu a unir: no disgregueu. — LA REDACCIÓ.



«INTERNACIA ASOCIO DE INSTRUISTOJ»

Por respondi al multaj demandoj kaj deziroj, la Prezidanto de «I. A. I.» informas ke la 1^{an} de aprilo Sro. Čejka skribis ke la tria kajero de *Internacia Pedagogia Revuo* estas kompostata. Oni do povas esperi baldaŭan ricevon kaj kontentojn. «I. A. I.» anoj vizitontaj la Ekspozicion en Brukselo estas petataj elekti la 1^{an} de septembro. Tiun tagon ili povos renkonti komitatanoj, almenaŭ la Prezidanton kaj la Sekretarion ĉe la gasta tablo de *Le Moulin d'Or*, 30, strato d'Assaut, apud la preĝejo Ste. Gudule. Oni memoru kaj dessciigu.

JOSEF ALBAGÉS
konstanta korespondanto

La Escuela Moderna profesia revuo el Madrid, ekkomencis publikigi esperantan paĝon, Protektu ĝin, karaj samideanoj instruistoj. — J. A.



KORESPONDADO

Sro. A. T. Vi ĝin vidos en venonta numero. — A. B. Via verko aperos en unua venonta numero. — G. C. (Igualada). Ni ricevis vian unuan kaj duan tradukajojn. — «Pri Balmes». Bedaŭrinde vi ne esperantigis ĝin fidele, kaj ĝia korektado ŝajnos nova traduko: ni ne havas tempon por ĝin verki novan fojon. — S. P. Korajn dankojn. En la venonta numero ĝi aperos. — J. P. Ankaŭ vi vidos ĝin baldaŭ enpresigita. — Sro. Vicente Albamonte. Ricevita vian verketon, Ni ĝin legos. — A. M. Same kiel la antaŭa.

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO □ OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
SEN PAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
12. strato Gracia. — SABADELL
BARCELONA-HISPANUJO

A VIZO: La Redakcio konservas al si la rajton korekti laŭ bezono la manuskriptojn. Neakceptitajn manuskriptojn oni ne resendas.

ENHAVO: Originalaj Temoj. — La Sesa Kongreso. — Ĵaluza Malsano. — La Papilio. — Studkomisio pri ĉiulanda verkaro. — Elĉerpitaj sciigoj. — Kongreso de U. E. A. — Enlan Movado. — Bibliografio. — Korespondado.

ORIGINALAJ TEMOJ

DENOVE ni intencas atentigi la bonvolemajn legantojn pri la ŭrga bezono krei en la esperantista popolo originalan literaturon. Ĝi estos unu el plej intimaj gloraj motivoj: ĝi honoros nian potencon rason, varmigos ĉiutempe la koron de la legantoj, almitos por niaj vicoj altvalorajn pionirojn kaj kunhelpos, de nun jam, al la vera triumfo ĉe la registaroj.

La simpatiaj Floraj Ludoj feliĉe enkondukitaj en niajn Universaliajn Kongresojn, la konkursoj ofte organizataj de tiu aŭ alia gazeto kune kun la iniciativo de multaj kaj la konstanta protektado de grupoj, redakcioj aŭ altaj institucioj: ĉiuj diritaj kaŭzoj tiamaniere favoras la kreon, kreskadon, eĉ riĉigon de nova originala literaturo, ke opinieble, baldaŭ nia ora sonĝo estos sukcese kronata per la plej rapida serio de definitivaj triumfoj.

Kaj por iomete kunlabori al tia nobla celo, oni al ni permesu skribi kelkajn vortojn pri temoj elektindaj, kvankam estos afero preskaŭ sen necesa.

Ni apartigu la gazetaron el la verkoj. Ĉar la gazeto devas esti legata sen profunda pripenso, ĝi povas nur enhavi simplajn skrib-

aĵojn: historietoj, rakontoj, noveletoj, mallongaj priskriboj pri scienco, literaturo, arto, moralo, kutimoj. Rilate al la ĉiam alloga kiel neniam forlasebla poezio, la gazeto povas kaj devas ĉiunumere sin ornami per lirika poezieto, ĉu sentema, ĉu sprita: nun priskribante ĉarman pejzaĝon, poste honorante la virton aŭ riproĉante la malvirton.

Koncerne apartajn verkojn tiel broŝurajn kiel volumajn, la originala teksaĵo povas aperi tre ampleksa, ĉiam nova, senfine alloga laŭ diversaj fontoj. Efektive, se la skribaĵo pritraktas didaktikan aferon, ĝia larĝa kampo estas la scienco, filozofio, historio, fiziko, naturhistorio, lingvistiko, matematiko, industrio.

Se ĝia celo estas moralo, tiam priskribos aferon dian, homan, socian. Fine, se la verko devas nur amuzi kaj ĝojigi la spiriton per la senĉese novaj ĉarmantaj kreaĵoj de la homa genio; ĝi povas kanti epikajn agojn de l'heroj, reprodukti por bonintenca moralo vivajn scenojn dramatikajn, aŭ laste, kanti ankaŭ, ne heroaĵojn, sed lirikan belon tiel vaste dissemitan en la naturo. Tiuj lastaj priskriboj rilatas al kamparo, al monto, al rivero, al fonto, al arbaro, al valo, al birdoj, al bestoj, al fizikaj fenomenoj, al maro, al ĉielo.

Noveloj kaj priskriboj estas hodiaŭ la plej serĉataj verkoj. La reganta kihotismo precipe estas nuntempe la freneza tralegado de tutkoloraj noveloj. Nu, oni verku tiujn, historiajn, imagajn, kutimajn; sed ĉiam kaj ĉie teksante la instruon aŭ plezuron kun la reĝino de la feliĉeco: la moralo. — Originalaj verkistoj inter aliaj: Pujulà, Leono Zamenhof, Vallienne, Dombrowski, N. Kolovrat, Boirac, Sentis, Moch, Tomiĉ.

S. PUBILL SK.



LA SESA KONGRESO

JEN pasis La Sesa! La mondkongreso de la Esperantistoj en Usono jam fariĝas historio!

Je la kvara kaj duono posttagmeze, Sabaton la 13^{an} de Aŭgusto, alvenis ĉe la Washingtona stacidomo Dro. Zamenhof, lia viveca edzino; Kolonelo Pollen, prezidanto de la «Brita Asocio»; Sro. Mann, redaktoro de *Brita Esperantisto*; Sro. Rollet de l'Isle, de la «Scienca Asocio»; kaj aliaj esperantistaj eminentuloj.

Entuziasmege la ĉeestantoj laŭte ekkriis: «Vivu! Vivu Zamenhof!» Por la unua fojo en Usono oni aŭdis tiun vivigan krion.



LA KONGRESANOJ DE LA SESA INTERNACIA ESPERANTISTA KONGRESO

Preskaŭ la tuta de l'urbo esperantistaro iris renkonti la Majstron; inter aliaj: Dro. Yemans, vic-prezidinto de «Esperanto Asocio de Norda Ameriko»; Kapitano Perogordo, vic-prezidinto de l'«Kvina Kongreso»; Dro. Mybs, de la «Konstanta Komitato de l'Kongresoj»; Sro. Chavet, de la «Centra Oficejo»; kaj Gesinjoroj Reed, de l'«Organiza Komitato».

Post vespermango ĉe l'hotelo Arlington, raportisto de ĉiutaga ĵurnalo *The Star* petis intervjuon.

«Tio, kio plej multe min impresis, tuj kiam mi metis piedon sur teron en la nova mondo,—diris la doktoro;—estas la sento de libereco, kiu kvazaŭ vibras en la aero usona kaj kiu aperas videble sur preskaŭ ĉiu vizaĝo, kiujn oni renkontas sur la stratoj. Ankaŭ min multe frapis la viva nerva energio, kiu evidente instigas ĉiun amerikanon.

«Estas por mi kvazaŭ tute nova lando, al kiu mi ankoraŭ ne tute alkutimiĝis. Nov-Jorko estas urbego tiel kolosa, tiel dinamika, tiel tute malsimila je kiu ajn eŭropa urbo, ke ĝi inspiras ĉe mi nevenkeblan miron.

«Kvankam la Esperantista Movado en Usono estas ankoraŭ tre juna, ĝi jam montras grandan vivpovon, kaj promesas vastan progresadon.

»Eble la plej grava faro por la disvastigado de nia afero estas la kuraĝigo kaj kora kunhelpado de la tutmonda gazetaro, kaj poste la simpatio kaj aprobo de ĉiuj lernejoj kaj kolegioj. Ke nia lingvo Esperanto tiom penetru en la lernejojn de Usono, kiel ĝi jam pli kaj pli penetras en multajn lernejojn en Eŭropo, tio estas la plej kara revo de nia tuta esperantistaro.»

Kompreneble Dro. Zamenhof parolis Esperanton. «Mia kono pri la angla estas teoria, — li diris angle, en la komenco de l'intervjuo, zorge elektante ĉiun vorton. — Mi ne povas interparoli per tiu lingvo. La vortoj venas tre malrapide. Mi preferas uzi mian propran.» Kaj, laŭ la raportisto, tion li tuj ekfaris, kun tiom da viveco kaj rapideco, ke Dro. Yemans, kiu tradukis, trovis malfacile sekvi lin.

Pli malfrue ĉe la hotelo okazis neformala akcepto, en kiu la delegitoj ekkonatiĝis unu kun la aliaj.

DIMANĈON 14^{an}

Ĉe la Episkopa preĝejo de Sta. Paŭlo, Pastro Paul F. Hoffman, el Baltimoro, legis Esperante la Diservon kaj la preĝojn; Pastro James L. Smiley, el Anapoliso, predikis. La Esperantistoj ĉeestis grandnombre kaj atente sekvis la respondojn en Esperanto. Dro. Smiley diris en parte: «Kiel la Romanoj estis forte antaŭenpuŝantaj de granda deziro progresi, pligrandigi ilian imperion, konstrui novajn vojojn, plivastigi la uzon de iliaj instruleĝoj, tiel same la moderna mondo senlace klopodas efektivi la aerflugadon, eltrovi ĉiujn sekretojn de la Naturo, kaj ricevi unu solan internacian lingvon — ĉio ĉi havanta la nepran tendencon starigi tuthoman interfratecon.»

Pro la foresto de Pastro Bianchini, el Italujo, la Katolikoj ne havis la proponitan Esperantan Diservon ĉe la Preĝejo de Sta. Patriko.

Vespere okazis koncerto ĉe la Arlington. Partoprenis Sino. F. A. Williams; el Wheeling, West Va.; Fino. Agnes Preston, el Riverdale, Md.; kaj Sro. Herbert Harris, el Portland, Me.; Fino. Cora S. Butler, el Nov-Jorko; kun mandolino; Fino. A. F. Mears, el Detroit, kun piano — solistoj. Kvarteto, konsistante el Sino. Williams, Fino. M. K. Anaker, el Pittsburg, Sroj. E. Newell, el Center Sandwich, N. H., kaj C. A. Wyrick, el Chicago, faris tre plaĉan impreson. Kantis Sino. Williams ankaŭ novan esperantan kanton, *L'Ekzilo*, kiun komponis Profesoro Querino, el Rio de Janeiro, kiu kunludis. Kolonelo Pollen kaj Sro. Richard Sharpe, el Anglujo, kaj Fino. Anaker deklamis Sro. Mann, redaktoro de *Brita Esperantisto*, prezidis.

LUNDON 15^{an}

Diras la *Star*: La Sesa Mondkongreso oficiale malfermiĝis hodiaŭ matene per la solena kunsido, kiu okazis je la 10^a en la granda salonego de la Arlington. Estis vivoplena kaj interesa sceno. La granda ĉambro estis tiel plena, ke multaj samideanoj devis stari. Laŭta aklamado aŭdiĝis kiam eniris Dro. Zamenhof, la amata Majstro. Tuj lin sekvis Kapitano Perogordo, el Hispanujo, kiel reprezentanto de la Prezidinto de la Kvina Kongreso en Barcelono; Dro. Mybs, kiel reprezentanto de la Prezidanto de la Konstanta Komitato de l' Kongresoj, Generalo Sebert, kaj de la Prezidanto de la Akademio kaj Lingva Komitato, Rektoro Boirac; Sro. Edwin C. Reed, Sekretario de la Kongresa Komitato; kaj Sro. Gabriel Chavet, Sekretario de la Konstanta Komitato de l' Kongresoj.

Sur la estrado jam sidis multlanda kaj pitoreska kompanio, konsistanta el la oficialaj reprezentantoj de la diversaj registaroj, la diverslandaj vicprezidantoj kaj delegitoj, inter kiuj videblaj estis diversaj oficiroj, kaj du Ĥinoj en nacia kostumo.

Post kiam Kapitano Perogordo formale malfermis la kunsidon, Dro. Hale, reprezentante Sron. John E. Barret, Ĉefon de la Internacia Oficejo de la Amerikaj Respublikoj, oficialan Prezidanton de la Sesa Kongreso, diris esperante al la kongresanaro kelkajn korajn vortojn de bonveno en Usonon.

Dro. Yemans, vicprezidanto de la Kongreso, legis telegramon de Sro. Barrett, kiu bedaŭris, ke la devo lin malhelpas persone partopreni, kaj invitis la ĉeestantan samideanaron al solena akcepto merkredon vespere en la salono de la Internacia Oficejo, kiam li povos mem saluti ilin. Dro. Mybs tiam paroladis kaj esprimis bedaŭron pri la foresto de Generalo Sebert kaj Rektoro Boirac, kaj faris proponon — aklame akceptitan — ke la Kongreso sendu al ili telegramojn pri manko de la grandegaj servoj, kiujn ili dum la pasinta jaro faris al Esperanto per sia sindonema laborado.

Sro. Chavet nun faris la kontentigan sciigon, ke la Sesa superis ĉiun ĝisnunan Kongreson pri la nombro de Registaroj reprezentataj, entute dekunu; t. e., Brazilo, Gvatemalo, Ĥinujo, Hispanujo, Honduraso, Kosta-Riko, Meksiklando, Persujo, Rusujo, Urugvajo, Usono (Armeo, Maristaro, kaj Internaj Aferoj). Ankaŭ la ŝtatoj Sud-Karolino kaj Florido sendis oficialan delegiton.

Speciale kurioza por la aŭskultantaro estis la parolado, kiun faris ĥinalingve la ambasadoreja sekretario Lu Ping Tien. Sro. Mello Souza sciigis, ke la Brazila registaro jam en Esperanton metis

afiŝojn en la publikaj telegrafejoj kaj telefonejoj. Kapitano Perogordo diris, ke la Reĝo Alfonso XIII per persona letero rekomendis la lingvon al sia Ministro de Internaj Aferoj.

Poste Sro. Chavet legis la diversajn salutajn telegramojn ricevitaĵojn. Ili venis el ĉiuj landoj, montrante la veran disvastiĝon de la movado.

Sekvis la solena parolado de la Majstro, kio ĉiujare estas la plej interesa afero de la Kongresoj. Varmega aplaŭdado salutis la multajn trafikajn vortojn, per kiuj la amata Doktoro karakterizis la ĉefajn punktojn de nia lastatempa agado. Efektive la Esperantistaro estas feliĉa havi gvidanton kaj konsilanton tiel modeste saĝan kaj taktan, kiel Dron. Zamenhof. La Majstro esprimis la koran deziron de ĉiu Esperantisto per tiuj vortoj:

«Ni esperas, ke, dank' al nia laborado, pli aŭ malpli frue la tuta mondo similigos al ni kaj fariĝos unu granda homa gento, konsistanta el diversaj familioj, interne apartlingvaj kaj apartmoraj, sed ekstere samlingvaj kaj sammoraj.»

Entute, tre sukcesa kaj promisplena estis la malfermo de ĉi tiu grava Kongreso, kiu sendube multe antaŭenigos la aferon tra la tuta mondo.

Dum la posttagmezo la diversaj naciaj delegitoj faris raportojn pri la movado en iliaj landoj kaj vespere la kongresanoj ĝuis tre agrablan ekskurson per la vaporsipo *St. Johns* sur nia bela Potomac. Enŝipiĝinte prezice je la sunsubiro, la ekskursanaro dum kvar horoj vojaĝadis laŭ la rivero ĝis Indian Head (Kapo de Ruĝhaŭtulo) kaj reen al la kajo. Ili vidis la Militkolegion, la malnovan vere antikvan monitoron *Puritan*, la noblan kolonian domon de George Washington (Mount Vernon), kaj ĉiujn belajn viditajn per lumo de la luno. Ĉe la antaŭa pinto de la ŝipo flirtis la bela Esperanta standardo, kaj la ekskursanoj kantis la himnon *La Espero* kaj aliajn Esperantajn kantaĵojn kaj dancis harmonie al kelkaj Esperantaj arioj.

Oni ĉe la posttagmeza kunsido prezentis al Dro. Zamenhof specialan oran insignon, per Dro. E. C. Reed.

MARDON 16an

Hodiaŭ matene okazis neniuj ĝenerala kunveno de la Esperantistoj, sed anstataŭ tio la delegitoj kunvenis en sekciajn kongresetojn. El tiuj ĉi la plej grava estis la kunveno de la Lingva Komitato, kiun prezidis Dro. Zamenhof mem.

Ĉe tiu ĉi kunveno la plej grava afero estis la legado de la ra-

porto de la prezidanto de tiu komitato, Dro. Boirac, Rektoro de la Dijon Universitato, kiu bedaŭrinde ne povis ĉeesti. Dro. Zamenhof ankaŭ resumis la punktojn, kiujn li diskutis en sia hieraŭa parolado, kaj la komitato pripensis kaj priparolis multe da aferoj rilate la progresadon de la lingvo.

Aliaj okazintaj grupkunvenoj estis respektive la de la Juristoj, Kuracistoj, Fervojistoj, Inĝenieroj, Flegistinoj; Ĵurnalistoj, Liberpensuloj, Katolika Unuiĝo, kaj Instruistoj.

Ĉiuj tiuj ĉi okazis en konstruaĵo «George Washington» Universitato. La kunvenoj tute ne estas oficialaj kunvenoj de la tuta Esperantistaro, sed nur de tiuj personoj, kiuj estas interesitaj pri Esperanto rilate sian propran pensfakon aŭ priokupon. Ĉiu kunveno diskutis la utilecon de Esperanto rilate ĉi tiujn aferojn kaj faris planojn por pli vaste konatigi Esperanton al siaj sampensuloj aŭ samprofesiuloj.

Posttagmeze la kengresanoj ĝuis ekskurson al tiu bela natura vidaĵo, la kaskadoj de la Potomac rivero. En tiu alloga loko ili iom refreŝiĝis post la gravaj laboroj de la Kongreso mem.

Vespere oni prezentis teatraĵon, tradukon el Shakespeare, *Kiel Plaĉas al Vi*, sur la bieno de la Bristol lernejo. La tradukaĵo estas farita de Dro. Ivy Kellerman-Reed, la brila kaj ĉarma edzino de la Sekretario de la Amerika Asocio.

MERKREDON 17^{an}

La kongresanoj estis tre malĝojaj, hodiaŭ matene, kiam oni anoncis en la ĝenerala kunsido, ke pro la bedaŭrinda morto de Prezidanto Montt, el Ĉilo, kiu subite mortis hieraŭ, ĵus kiam li alvenis en Bremen, Germanujo, la invito de Sro. Jhon Barrett al akceptado en la Internacia Oficejo de la Amerikaj Respublikoj estis nuligitaj. La kunsido, tuj kiam oni anoncis la morton de la prezidanto, aprobis decidaĵon, ke la Sesa Kongreso de Esperanto bedaŭras la morton de Prezidanto Montt, kaj esprimas koran simpatian.

Oni anoncis kaj legis telegramon de Prezidanto Taft, kiu dankis al la kongresanoj pro la ricevita telegramo salutanta; kaj siavice sendis al la Sesa Kongreso saluton kaj koran gratulon.

Dro. Mybs legis por Generalo Sebert, kiu pro malsano ne povis partopreni la kongreson, raporton resuman de la Konstanta Komitato. La raporto rilatas al la propono starigi tutan internacian konsilantaron, kies membroj, elektitaj laŭproporcie de la anoj de ĉiu nacia asocio, zorgos pri financaj aferoj de la ĝenerala centra oficejo.

Oni ankaŭ anoncis la akcepton de la invito ricevita el Antwerp, ke la Sepa Internacia Kongreso okazu tie.

Poste, Kapitano Poshnikov, el Rusujo, invitis la Kongreson por Rusujo en 1912^a, kaj Sro. George Warnier, el Parizo, anoncis, ke oni esperas havi la 1914^a Kongreson en Parizo.

Ĝus antaŭ la fino de l' kunsido, Sro. Frank Morrison, sekretario de la «American Federation of Labor» (Amerika Federacio de Laboristoj), mallonge parolis en la angla lingvo. Sro. Mann tradukis. La sekretario promesis lerni Esperanton, kaj opiniis, ke ĝi nekalkuleble valorus kiel komunikilo inter la laborklasoj de l' mondo.

Antaŭ la labora kunsido okazis la tre interesa disdonado de premioj de la Literatura Konkurso. Doktoro Yemans unue prezentis Sinon. Marie Hankel, reĝino de la Literatura Konkurso ĉe la Kvina Kongreso. Ŝi diris kelkajn vortojn, kaj tiam prezentis Dro. D. O. S. Lowell, Lernejestro de la «Roxbury Latin School», Boston, ŝtato Masaĉusetso, kiu disdonis la premiojn. Inter multe da aplaŭdado, la jenaj ricevis premiojn:

Por poezio pri «Universala Frateco»: J. B. Mello Souza, el Brazilo (arĝenta medalo).

Por prozaĵo pri «Universala Frateco»: Fino. Esther Higgs, el Anglujo (arĝenta medalo).

Por originala rakonto: Sro. H. S. Hall, el Cleveland, ŝtato Ohio (arĝenta medalo).

Por originala rakonto skribita de junulo: Sro. Raymond T. Bye, el Germantown, ŝtato Pensilvanio (arĝenta medalo).

Por traktato pri la Utileco de Esperanto en Komerco: Sro. W. S. Vogler, el Hamburg, Germanujo (\$10.00, donacita de la Washingtona Komerca Ĉambro).

Por traktato pri la Biblio: W. L. Church, el Bostono, Mass. (libro donacita de D-ro U. G. B. Pierce, antaŭ nelonge Kapelano de la Usona Senato).

Por traktato pri la Simileco de Zamenhof kaj Lincoln: James Robbie, el Skotlando (la verkoj de Zamenhof, lukse binditaj).

Posttagmeze la kongresanoj vizitis Mount Vernon.

Vespere ili partoprenis neformalan akceptadon ĉe la Arlington.

ĴAUDON 18^{an}

Okazis kunsido de la Universala Esperanto-Asocio. Pastron Paul F. Hoffman oni elektis prezidi, kaj Sinjoro Mann estis sekretario. La

delegitoj diskutis rimedojn por plivastigi la agadkampon de ĉi tiu grava asocio.

Sro. Leigh Mitchell Hodges, ĵurnalisto, faris plaĉan paroladeton, en kiu li esprimis la esperon, ke dum sia vivtempo okazos, ke tiu, kiu ne povas paroli Esperanton, estos tiel kurioza, kiel nun ŝajnas tiu, kiu povas!

Delegitoj el la diversaj partoj de Nord-Ameriko ankaŭ kunvenis kaj elektis por la nova jaro la jenajn:

Prezidanto, Sro. John Barrett, Bureau of American Republics, Washington, D. C.

Vicprezidanto, Dro. H. W. Yemans, Ĥirurgo, U. S. Armeo, Fort Wayne, Detroit, Mich.

Sekretario-Kasisto, Sro. Edwin C. Reed, Columbus, Ohio.

Konsilantaro: New England, Dro. C. H. Fessenden, Newton Centre, Mass.; New York, Henry D. King, Brooklyn; Eastern, H. W. Hetzel, Filadelfio; Ohio Valley, H. S. Hall, Clevelando; Central, Dro. B. K. Shimonek, Chicago; Southern, Virgil C. Dibble, Charleston, S. C.; Prairie, C. J. Roberts, Omaha, Neb.; Southwestern, E. E. Haynes, Levis, Kan.; Mountain, F. H. Loud, Colorado Spgs., Col.; Western, W. L. Crissey, Portland, Ore.; Capital, James L. Smiley, Anapoliso, Md.

Posttagmeze la kongresanoj ĉeestis la basbalan parkon por vidi konkurson inter la kluboj «Cleveland» kaj «Washington». Oni preparis por la uzo de la ĉeestantoj esperantan libreton pri la reguloj. La «umpire» (decidanto) kelkfoje elparolis siajn decidojn en Esperanto, kio tre gajigis lian aŭdantaron. Ĉeestis ĉirkaŭ 250 kongresanoj, kiuj reprezentis 35 naciojn. Ilin oni grupigis ĉe unu flanko de l' parko sub la verda standardo, kaj ŝajne ili tre interesiĝis pri nia nacia sporto.

Vespere Sekretario Gabriel Chavet bone parolis kun ilustraĵoj pri urbo Antwerp; Profesoro W. J. Spillman, eminenta scienculo el la Agrikultura Fakto de l' usona registaro, pri «Videbla Parolo kiel Helpilo al la Lernado de Esperanto». Prezidanto Barrett neformale akceptis la kongresanojn ĉe la Estrejo de l' Amerikaj Respublikoj.

VENDREDON 19^{an}

Je la matena kunsido Sinjoro Dawe, direktoro de la Suda Komerca Kongreso, prezentis al la kongresanoj inviton okazigi la 1915 Internacian Kongreson en New Orleans, ŝtato Luiziano. Estis disdonitaj en la kunsido du mil ekzempleroj de lia adreso, la esperantan

tradukon de kiu faris Sinjoro Virgil C. Dibble, la tre agema kaj bonkora Konsilanto por la Sudo. La urbo San Francisko ankaŭ estas konkuranto por tiu Kongreso.

Dum la tago, pro la foresto de Prezidanto Taft kaj la Sekretario por Fremdaj Aferoj, la oficialaj delegitoj estis akceptitaj de la Sub-Sekretario de tiu departemento de la usona registaro.

Posttagmeze, la postulantoj por la voĉrajto por la virinoj kunvenis. Doktoro Arnhold, konata bankiero el Dresdono, Germanujo, prezidis. La ĉefan paroladon faris Sinjorino Marie Hankel, el Dresdono, Ĉi tiu fama sinjorino estas ne nur fervora propagandistino de la ideo de internacia lingvo, sed ankaŭ arda advokato de l' virinoj pri la afero de egalrajteco kun la viroj. Aliaj, kiuj parolis pri sama temo, estis Sinjoroj W. Kurrie, el West Australia, kaj A. Rudy, el ŝtato Nord-Karolino.

Sekciaj kunvenoj de la poŝtofistoj, la Teosofistoj, la instruistoj, la financistoj, la vegetarianoj, kaj aliaj kompletigis la laboran tagon.

Vespere, kompreneble oni dancis. Britoj, Usonanoj, Latin-Amerikanoj, Rusoj, Ĥinoj, Hispanoj, Francoj, Kroatoj, Italoj, Germanoj, Poloj, Aŭstralianoj, Hebreoj — popoloj el la plej malsamaj kaj plej malproksimaj regionoj de l' mondo frate intermiksitis. Laŭ kostumo oni povis rekoni ies nacion, sed ĉiuj parolis nur unu saman lingvon — Esperanton; kaj ĉiuj apartenis al nur unu sama frata unuiĝo — la Esperantismo.

La *Post* (ĉiutaga ĵurnalo) diras: «Per internacia lingvo la malsamaj ĉeestantoj akordiĝis, kaj ĉiuj sentis sin tiel senĝenaj kiel en la konsiliĝaj kunsidoj dum la semajno. La balo estis aparte socia, kaj ĝi estis alia triumfo por la nova lingvo, montrante tre efike ĝian taŭgecon por ĉia uzo. Ifoje la muziko trafe speguligis naciajn trajtojn; tamen la danco *Virginia Ree* kaj la milita melodio de l' Sudo *Dixie* ĉarmis ĉiujn korojn. Estis neeble kalkuli la naciojn, kiuj partoprenis la dancon, tiun malnovan favorataĵon. Ne nur la Nordo kaj la Sudo aplaŭdis la konatajn karajn kanterojn, sed ankaŭ la Oriento kaj la Okcidento kuniĝis spirite en la ĝojo.»

La plej pentrinda, laŭ kostumo, el la fremduloj ĉeestintaj, estis Kolonelo John Pollen, el la Brita Armeo. Tiu sinjoro estas Irlandano, sed li servis al la Angloj kiel ambaŭ soldato kaj diplomato dum multaj jaroj kaj portas sur la brusto multajn medalojn ricevitaĵajn pro tiu servado. Sinjoro Pollen vestis sin per nigra frako kaj mallonga blanka pantalono, la kapo fezkovrita. Liaj ŝtrumpoj estis blankaj; kaj la tuta kombinaĵo prezentis ideon pri sia epizodplena vivo.

SABATON 20^{an}

Estis nur unu kunsido — dum la mateno. Parolis kelkaj sinjoroj; tiam Dro. Zamenhof solene fermis la Kongreson. La Majstro esprimis sian varmegan dankon al ĉiuj, diris kelkajn kuraĝigajn vortojn pri la movado, — kaj la Sesa jam ne estas. «Ĝis revido ĉe Antwerp!»

Multaj delegitoj tuj ekiris hejmen; aliaj restis en Washington por ĉeesti la vesperan paroladon de Kolonelo Pollen. La paroladinto uzis la anglan lingvon kaj liaj frapantaj frazoj kaj bonaj ŝercoj tre ĝojigis lian aŭdantaron. Kompreneble la temo de la parolado estis liaj spertoj rilate la Esperantan propagandon dum tramonda vagado kaj vizitado ĉe Esperantistaj grupoj. Kiel rezulto de tiuj longaj vojaĝoj, la Kolonelo pli kaj pli firmiĝas en sia fido je Esperanto kaj sia kredo je la fina kaj senkonkuranta triumfo de nia bela lingvo.

Antaŭ nelonge Sinjoro Pollen travojaĝis Aŭstralion kaj Nov-Zelandon. Pri tiu vizito la Aŭstraliaj ĵurnaloj estas dirintaj multe. El la *Banalla Independent* (dusemajna ĵurnalo kun sekcio en Esperanto) ni elĉerpas jenan noton de la Esperanta Klubo en Sydney:

«La Sydneya Klubo daŭrigas progresadi. Anstataŭ ĉiudusemajne, la anoj kunvenas ĉiun mardon, kaj okazas ankaŭ neoficialaj kunvenetoj en la botanikaj ĝardenoj por babilado kaj pro societamo. La vizito de Doktoro Pollen, prezidanto de la Brita Esperanto-Asocio, ekcitis novan intereson pri nia afero. De la tempo kiam la ŝipo alproksimiĝis la kajon, kaj la entuziasmoplena doktoro elpendigis sian verdan standardon, ĝis lia foriro al la stacidomo, kie li propagandis inter la fervojoficistoj, liaj klopodoj estis senĉesaj. Li ĉeestis ĉe nia semajna kunveno kaj faris paroladon, kaj diris vortojn de konsilo al la geanoj, kiuj multe estimis ilin.»

KELKAJ NOTOJ PRI LA SESA

Dudek du eksterlandaj Esperantistoj vojaĝis Usonon per la vaporŝipo «George Washington»; inter ili Droj. Zamenhof, Mybs kaj Pollen. La ŝipa orkestro ludis la Esperantan himnon. Oni ankaŭ preparis menuon laŭ Esperantaj nomoj kaj Sinjoroj Mybs kaj Pollen faris paroladojn; Sinjoro R. Sharpe instruis klasojn.

Aliaj fremdaj delegitoj estis: Sinjoroj H. Arnhold, el Dreseno; Fernando Burmudez, el Meksiklando; R. Carter, el Durbano, Sud-Afriko; Frederick Chauvreau, el Lavallo, Francujo; Profesoro Cotton, el Parizo; Jules Forestier, el Ĝenevo; M. Nisgor, el Francujo; Cornelius Gottschall, el Gratz, Aŭstrio; Mariano Osmeno, el la Filipinaj

Insuloj; Joseph S. Kurrie, el Kalgorlie, Aŭstralio; Vladisear M. Tabenski, el Litvujo, Ruslando; Felix Vellalo, el Meksiklando; Georges Warnier, el Parizo; Sinjorinoj Giamar, el Nice; Marie Hankel, el Dresdono; Tiard, el Francujo: Fraŭlinoj Kathe kaj Marie Elizabeth Jahns, el Braunschweig, Germanujo.

Mihaelo Pleshe, delegito el Kroatujo, perdis sian monujon kun sia mono en Svisujo, sed la svisaj samideanoj provizis lin je sufiĉe por la vojaĝo al Anglujo; kaj la anglaj helpis lin atingi Nov-Jorkon. Tie kaj ankaŭ ĉe Washington li trovis aliajn oferemajn amikojn.

Ĉeestis la Kongreson ĉirkaŭ 500 Esperantistoj. El tiuj kompreneble la plejmulto venis el la orientaj kaj la mezaj ŝtatoj de Usono. Laŭ nia nuna informo nur Sroj. Lewis, el San-Francisko; William George Adams, el Seatlo; kaj J. C. Cooper, el McMinville, reprezentis la okcidentajn ŝtatojn. La kosto de la vojaĝo malpermesis al ni tiun plezuron.

Ĉeestis la prezentadon de la teatraĵon, *Kiel Plaĉas al Vi*, pli ol mil personoj, la plejmulto Esperantistoj aŭ aliaj, kiuj ekinteresiĝis pri la lingvo. Ili montris la plej grandan entuziasmon. La aktoroj estas artistoj; kaj sub la lerta direktado de Sinjoro Robert Nugent Hickman ili prezentis la belan esperantan tradukon laŭ maniero ricevi koregan aplaŭdodon. Ĝis antaŭ du monatoj, neniu el la Hickman kompanio konis eĉ unu solan vorton de Esperanto! Malgraŭ tio ili bone kaj facile elparolis la esperantajn frazojn, ĝuste tiel facile kiel ili povas paroli la anglajn. Oni starigis la scenejon sur bienon de la «Bristol» lernejo. Post la scenejo staris malgranda arbaro, de kie la aktoroj eniris. La bieno estis lumigata per japanaj lanternoj, la scenejo per kalciaj lumigiloj. La tuto ravis ĉiujn kaj tre plaĉe konformiĝis al la delika imagaĵo kaj ĉarmo de ĉi tiu arbara rakonto de l' amo. Oni diras, ke la talentplena tradukistino nun havas enpresote novan bonan gramatikon.

Laŭ raporto, Doktoro Zamenhof intencas resti en Usono dum kelkaj semajnoj antaŭ ol iri returnen al sia hejmo en Rusujo. Ankaŭ oni diras, ke Sinjorino Marie Hankel vizitos ĉe la hejmo de Sinjoro W. L. Church en Bostono, Mas.

Malgranda grupo da Washingtonaj policanoj lernis Esperanton speciale por uzo dum la kongreso.

Dum la kongreso anonco venis el Francujo, ke la «Franca Aero Klubo» starigis novan regulon, laŭ kiu la petanto por la permeso funkciigi balonojn, aeroplanojn, k. s., devas unue lerni paroli Esperanton!

ĴALUZA MALSANO

Dediĉita al mia simpatia
amikino M. Grau

BELA vespero! La suno sin vestas per ĝiaj plibelaj lumradioj kaj ludetas malkviete sur la klaraj kristaloj kaj sur la agititaj supraĵoj de la fontoj. En la dikeco de l' arboj belega verdeco diras «Printempo».

La du panjoj promenas. La du gefiloj kuras: infano kaj infanino. Ili amuziĝas, saltas, kantas, sin kisas kaj ridas.

Kaj alia infanino de sama aĝo alvenas kaj ekpartoprenas kun ili en iliaj infanaj ludoj. Li apudiĝas kaj salutas ŝin per kiso: — Vi ludos kune kun ni — li diras.

Lia antikva amikineto proksimiĝas al li. Ŝi faras malplaĉan geston: — Mi jam ne amas vin — ŝi diras.

Kaj ŝi iras al ŝia panjo.

* * *

«Tiu kiu ne estas ĵaluza amas senzorge» Tion diris poeto, aŭ filozofo aŭ eble simpla enamiĝintulo. La Amo kaj la ĵaluzo estas, do, samtempaj. Mi aŭdis al iuj amikoj kiuj multe amadis kaj sincere konfesis ke ili sentis multfoje ĉirkaŭtordiĝi en ilia animo la terura ĵaluza vipero.

Kaj Marinjo ankaŭ: Marinjo la infanino kiu en la promenejo foriris kun ŝia panjo ĉar ŝia ludamiketo estis kisinta amikineton je bonveno.

La vizaĝo de Marinjo estas el vakso, flava, kiel esprimo de korpreno, kaj de kolero, kaj de doloro kaj de venĝo. Ŝiaj okuloj montras la neforigeblan signon de senĉesa plorado. Kaj ŝi portas metita en la koro akrapintan dornon kiu iam post iam internigas pli kaj pli.

Marinjo mortigas. Kio okazas al ŝi? — diras ŝiaj amikinetoj. Mi scias la sekreton. Ŝi suferas ĵaluzan malsanon.

* * *

Marinjo estas ĉarma virineto. Kaj ŝi havas fianĉon. Ĉar estas la unuan fojon kiu ŝi enamiĝis, amfreneziĝas. En la promenejo ŝi vidis lin, kaj tio estas ĝuo por ŝi. Sed ŝi kiu vere amas, volis diveni ri-

gardon de sia amanto al alia deloganta fraŭlino kiu apud li pasis.

— Li rigardis ŝin! Mi vidis ke li rigardis ŝin!

La dorno, kvazaŭ ludspadeto vundas la animon de Marinjo. La ĵaluza mal trankvileco aligas dolorajn kaj kolerajn horojn. Ŝi suferas.

— Mi ĵuras al vi, Marinjo, ke mi neniun amas escepte al vi. Ĉu vi aŭdas? nur al vi.

— Vi rigardis sin. Mi vidis ĝin.

— Tio estas delirioj viaj. Miaj okuloj ridetas kiam vidas vin. Via vizago estas ĝia gloro.

— Kun ŝi vi iris ian tagon...

— Kien? Kiam? Kiel? Vi vin kondamnos pro mensogema. Mia animo estas via.

— Diru ke vi ŝin amas.

— Diru ke vi volas desesperi min. Diru ke vi havas fiebron, ke vi estas freneza... Estas via mia amo. Ĉu vi ĝin kredas?

— Ĵuru tion alifoje.

— Kaj se si volas milfoje.

— Mi ne dubas de vi!...

* * *

Marinjo sola, en ŝia apartamento pensas pri li, pri ŝia bela en-amitulo.

— Jes, li min amas, mi scias ke li min amas... Li ĵuris tion al mi! Mi legas tion en siaj okuloj!... Sed tiun tagon li iris kune kun tiu alia fraŭlino. Mi ne scias se ŝia akompananto estis li. Mi kredas ke jes. Ne. Kaj en la promenejo li rigardis ŝin. Mi ne vidis ĝin bone. Ŝajnas al mi ke li rigardis ŝin. Certe li amas pli tiun fraŭlinon ol min! Mi scias ke li ŝin amas! Fi! Ve!

* * *

— Kiu estas tiu fraŭlino, kies okuloj estas ĉagrenaj kaj la vizaĝo kvazaŭ vakso, tiu kiu similas malfortan rozon velkiĝonta baldaŭe per la mortventego?

— Ĉu tiu vi demandas? Ŝi estas la ĵaluzmalsanino.

ARTUR TORNÉ

★ ★ ★

LA PAPILIO

IAM estis papilio kiu flirtis sur floroj. Infaneto ĝin ekvidis kaj ĝin juĝis tiel belegan ke li volis ĝin kapti kaj tial, li tuj ekpersekutis ĝin.

Sed ĉiufoje kiam la infano alprosimiĝis al la papilio, ĝi sin levis tra la aero kaj forflugis.

«Ho! lasu ĝin, kara infano» al li diris lia patrino; lasu ĉi-tiun papilion kaj kontentiĝu vidante ĝin tiel feliĉan kaj liberan; ĉar se vi ĝin tuŝus, ĝi perdus sian belecon kaj ankaŭ vi perdus la plezuron de viaj okuloj,

La infaneto estis obeema; li obeis la patrinon kaj ĉesis persekuti la belegan papilion, kiu tuj sidiĝis sur florplena branĉo de vastkorpa kreskaĵo.

Ĝi estis flava papilio gracie festona, brile pluŝa kaj ornamita per emajlaj ruĝenigraj punktetoj, kaj disĝutita per blankaj makuletoj perlosimilaj.

Ĝi havis kvar flugilojn kiuj estis tiel malpezaj ke ilia ekmovo, kvankam tre rapida, ne kaŭzis ian ajn bruon. Dum sia flugado, ĝi havis siajn piedojn fleksitaj laŭlonge de sia korpo; sed kiam ĝi ie restis, tiam ĝi ilin montris kaj tial, la infaneto povis kalkuli al ĝi tri ĉe ĉiu flanko.

Poste, li ekvidis ke ĝi malfaldis delikatan rostreton kiel senpeza fadensilko kiun ĝi havis enfaldita je la buŝo, kaj ĝin metis delikate en la kalikojn de la plej freŝaj floroj kie ĝi enspiris ĝian nutraĵon sen nenion difekti.

Sed la papilioj ne povas longe resti en la sama loko. Post kelkaj momentoj ĝi lasis la florplenan branĉon kaj ekflugis tien-ĉi-tien, desegnante tra la aero tre kapricajn zigzagojn kaj saltetante de unu floro la alian kun tia rapideco, ke sia pezo ne kaŭzis al ili plej malgrandan skuon kaj eĉ apenaŭ ilin tremigis.

La infaneto ne laciĝis je tiel ĉarma spektaklo; li ne povis turni de ĝi siajn okulojn; li timis ke la papilio denove ekfugus kaj malaperus.

La dezirego ĝin posedi forgesigis al li la saĝan rekomendadon de sia patrino, kaj momenton kiam la ĉarma papilio sen malkonfido trankvile trinketis sur la kaliko de bela rozo, tiam la infaneto avide ĝin kaptis!...

Atinginte sian celon, li ĝojplena malfermis sian maneton kie li

havis ĝin enkapitata; sed... ho ve! Kio fariĝis la tiel gracia insekto?

Delikata orbrila pulvoro kovris la fingretojn de la infaneto, kaj la papilio duone dispremita sin agitis kaj tremigis siajn dispecigitajn flugilojn.

Pro tia ekvido, la sensperta infaneto restis konsternita! Baldaŭ grandaj larmoj malsekigis siajn okulojn, kaj tuj li kuris kaŝi sian ĉagrenon ĉe la brakoj de sia bona patrino, kiu lin vidante tiel dolora kaj tiel penta pro lia malbona agado, ne riproĉis lin; male, ŝi lin konsolis.

Tiel same la homo senĉese klopodas dum sia vivo; li ne laciĝas pro la reserĉado de feliĉoj, riĉecoj kaj honoroj; li konstante bataladas kontraŭ la malhelpaj baroj renkontitaj ĉiupaŝe; sed... ho ve! Tuj kiam ŝajnas al li atingi sian deziritan celon, tiam li ekvidas la senkonsoligan nenion de ĉiaj aferoj.

Kio fariĝis objekto de siaj plej karaj priokupoj, tio nun ŝajnas al li sengusta! seninteresa! senĉarma!!

Tradukis el franca lingvo,

FINO. K. S. (*Katalunino*)



STUDKOMISIO PRI ĈIULANDA VERKARO

(*Sekvo*)¹

FARIĜI HOMO kun la senco FARIĜI GRANDA ALTKRESKA FAMA SERIOZA
RESPEKTINDA, k. c. (enlanda esprimo)

Sab. — Mi pruntedonis eĉ mian junecon por ke ĝi fariĝu homo kaj por montri ĝin (50) (oni parolas pri pentraĵo).

Orig. — *Que m'he empenyat fins la joventut pera poguer-lo (el quadro) fer home i ensenyar-lo.*

Rap. — ... ke mi elspezis eĉ mian junecon por elfini ĝin kaj ĝin montri.

1) Mallongigoj. — Sab: Teksto de Sro. A. Sabadell. — Orig: Teksto originala. — Rap: Ĝusta traduko laŭ opinio de la Raportinto. — La numeroj montras la paĝojn. (Vidu la numerojn 4^a kaj 5^a.)

Sab. — Ju pli pentraĵojn ci pentros des pli per ili ĉi fariĝos homo. (62)
 Orig. — *Tant com més quadros vagis fent més home t faras amb els quadros.*

Rap. — Ju pli pentraĵojn ci pentros des pli per ili ci fariĝos fama (aŭ granda).

Sab. — Ke ci fariĝu homo! (73)

Orig. — *Fes-te home!*

Rap. — Ke ci fariĝu fama (granda, grava).

Sab. — Mi faros cin homo per ridoj. (90)

Orig. — *Jo t faré home amb rialles.*

Rap. — Mi vin helpas per ridoj.

Sab. — De la tempo, kiam vi faris el li homon. (101)

Orig. — *De desde que vostès l'han fet home...*

Rap. — De post kiam vi igis lin fama.

INTERESI POR

Sab. — La dorso kaj la kruroj ne interesas por tio! (14)

Orig. — *L'esquena i les cames no compten!*

Rap. — La dorso kaj la kruroj ne enkalkuliĝas! (Laŭvorte).

JALUZIO

Sab. — La jaluzio ne lasas... (102)

JAM (kataluna *ja* = jam, ja, nu!, estas ofte uzata nur por plifortigi la frazon)

Sab. — Mi *jam* tion diros al ŝi. (130)

Orig. — *Ja l'hi diré jo!*

Rap. — Mi mem (tion) diros al ŝi.

Sab. — Jes, mi jam rememoras, mia «exvoto». (69)

Orig. — *Sí, me'n recordo, el nostre exvot.*

Rap. — Jes, mi memoras, mia... (?)

Sab. — Ne laciĝu, mi jam vidas, kien vi celas. (71)

Orig. — *No 's cansi, que ja veig aont va!*

Rap. — Ne laciĝu, mi bone vidas kien (aŭ kion) vi celas.

Sab. — Mi jam malŝatas tion, sed tiel mi ne devus agi. (101)

Orig. — *No'n faig cas, però hauria de fer-ne!*

Rap. — Mi ne priatentas, sed mi devus priatenti! (Laŭvorte kaj laŭsence.)

JE post pasiva participo

Sab. — Ili estas ĉirkaŭitaj je ĉiaj tentadoj. (21)

KATALANA

Sab. — ... *katalana* (41) (100) (kovriloj).

Rap. — Kurioza rimarko: La radiko katalun' estas uzata de ĉiu enlanda societo, estas titolo de ĵurnalo, kaj ĉie preskaŭ unuanime akceptata. Tamen oni legas en la Voŝt. de R.^o Boirac: «Katalana» rilata al Katalunujo. Oni havas *ankaŭ* «kataluna». Mi nur renkontis «katalana» en *La Patrino*.

KE

Sab. — Sed mi korpreniĝis, kaj mi havis deziron vidi cin! Ke mi ne povis atendi plu!... (75)

Orig. — *Però estava enguniosa i tenia desitjos de veure-t! Que no m'he pogut aguantar més...*

Rap. — Sed mi estis maltrankvila kaj mi deziradis vidi cin! Nu mi ne povis plu min reteni... (Laŭvorte.)

Sab. — Ĉu kompatinda, ĉar mi havas filon, kiu estos saĝulo? Kiu tia jam estas? Ke en la urbo ĉiuj amas lin? Ke ĉiuj laŭdas liajn penetraĵojn? (78)

Orig. — *Pobra, de tenir un fill que serà un savi? que ja ho es? que a ciutat tothom l'estima? que tothom alaba ls seus quadros?*

Rap. — Ĉu malfeliĉa ĉar mi havas filon, kiu estos saĝulo? kiu tio jam estas?, kiun ĉiu amas en la urbo kaj kies penetraĵojn ĉiuj laŭdas?

Sab. — Kio estas tiu ĉiodoro? — Ke alvenis manĝaĵoj... (64)

Orig. — *Que es aquesta olor? — Que ha arribat vianda...*

Rap. — Kio estas tiuodoro? — Manĝaĵo, kiu alvenis (aŭ: Alveninta manĝaĵo.)

Sab. — Certe mi tion jam scias; sed mi ŝatas pli pentri; kaj ne vivi; ol fari, kion ĉiuj nomas vivadi! Ke mi ne povas fari pli ol mi nun faras! (52)

Orig. — *Això ho sé del cert; però m'es timo pintar, i no viure per fer lo que tothom ne diu viure. Que no puc fer més de lo que faig?*

Rap. — Tion mi certe scias; sed mi pli ŝatas pentri kaj ne vivi, ol fari tion, kion ĉiu nomas vivi! Ĉu mi ne povas fari pli ol mi faras?

KION MI SCIAS, kun la duba senco ĈU MI POVAS SCII?

Sab. — Patrino, kion mi montros al tiuj ĉi pentristoj? — Kion mi scias, ve al mi! (31)

Orig. — *Mare: però què 'ls ensenyaré an aquests pintors? — Què sé jo, pobra de mi!*

Rap. — Sed, patrino, kion mi montros al tiuj pentristoj? — Ĉu mi povas scii, mi malfeliĉa!

Sab. — Ĉu ci scias, kion mi intencis fari? — Kion mi scias? (51)

Orig. — *No sabs de què 'm van venir ganes? Què sé jo!*

Rap. — Ĉu ci scias, kion mi intencis fari? (aŭ: Kiu deziro venis al mi?) — Mi ne scias!

Sab. — Eble ci ne fartas bone, ĉu okazos io al ci? Kaj kion mi scias! (75)

Orig. — *Que si no estarà bo, que si li passarà alguna cosa, que qui sab!*

Rap. — Eble li ne fartas bone, eble io okazas al li... eble... ĉu mi scias kion ankoraŭ.

Sab. — ... iluziojn je glora koloro kaj... kion mi scias! (87)

Orig. — ... *visions de color de gloria i què sé jo!*

Rap. — ... glorkolorajn viziojn kaj... ĉu mi scias kion ankoraŭ?

Sab. — Kio estas pli dolora por ŝi? — Kion mi scias? (94)

Orig. — *Què es lo que li fa més pena? — Què sé jo!*

Rap. — Kio estas pli dolora al ŝi? — Mi ne scias!

KOMPROMETI

Sab. — Mi ne scias, kiu vin komprometas. (28)

Orig. — *No sé qui 'l fa comprometre.* (La frazo havas de sencojn.)

Rap. — Mi ne scias, kial vi kompromitas la aliajn (aŭ): Mi ne scias, kial vi kompromitas vin mem. (Antaŭ alĝustigas al la dialogo.) (Laŭvorte: Mi ne scias, kiu igas vin kompromiti la aliajn, aŭ vin mem.)

KUNULECO

Sab. — ... tiuj, kiuj konante knabinon pli ol ili devus ŝin koni, faris kunulecon kun ŝia patrino. (108)

Orig. — ... *els que, coneixent a una noia més de lo que l'havien de conèixer, feien conxorxa amb la mare!*

Rap. — ... tiuj, kiuj konante knabinon pli ol ili devus koni starigis kunligon kun la patrino!

KUTIMINTAJ JE

Sab. — La pentristoj ne uzas ceremoniojn. Ni estas kutimintaj je ĉio. (37)

Orig. — *Els pintors no 'n fem, de compliments. Estem avesats a tot.*

Rap. — Ni pentristoj ne faras komplimentojn. Ni kutimiĝas al ĉio. (La vera senco estas, ĉar ili rifuzas sidlokon: «Ni estas bone harditaj», aŭ: «Ni estas harditaj per ĉio.»)

KVIETECO

Sab. — Kvietecon! (68)

Orig. — *Calma!*

Rap. — Trankvilon!

LA

Sab. — Ĉu mi ne devas pripensadi, ke mi, la sinjorino Amparo, la vidvino de la Kapitano..., (57)

— Antaŭ ili marŝadas la sinjoro Instruisto. (144)

— Mi jam scias, ke la patrino estas kiel arbo kaj la filoj kiel la frukto. (22)

— La patrino estas prava parolante kiel ŝi parolis. (39)

— Terpomo je la kremo, kun tatara saŭco. (66)

— Kaj Izidro? Kaj la sinjoro Instruisto? (76)

— Kaj la sinjoro Instruisto, mi ne scias kion li komisiis. (77)

LASI AL anstataŭ LASI-N

Sab. — Lasu fari al mi. (32)

Orig. — *Deixa-m fer a mi.*

Rap. — Lasu min fari.

LAŬ

Sab. — Mi ne scias, sed mi multe timas laŭ cia vojo. (21)

Orig. — *No ho se, però m fa molta por el teu camí.*

Rap. — Mi ne scias, sed via vojo multe timigas min. (Tiu ĉi traduko estas laŭvorta kaj ŝajnas al mi tre klara. Kial enuzi «laŭ» kaj en tia stranga maniero?

Sab. — Mi jam tion diros al ŝi: kaj laŭ mi kredas. (130)

Orig. — *Ja l'hi diré jo! I li diré a la meva manera!*

Rap. — Mi mem tion diros al ŝi! Kaj mi diros miamaniere. (Ankaŭ tiu ĉi traduko estas laŭvorta. Kial do, «laŭ mi kredas»?

LUIGI, kun la senco LUPREZI kaj LUDONI

Sab. — Mi ŝuldas la ĉambran luigon. (53)

Orig. — *Devem el lloguer.*

Rap. — Ni ŝuldas la luprezon (de la cambro).

Sab. — ... ĉar mi ne luigas la korpon... (115)

Orig. — *... es que no m'he llogat el cos...*

Rap. — ... ĉar mi ne ludonis mian korpon...

LULILIS

Sab. — Kaj mi lulilis ĉin, kaj lulilante ĉin... (142)

Orig. — *I t breçava, i tot breçante...*

Rap. — Kaj mi luladis ĉin kaj lulante...

MARTIRAJ

Sab. — La martiraj amikoj... (60)

Orig. — *Els amics martirs...*

Rap. — La amikoj martiroj... (en la okazo kiam la frazo estos tradukebla).

MUELILO

Sab. — Ke ĉe ni flaris, kvazaŭ ĝi estus muelilo. (99) (vidu flari)

Orig. — *Que a casa feia flaire de moli.*

Rap. — Ke nia hejmo odoris, kiel muelejo.

MULTE, MULTO

Sab. — Multe ja estas la diferenco = Certe ĝi estas multe. (115)

Orig. — *No n'hi ha poca de diferencia! I tanta si n'hi ha!*

Rap. — Ne estas malgranda la diferenco! = Efektive, ĝi estas granda.
(aŭ multa)

Sab. — Multo da gajaj vilaĝanoj eniras en la vendejon. (144)

Orig. — *Entra una multitud alegre a la botiga.*

Rap. — Gaja popolamaso eniras en la butikon. (Laŭvorte)

NAŬZIGI AL

Sab. — Ci naŭzigus al mi! (118)

Orig. — *Em faries fàstic!*

Rap. — Ci naŭzus min!

NE EĈ en neo frazo

Sab. — La arto ne akceptas havi serajlon ne eĉ por la plej junaj korinklinoj. (54)

Orig. — *L'Art no admet tenir serrallo, ni per a les afecions més pures.* (Nekomprenebla frazo).

Rap. — La Arto ne permesas havi serajlon, eĉ por la plej puraj korinklinoj.

(Daŭrigos.)



ELĈERPITAJ SCIIGOJ

Unu el la plej eminentaj kaj plej fruktodonaj polaj verkistinoj, Eliza Orzeszko, mortis la lastan Majon. Ŝi estas konata de la ĉiulandaj esperantistoj danko al Dro. L. L. Zamenhof, Dro. Kabe, kaj aliaj. Ŝiaj verkoj *La interrompita kanto*, *Marta*, *Bona Sinjorino* kaj *A. B. C.* estas el la plejmultaj legataj kaj adorataj de la esperantistaro. Per ŝiaj multenombraj verkoj ŝi celis servi al la patrujo kaj al sia nacio, kaj ĉiuj estis inspiritaj de plej noblaj kaj grandanimaj sentoj, kaj de plej varma koro. Ŝi estis la unua emancipantino en Polujo, kiu danko al sia grandega talento antaŭ enpuŝis la virinan movadon. Ni bedaŭru ŝian morton!

*

La klera esperantisto Sro. V. Inglada Ors, estas elektita akademiano el la Lingva Komitato, laŭ balotado. Ni varme gratulas nian samideanon.

*

Okazis en Augsburgio la 1^a Kongreso de Tutmonda Esperanta Kuracista Asocio. El raporto de la Sekretario de la T. E. K. A., ni sciigas ke ĝi havas preskaŭ 700 anojn. Aliĝis ĉirkaŭ 200 dum la lasta jaro. Pripensante ke la plej granda nombro el ili estas izolitaj kuracistoj oni povas pretendi, ke la disvolviĝo de T. E. K. A. estas bonega. 110 kolegoj reprezentas ĝis nun la Asocion kaj konsile kaj fakte helpas ĉiujn petantajn esperantistojn kaj neesperantistojn. La T. E. K. A. nur ekzistas de post 3 jaroj, oni do povas esti kontenta!

Oni elektis Anverpenon kiel lokon de venonta dua Kongreso.

★ ★ ★

UNUA KONGRESO DE "U. E. A."

EN AUGSBURG (BAVARUJO)

(28 Julio — 3 Aŭgusto 1910)

Nur de du jaroj ekzistas nia Universala Esperanto-Asocio (U. E. A.) kaj jam nun ĝi enhavas pli ol 8,000 membrojn. kaj Delegitojn en 850 urboj de la tuta mondo. Neniel ni esperis, ke ĝi tiel rapide, senhalte kaj mirige disvastiĝos; sed ĝia vere praktika konstitucio, ĝia utileco kaj neceseco ne nur por Esperantistoj, sed precipe ankaŭ por la neesperantista internacia komercistaro kaj vojaĝantaro nepre garantias al ĝi grandiozan estonton. Laŭ la statuto U. E. A. regule kunvenas dum la ĉiujaraj esperantistaj kongresoj. Sed ĉar tiun jaron la kongreso okazas en Ameriko, la Asocia Komitato decidis aranĝi specialan kongreson por U. E. A. en eŭropa urbo.

La fervora Esperantistaro de Augsburg afable invitis nin organizi la kunvenon en sia urbo, kien samtempe estis kunvokitaj la kongresoj de Germana Esperanto Asocio kaj de la Tutmonda Kuracista Asocio. La invito danke estis akceptata kaj en la lastaj tagoj de Julio la Esperantianoj multnombre veturis a la bela kaj gastigema urbo Augsburg.

La 28 de Julio okazis la solena malfermo de la kongreso. La granda salono en la Hotelo «3 Mohren» estis plenigita ĝis la lasta anguleto. Sur la gustoplene ornamita estrado aperas la ĉefurbestro de Augsburg, reĝa kortega konsilanto Wolfram, kaj la Komitato de U. E. A.

Sinjoro H. Bolingbroke Mudie, la prezidanto de l'Asocio, malfermas la kunsidon per afablaj salutparoloj. Poste la ĉefurbestro en la nomo de la urbo Augsburg bonvenas la kongreson per jenaj vortoj:

«Tre estimata kongresanaro, kiel ĉefurbestro de Augsburg kaj honora prezidanto de la esperantistaj kongresoj en nia urbo, mi diras tutkoran bonvenon al la membroj de la Unua Kongreso de U. E. A. Kun granda ĝojo ni preparis en nia urbo gasteman akcepton al viaj kunvenoj kaj ni deziras, ke vi sentu vin hejme inter ni, kaj ke vi forportu el tie bonan rememoron kaj poste plezure povu repensi pri viaj tagoj en Augsburg. Ni precipe deziras, ke tiuj kunvenoj favoru kaj antaŭenhelpu la aferon en ĉi tiu urbo. Kiel centro industriplena, kies produktoj jam dissendiĝas tra la tuta mondo, ni havas tre grandan intereson por la ideo de esperantismo, kaj mi mem persone tre bedaŭras, ke mi ne ankoraŭ povas saluti vin en via komuna lingvo. Sed mi intencas lerni tiun lingvon kaj jam trovis la personon, kiu instruos al mi almenaŭ la elementojn de Esperanto. Kio hodiaŭ jam ne ekzistas, tio povos efektiviĝi morgaŭ. Ĉeestinte la kunsidojn de U. E. A. mi nepre konvinkigis, ke Esperanto estas vivanta, bonsona kaj spiritplena lingvo, kiu jam tre disvastiĝis kaj certe havos plenprosperan estonton. Ni ĉiuj estis plej agrable surprizitaj pri la belsoneco de via idiomo, kiu tamen ne celas forpelon de la naciaj lingvoj, sed nur estas mirinda interkomprenilo inter ĉiuj civilizitaj popoloj.

En la espero, ke per via entuziasmoplena laboro esperantismo ĉiam pli kaj pli prosperos, mi ripetas al vi: Estu tutkore bonvenataj en Augsburg.»

En fluega kaj bonstila Esperanto Sro. H. Hodler, vic-prezidanto de U. E. A. alparolas la ĉeestantaron kaj eksplikas la taskon de niaj kongresoj.

Bona festeno dume estis pretigita por la kongresanoj, kaj la unua tago forflugis gaje kaj kontentige.

En la sekvantaj tagoj okazis la sep laboraj kunsidoj, plej lerte gvidataj de S^o Mudie kaj ĉiam tre bone vizitataj de la Esperantianoj. Oni multe laboris. Entuote 26 raportoj pri administraj, financaj, komercaj, junulaj, turismaj demandoj kaj pri multe da pli-malpli flankaj aferoj estis farataj. Ne estas ĉi tie la loko por detale raportoj pri ĉiuj laboroj, iniciatoj, proponoj kaj decidoj. Sed ni nepre devas aldoni, ke la Kongreso dum 7 laboraj kunsidoj diskutadis kaj decidis pri 71 demandoj. Tio certe signifas gravan kaj sukcesplenan laboron kaj denove pravas, ke U. E. A. estas plej vivoplena kaj progresema entreprenno, kiu sin okupas pri praktika aplikado de nia lingvo.

Flanke de la ĉiutaga laboro la kongresanoj ĝuis kelke da bone organizitaj

plezuroj. Bela vesperfesto kunigis la gajan popolon en la Schiessgraben, granda, belega ĝardeno; dimanĉon la 31 de Julio oni faris ekskurson al Füssen kaj la reĝaj kasteloj de Neuschwanstein; alian vesperon S^o Privat faris impresigan paroladon en Esperanto, kiun ĉeestis ankaŭ multe da ne-esperantistoj. En la granda salono de la Borso S^o Prof. Lederer el Prag publike paroladis pri U. E. A. kaj esperantismo kaj gajnis multe da adeptoj.

La lastan vesperon de la kongresa semajno okazis granda vesperfesto en la Schiessgraben. La festo, al kiu ĉeestis pli ol 500 personoj, komencis per parolado kun lumbildoj pri Klondykela orolando en Norda Ameriko. Ankaŭ tiu parolado estis farata de nia eminenta samideano Prof. Siegfried Lederer el Prag. Poste ni aŭdis belegon koncerton kaj fine la ĉiam gaja junularo — kelkaj tamen ne estas tre junaj — amuziĝadis je dancado.

La Augsburga Esperantiano, kiu tre bone kaj lerte organizis la tutan kongreson, kaj la U. E. A., estis aranĝintaj belegan ekspozicion en granda salono de la Hotelo «3 Mohren» Tiu ekspozicio la tutan tagon estis plena je vizitantoj, ne nur el la kongresanaro, sed precipe ankaŭ el la urbo Augsburg. Esperantia Librejo disvendis siajn librojn, broŝurojn, insignojn, ktp. Alia librejo el Augsburg ankaŭ disvendis librojn, kaj ni aŭdis, ke la aferoj tre kontentige prosperis.

Post la Augsburga kongreso multe da Esperantianoj vizitis Munchenon, kie la tiea grupo estis organizinta promesplanan postkongreson.

Pasigante nun ĉiujn okazintaĵojn antaŭ nia memoro, ni kun granda ĝojo nepre devas konstati, ke la Unua Kongreso de U. E. A. neatendite bone sukcesis, ke ĝi multe helpis kaj helpos al nia movado, ke U. E. A. per tiu kongreso pruvis sian necesecon kaj bonon por la ĉiuspecaj internaciaj rilatoj. Ni ne dubas, ke ĉe nia proksimjara dua kongreso U. E. A. ankoraŭ pli forte staros, ke ĝiaj jam nun tre diversspecaj servoj estos ankoraŭ pli bonaj kaj pli ampleksaj, ke nia anaro tiam estos atingita la respektindan nombron da 10,000 membroj. Antaŭen Esperantistoj, amase aliĝu al nia Asocio, jen la vere praktika solvo kaj aplikado de Lingvo Internacia. — Ĝis revido en Antverpeno!

J. SCHMID, L. K.

(Komitatano de U. E. A.)



ENLANDA MOVADO

BARCELONO

Teatra festo. — Por solenigi la datrevenon de la apero de la unua esperanta lernolibro la «K. E. G. Supren...» organizis teatran feston kiu okazis la 30^{an} de Julio.

Dum la festo estis ludataj la komedioj *Edziĝo malaranĝita* de Sro. Inglada, *Vivu Esperanto!* de nia samlingvano Sro. Cases kaj «La renkonto» de



KELKAJ GERONAJ ESPERANTISTOJ DUM LA GERONA ASAMBLEO

S-ino Hankel. En la ludado partoprenis f-inoj Ferrán, Fontanelles. Grau kaj Puig kaj Sroj. Aubeyzón, Grau, Nicolau kaj Puig (J. kaj M.) kiuj estis helpataj de S-roj Renom kaj Piñol.

Al ĉiuj ni sendas nian gratulon pro ilia bonega ludmaniero. Ni ankaŭ same gratulas al la grupo «Supren...!» de kies agemeco ni esperas pliajn efektivigaĵojn.

Ekskursoj.—La esperantista grupo «La Rondo» organizis ekskursion la 21^{an} de Aŭgusto al Sant Boi del Llobregat, kie la ekskursanoj vizitis la frenezulejon.

La societo «Espero Kataluna» organizis ekskurson la 14^{an} kaj 15^{an} de Aŭgusto al Montserrat. La ekskursanoj faris la iran vojaĝon piede dum la mateno de la unua tago. La sekvantan tagon ili vizitis la famekonatan monton kaj revenis Barcelonon per la lasta vagonaro.

La sama societo organizis alian ekskurson la 21ⁿ de Aŭgusto, tra la Tibidabo kaj Vallvidrera kies celo estis viziti societaninon tie loĝantan.

Kurso.—La grupo «Libero», ree invitis la samurbanojn lerni Esperanton en sia sidejo—Mercé, 19 pral.—dum lundo kaj vendredo ĉiusemajne.—LA DELEGITO.

Ekskurso.—La grupo «Barcelona Stelo» organizis ekskurson al la najbara

urbeto Hospitalet kaj samtempe viziton al la fabriko Trinchet. Ĝi okazis en la 28^a de Aŭgusto kaj estis vera sukceso.

En la ekskurso partoprenis, krom la nomita grupo, la sekvantaj: «Supren!», «Universala Frateco», «La Rondo» kaj «Forigu Barojn», ĉiuj el Barcelona, kaj kunvenis ĉirkaŭ ducent gesamideanoj.

Post la alveno al Hospitalet la ĉeestantoj estis salutataj de la urbkonsilantoj Sroj. Arús kaj Estadella kaj la Sekretario de la urbetestraro Sro. Prats, kiuj afable montris al ĉiuj la oficejon de la urbdomo, la elementaran knaban lernejon kaj la halon. En la lernejo faris paroladojn pri nia kara lingvo la samideanoj Serrano, Campdelacreu kaj Gili.

La vizito al la kotona teksika fabriko Trinchet elestis tre interesa. La direktoro de la fabriko Sro. Jozefo Armengol tre kompreneble kaj metode klarigis la malsamajn manipuladojn kiujn eksperimentas la kotono de kiam ĝi eniras en la fabriko ĝis kiam ĝi eliras ŝanĝita en perfektan teksaĵon. La pureco de la grandaj salonoj de la fabriko vokis multe la atenton de la vizitantoj.

La ekskursintoj iris piede ĝis la kvartalo Sans kaj antaŭ la sidejo de la grupo «Forigu Barojn!» kune kantis nian Himnon kaj kriis «Vivu Esperanton!»

En la lasta ĝenerala kunveno de la societo «Paco kaj Amo» oni elektis la jenan komitaton:

Prezidanto: Sro. Paŭlo Perez; *Vic-prezidanto:* Sro. Estanislao Alcover; *Sekretario:* Sro. Ramono Ribas; *Vic-sekretario:* Sro. Francisko Piñol; *Kasisto:* Sro. Enriko Abad; *Kalkulisto:* Sro. Petro Mayol; *Bibliotekisto:* Sro. Kvircko Redondo; *Voĉdonantoj:* Sroj. Johano Trius kaj Cecilio Ferrer.

Agrabla festkunveno okazis la 3^{an} de Septembro ĉe la grupo «La Rondo», ĝi konsistis el teatra ludado, legado de esperantaj poezioj kaj dancado, gaje finanta la festo.

Geanoj de la grupo prezentis la ŝatindan dialogon *La Ĉiama Kantaĵo* katalune originale verkita de Sro. S. Rusiñol, esperantigitan de Sro. A. Sabadell; la esperantan monologon *Je la unua horo nokte*, kies esperantan tradukon ni havas dank' al Sro. Campdelacreu kaj la katalunan verkon *Mestre Olguer* de nia mondfama verkisto Angel Guimerà.

Ĉiuj geaktoraj laŭdinde ĝuis siajn rolojn kaj la multenombra ĉeestintaro, kiu plenigis la teatran salanon, per longedaŭra aplaŭdado ilin premiis; ankaŭ oni aplaŭdis la legantinojn de la poezioj, kiuj multe plaĉis al ĉiuj.

Fine, aro da belaj samideaninoj partoprenis en la dancadon kaj la festo finiĝis plej gaje je la dua matene. Ĝi restos neforgesebla por kiuj ĝin ĉeestis kaj la sukceso de ĝi atingita certe kuraĝigos niajn gesamideanojn de «La Rondo» organizi denove similajn belegajn vesperkunvenojn.

GIRONA

Sukcese kaj entuziasmplene okazis en Girona la 14^{an} kaj 15^{an} de Aŭgusto, la unua provinca Asambleo de gerona'aj esperantistoj, organizita de «Gerona Esperantistaro».

Malgrau la malhelpado liverita de kelkaj esperantistoj, la Kongreson ĉeestis 90-100 samideanoj, kiuj tre interese kaj efike atingis la celon proponitan.

Aŭguston 14^a.—Frumatene la geanoj de «G. E.» kunvenis ĉe la gruposidejo por atendi kaj saluti la alvenintajn aliurbajn samideanojn. Je la 11^a matene oni sin direktis al Urbodomo, kunportante la flagojn de la grupoj «Paco kaj Amo» de Palafrugell kaj de «G. E.», kie ili staris dum la du tagoj de la Kongreso.

La salonon de la Urbodomo plenigis inda ĉeestantaro. Lia Moŝto la Urbestro salutis entuziasme la aliurbanojn, dezirante ke ilia restado en la urbo estu al ili tute ĝoja kaj gaja.

Sro. Lusilla, je la nomo de la Organiza Komitato, legis belan spritan leteron de Sro. F. Pujulà Vallès per kiu nia amiko aliĝas al la Kongreso kaj bedaŭras ke iuj samideanoj kontraŭstaru la agadon de la organizintoj de la Kongreso. Plue li bedaŭras ke lia malsano lin malpermesas partopreni en la Kongreso; li gratulas la organizintojn kaj kuraĝigas ilin daŭrigi antaŭen en la de ili entreprenita vojo. Oni aplaŭdis la kuraĝigan leteron de la kataluna pioniro. Sro. E. Dalmau raportis pri la organiza laboro de la Asambleo, kaj sciigis pri la al la Asambleo aliĝintaj grupoj: ili estas ok krom la «Esperanta Fako» de la «Centre Autonomista del C. y de la I.» de Barcelona, kiun en la kongreso riprezentis Sro. D. Dalmau. Kelkaj el niaj famaj samideanoj ankaŭ aliĝis.

Poste oni elektis la kongresan estraron laŭ la jena ordo: Sro. Arcadi Girona, el Palafrugell', *Prezidanto*; Sro. Ramon Casademont, el Girona', *Sekretario*, kaj kiel *voĉdonantojn* oni elektis ĉiujn riprezentantojn de la provincaj grupoj.

Sro. Canony legis proponon de Sro. Pujulà, kiun oni unanime akceptis. Jen ĝi: «La Asambleo esprimas ĝian bedaŭron pro la konduto de la estraro de la grupo kiun prezidas Sro. Cezaro Huecas, pro tio, ke ĝi klopodis por la malsukceso de la Kongreso; kaj pro tio ke ĝi sendis leteron al lia Moŝto la Urbestro de Girona' celante lin konvinki nei la oficialan protektadon al nia Kongreso. Ĝi-la Kongreso malestimas la ne korektaj esprimoj de la anoj de la grupo kiun prezidas la antaŭnomita sinjoro».

Proponis Sro. D. Dalmau sendi telegramon dankante kaj gratulante al Sro. Pujulà, kaj alia al nia respektinda majstro Dro. Zamenhof. Oni decidis finigi la malferman kunsidon, kaj daŭrigi la kongreson en la morgaŭa mateno je la 9^a.

Samideanoj el Olot', Bagur', Sant Feliu de Guixols', Barcelona', k. t. p., partoprenis en la Kongreso, kaj plie ĉeestis grandnombre niaj gekamaradoj el Palafrugell'.

Posttagmeze oni vizitis la monumentojn kaj belajojn de la urbo; la *Museu*, la *Institut*, la *Catedral*, k. t. p. Oni promenis tra la urbo, oni trinkis freŝajn trinkaĵojn ĉe «Peato» kaj je la vespero oni promenis tra la ĉefa kaj plej bela promenejo de la urbo—la Devesa—kie traŭras multenombre la tuta gironanoj.

Ĉe la «Orfeo Girona» okazis je la naŭa nokte esperantista festo. Sroj. Amich, Mitjá, Blanch, Dalmau (N.) kaj aliaj legis poeziojn; Sro. Dalmau (E.) ludis monologon, kaj ankaŭ ludis la belan unuaktan dramon de Sro. Pujulà Vallès,

Novelo, fraŭlinoj Dolors kaj Maria Llopart, kaj Sroj. Amich kaj Casademont. La festoalestantaro brue aplaŭdis la partoprenintojn, kaj estis tre laŭdata la kvarteto kiu ludis krom aliaj muzikajoj la himnon *Espero*.

Post la finiĝo de la festo oni sin direktis al la societo «El Menestral», kie okazis danco je la honoro de la gekongresistoj aliurbaj.

Antaŭ la ekkomenco de la nokta festo oni iris al la fervoja stacidomo doni la bonvenon al Sro. Prezidanto de «K. E. F.» Dro. J. Bremón Masgrau, kiu iris Girona'n por partopreni la Kongreson je la nomo de nia Federacio.

Aŭguston 15^{an}. — La 9^{an} matenon kolektiĝis en la salono de la urbdomo amaso da geesperantistoj. Prezidis Sro. Arcadi Girona, kaj sidis en la estrarejo Dro. Bremon kaj Sro. Dalmau (D.); el Barcelona'; J. Pi, el Olot'; Geli, el Sant Feliu de Guixols'; Lusilla, Canony kaj Amich, el Girona'; Sroj. Casademont kaj Dalmau (E.) agis kiel Sekretarioj.

Estis legata telegramo de Sro. Pujulá, kiun oni aplaŭdis. Oni aprobis la raporton pri la unua kunsido.

La temojn pridiskutotaj estis aprobitaj tiel:

1^a Restas starigita «Ligo» de provincaj geesperantistoj.

2^a Tia «Ligo» aniĝas al «Kataluna Esperantista Federacio».

La tria propono pri la publikigo de gazeto, estis eligita de ĝia aŭtoro, kaj oni decidis akcepti la proponon de la «K. E. F.», kiu per Dro. Bremón proponas uzi kiel organon de la Girona' provinca Esperantista Ligo, nian «Kataluna Esperantist».

Pri la 4^a kaj 5^a temoj proponitaj de Sro. Boix, la Kongreso decidis okazigi la 2^a Asambleon provincan, en Palafrugell', kaj oni elektis komision konsistantan el Sroj. Lusilla, Canony, Amich, Casademont kaj E. Dalmau kune kun alia komisió el la antaŭnomita vilaĝo.

Ankaŭ oni decidis gratuli Srojn Dro. Bremón, Dalmau (D.) kaj lia Moŝto la Urbestro de Girona' pro la de li al la Kongreso liverita kunhelpado kaj pro ilia alesto. Varmajn gratulojn oni donis ankaŭ al Organiza Komitato.

Sroj. Girona kaj Lusilla, dankis la ĉeestantaron kaj partoprenintojn, kuragigante ĉiujn daŭrigi semante nian ideon, sub la devizo Amo kaj Espero. La alestantoj aplaŭdis freneze kaj kriis «Vivu Girona', Palafrugell' kaj Dro. Zamenhof!»

Por solenigi la kongreson, kaj samtempe por honorigi la aliurbajn esperantistojn okazis tagmezmanĝo ĉe la *Hotel Peninsular*. Ĝin prezidis Dro. Bremón, kaj sidis ĉe lia dekstra flanko la samideanoj Girona, Casademont kaj Pi; kaj en la maldekstra, samideanoj Lusilla, Amich kaj Dalmau (D.).

Toastis esperante Sroj. J. Pi, je la nomo de la grupo «Olota Stelo»; J. Geli, esperante, je la nomo de la grupo de Sant Feliu de Guixols'; Sro. Blanch, katalune, ankaŭ el Sant Feliu de Guixols. Ĉiuj toastis por la bona harmonio inter la katalunaj esperantistoj, por la baldaŭna konkero de nia celo, kaj por la sukceso de niaj asocioj.

Sro. A. Girona, esperante, dankis la Asambleanojn pro tio, ke ili elektis lin prezidanton de la Asambleo, kaj promesis klopodi senĉese per la triunfo de la venonta.

Dro. Bremón, katalune, diris ke li sentis ĝojon tial, ke li estis inter entuziasmaj kaj junaj samideanoj, sed ke li bedaŭris la decidon okazigi la 2^a provincan Asambleon, pro tio ke ĝi malhelpos la 2^a Katalunan Kongreson kiu okazos en Tarragona' la venontan jaron, sed liaj timoj disigis kiam la alestantoj promesis fervore kunhelpadi tian Kongreson. Li bedaŭris plie ke inter la girona'aj samideanoj ekzistu ne harmoniaj interrilatoj, petante ĉiujn ke ili malaperigu la ne simpatiajn sentojn por la bono de ĉiuj. Fine, esperante, li parolis pri nia lingvo kaj pri Dro. Zamenhof, kaj liaj vortoj ŝajnis himno al nia Majstro kaj al Esperanto.

Li devis tuj forlasi la ĉeestantojn por iri al stacidomo, kien lin akompanis kelkaj el niaj samideanoj.

Toastis poste Sro. Dálmau (D.) je la nomo de «Esperanta Fako» de «C. del C. i de la 1^a, el Barceloná»; Sro. Lusillá, legis poŝtkarton de la grupo de Anglès, akceptante ĉiujn asambleajn decidojn. Li dankis kaj adiaŭis la gekongresanojn.

Finigis la tagmezmanĝo per la krioj «Vivu Zamenhof!» «Vivu Pujulá!» «Vivu Palafrugell!» kaj «Vivu Gerona'!» Kaj oni disigis kaj iris al stacidomoj por adiaŭi la aliurbanojn.

Tiel finiĝis la Kongreso, kiun mi esperas ke ĉiuj memoros ĝoje pro la bona akcepto kaj afekcio de la gerona'aj samideanoj liveritaj. Mi esperas plue ke ĉiuj klopodos por sukcesigi plej baldaŭe tion kion ni starigis, kaj tion, kion ni akceptis: t. e. nia «Ligo» kaj «K. E. F.» Ni lernu de la kamaradoj de tiu lasta Asocio pligrandigi kaj disvastigi nian nombron, kaj ni sciu kunhelpi ĉiun societon. Ke niaj promesoj ne restu senfruktiĝaj, kaj ili ne restu nuraj vortoj mi plej fide esperas.

Parolado. — Nia senlaca samideano kaj klera esperantisto Sro. Delfi Dalmau en la vespero de la 15^a Aŭgusto faris pri Esperanta paroladon en la salono de la Urbodomo. Estas bedaŭre ke niaj samideanoj ne sentu plian simpatian por la superaj aferoj, kiel unue montris kaj kiel ili montras en antaŭaj okazoj. Estas pro tio ke nia lerta samideano ne povis esti aŭskultata de multaj neesperantistoj. Mi petas korege al miaj urbaj samideanoj ke ni klopodu vekigi niajn tro dormantajn samurbanojn kaj ilin alvarbi al nia celo aŭ almenaŭ vekigi en ili la simpatian por nia afero, ĉu per aparta propagando ĉu per la ĵurnaloj.

La de nia amiko farita parolado ni povas konsci en tiuj vortoj: ĝi estis bela, konvinkiginda parolado inda de lertulo. — E. GRUARTMONER, *Delegito*.

VILANOVA I GELTRU

Estis granda sukceso por la grupo «Laboro Esperanta» la unua loka Ekspozicio de Esperantaj poŝtkartoj. Ĝi estas enlokigita en la Esperanta lernejo ĉe la «Ateneu». Niaj gesamurbanoj multenombre vizitis ĝin.

Oni sukcesis kunigi milon da poŝtkartoj plejdiversaj, kaj de la plej mal-samaj nacioj.

La disdonado de premioj al Esperantaj lernantoj, prezidis la estraranoj de la «Ateneu» kaj ankaŭ la Vilanova' Urbestro.

Sro. Mestres, la unua prezidanto de nia grupo, raportis pri la agado de «L. E.» Li dankis la «Ateneu»-on pro la donaco de la diplomoj, kaj ĝin gratulis pro tio, ke ĝi estas la unua «Ateneu» en Katalunlando kiu entreprenis tian feston. — J. SERRA.

OLOT

Okaze de la unua Girona'a provinca Asambleo, aliris al Girona' nia samideano Sroj. M. Prat, J. Vila, kaj Sro. J. Pi kiel delegito de «Olota Stelo», por partopreni la taskojn de ĝi.

Feliĉe la decidoj aprobitaj de la samideanoj de la Girona'a provinco estas belegaj kaj grandvaloraj por ĉiuj katalunaj esperantistoj, kaj eĉ, precipe por nia nekomparebla amegata «Kataluna Esperantista Federacio». Oni aprobis: fondi provincan Ligon por disvastigi la Zamenhofan lingvon, kaj ĉiujare, por tia celo, efektivigi festan ekskurson al ia el la urboj apartenantaj al nia provinco; aliĝi tiu Ligo al «K. E. F.».

Por plene efektivigi la celojn de la provinca Ligo, la estroj de la grupoj klopodos kaj penos por ke iliaj kunsoci-tanoj ĉiuj aniĝu al «K. E. F.».

Certe, do, bonsukcesis la Asambleo por la plena organizado de la katalunaj esperantistoj.

Ĉe Olot' oni ankaŭ rimarkis entuziasmon por nia afero, ĉar iuj, laŭ oni min diris, volas ŝirmi sin sub la esperanta standardo. Antaŭen iros la katalunaj esperantistoj; antaŭen iros «K. E. F.».—LA DELEGITO.

REUS

La ĉiujsemajna gazeto *Foc Nou* daŭrigas la publikigon de artikoloj pri Esperanto. La lasta kiun ĝi enpresigis estas subskribita de nia federaciano R. Pallejà.

SABADELL

En la pasinta Julio, oni interrompis la Esperantan kurson donita de la sperta samideano Sro. J. Xercavins, ĉe la oficiala supera lernejo de tiu ĉi urbo.

Tiu kurso en kiu nur ĉeestas la ĝeinstruistoj estis daŭrigata en sama loko —strato Jardí, n^o 4, 1^a et.^a, de post la monato Septembro, ĉiujn sabatojn de la 8^a ĝis la 9^a nokte.

En sama sidejo oni ankaŭ daŭrigis kursojn' de la sama lingvo, haltigita pro somera libertempo, al la lernantoj dezirantaj ellerni tiel belan kiel utilan lingvon. Ĉi tiuj kursoj okazas en ĉiuj semajnaj lundoj, merkredoj kaj vendredoj, de la 5^a ĝis la 6^a vespere. La lerniganto estas la oficiala instruisto, nia federaciano Sro: F. Pujadas, profesoro en la dirita lernejo.

TERRASSA

La ĉi tiea esperantistaro kunvenas du fojojn ĉiusemajne ĉe la grupo «Lumon» kie okazas praktika kurso per Esperanta babilado.

La infangrupo E. J. de L. malfermis kurson por infanoj ĉe «Lumon» ĉe estante pli ol dudekkvin.

Jen la komitato de la grupo: *Prezidanto*, Josep Girona; *Vicprezidanto*, Lluís Roig; *Sekretario*, Ismael Adell; *Voĉdonantoj*, Bartomeu Rocabert, Jaume Garriga; *Kasisto*, Miquel Bañbó. — LA DELEGITO.

Avizoj: Pro troa originalo ni devas prokrasti ĝis la venonta numero la publikigon de respondo al *Enketo*, verkita de nia redaktoro Sro. D. Dalmau.

— De post la venonta numero de K.E. ni ekkomencos raporti pri la *Alilanda movado*.



BIBLIOGRAFIO

Mi raportos pri verkoj nur kiam la redakcio donace ricevos du ekzemplerojn.

Pri la transkribo de la propaj nomoj. «Esperantista Centra Oficejo.» Dokumentaro pri la oficialaj, historiaj, historiaj, bibliografiaj kaj statistikaj aferoj. — Kajero 15. Raporto de Gaston Moch. 1 vol. 91 paĝa. — Prezo: 1 franco. — Paris, rue de Clichy, 51.

Paŝo al perfektigo de Esperanto. Verkita de Sro. Zygmunt Romanski, el Lwow. Kajero 63 paĝa. — Prezo: 1 krono.

Esperantista Murkalendaro por 1911^a. Kunmetita de 28 geesperantistoj el 16 diversaj nacioj, eldonita ĉe Eldonejo «Espero». Hago (Nederlando. — Prezo ne afrankite: 60 Sd. Ekster Nederlando nur havebla per la ĝeneral agentejoj.

Ni raportos pri ili en venonta numero.



KORESPONDADO

Sroj. J. G., P. A. kaj A. M. Viaj verkoj estos enpresigotaj en venontaj numeroj. — Sro. V. A. Via *idioto* ne estas, bedaŭrinde, perfekte priskribita; iliaj trajtoj ne estas bone desegnitaj kaj li ŝajnas plej bone diboĉulo ol idioto. Alie, la verketo ne estas flue, sed iom peze priskribita.

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO □ OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

SEN PAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
12. strato Gracia. — SABADELL
BARCELONA-HISPANUJO

AVIZO: La Redakcio konservas al si la rajton korekti laŭ bezono la manuskriptojn. Neakceptitajn manuskriptojn oni ne resendas.

ENHAVO: El la propra hejmo. — Sesa Universala Kongreso de Esperanto. — Enketo. — Enlanda Movado. — Alilanda Movado. — Oficiala Parto.

EL PROPRA HEJMO

ALVENIS aŭtuno! Kiam tiu sezono antaŭsentiĝas, kiam la naturo griziĝas kaj antaŭsciigas al ni la alproksimiĝon de la vintro kun ventoj kaj malvarmoj, kun noktoj longaj — terure longedaŭraj, kaj kun suno duonsveninta; kiam preskaŭ ĉiuj arboj senfoliiĝas kaj ĉio en la kampo, en la monto, en la arbaro ŝajnas silenti kaj ĉesi vivi, ni — la esperantistoj — rekomencas nian interrompitan agadon. Ĉien oni vidas aŭ divenas la ekentreprenitan laboron; ĉien oni konstatas movadon, agadon, entreprenojn; novaj batalantoj ekaperas; la malnovaj daŭrigas la haltigitan pro somerripozo, laboron; kunvenojn, kursojn, paroladojn, festojn, ekskursojn, ĉio kio estas propagando kaj disvastigo de nia celo oni faras kaj pretigas, kaj antaŭ ĉio tio ĉi oni sin demandas, ĉu ekkomencis aŭtuno aŭ printempo; ĉu la folioj falas aŭ burĝonas; ĉu la vetero estas griza aŭ ridetanta, vivoplena, hela...

Mi eĉ kuraĝus kredi ke ekzistas por ni nek aŭtuna nek vintra sezonoj, se la malvarmo kaj malsekaj noktoj kaj tagoj ne devigus al mi, malsanuleto, enhejmiĝi frue ĉiutage kaj pasigi en ŝajna ripozo la tro longedaŭrajn vesperojn kaj postvespermanĝojn; kaj ĝuste estas

en unu el tiuj noktoj, kiam la ĉielo tute hela, tute blua — antaŭsignoj de la malvarmo — ke mi konstatas tiun kontraston. Kaj mi min diras, ke estos por nia movado granda fruktedona bono, ke ni esperantistoj sentus neniam en nia rondo la senfoliigon, la griziigon, la malvarmon, la morton kaj eĉ la antaŭsignojn de aŭtuno. Ke aŭtuno ne alvenu por la arbo de Esperanto!

* * *

Aŭtuno alvenis, kaj kun ĝi novaj esperoj, novaj entuziasmoj, novaj kuraĝoj realaj, efektiviĝintaj. Kvazaŭ folio-novaĵo deŝirinta, forflugante haltis ĉe mi gazeto kiu asertas kio restas de mi skribita. *La Publicidad* la malnova ĉiutaga ĵurnalo kiu dum la tempo de la V^a raportis la Internacian Kongreson en Barcelona, decidis publikigi *Esperanta'n Rubriko'n*. Ĉu ne vere ni estas en printempo? Tio estas la suno kiu ree hele brilas. Ĝi lumis antaŭ multe, ĉu tempe, ĉu intermite ĉe aliaj ĉiutagaj barcelonaj ĵurnaloj, sed nia pasiveco igis tiun sunon kaŝi sub densaj nuboj. Ni ne plendu pri tio nune, kiam ĝi lumas pli intense, sed ni sciu per nia individua kunhelpado atingi ke ĝi brilu ĉiutage pli hele, pli varme, pli viviganta pro tio, ke ni devas ŝati eternan printempon. La Esperanta aŭtuno, for! for!

* * *

Aŭtuno alvenis! Folio deŝiris el arbo de Esperanto: tio bedaŭrinde estas tute vere! Kiam mi ĝin rimarkis, mi sentis kvazaŭ mordeton en la koro. Folio deŝiris, kaj falis. Kiam ĝi falis ĝi remermoris al mi tiujn, kiuj ankaŭ en nia lando flavigis kaj la vento forkunportis — «Espero de Katalunjo», «Stelo Kataluna», «Jen», «Supren». — «Morto estas vivo», diras proverbo. Antaŭ nune eble estis tiel, ĉar malgraŭ la morto de tiuj gazetoj multe antaŭeniris kaj firmiĝis nia movado ĉe ni. Sed la morto de la gazeto *Semo* eldonata de la barcelona grupo «Paco kaj Amo» montras la malon. Tiun ĉi fojon «Morto estas morto» kaj kio unuavide ŝajnos ke devus pleniĝi el mi per ĝojo, pro tio, ke «K. E.» havos malplian konkuranton, min malĝojigas ĉar ni ne estas komercistoj. Ĉio koncernanta al nia movado pli impresas min en la koro ol en la kapo, kaj mi bedaŭras la malaperon de *Semo*. Estas ankoraŭ tempo por pripensi, samideanoj! La sperto devus ja nin instrui grandmaniere por daŭrigi sur nia vojo. Ni liveru

la vivigantan sukon al arbo de nia ideo por ke la ŝajnaj vivantaj folioj, la aspekte vivantaj branĉoj ne mortu!

Aŭtuno, aŭtuno! Terure, vi grizigas mian koron: ĉu novan folion deŝiriĝos? Ĉu ankaŭ en nia kampo vi efikos? For, for, vi!

D. SERDÁ



SESA UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

MALFERMA PAROLO DE DRO. L. L. ZAMENHOF

LANDO de libereco, lando de estonteco, mi vin salutas! Lando, pri kiu revis kaj nun ankoraŭ revas multaj suferantoj kaj senkulpaj persekutatoj, mi vin salutas. Regno de homoj, kiu apartenas ne al tiu aŭ alia gento aŭ eklezio, sed al ĉiuj siaj honestaj filoj, mi klinas min antaŭ vi, kaj mi estas feliĉa, ke la sorto permesis al mi vin vidi kaj spiri almenaŭ dum kelka tempo vian liberan, de neniuj monopoligitan aeron.

Saluton al vi, Usono, plej potenca reprezentanto de la nova mondo. Ni, filoj de la malnova kaj maljuna kontinento, venis al vi kiel gastoj; sed ne vidama turismo enŝipigis nin, ne la espero de ia komerca akiro pelis nin al via bordo, ni venis al vi, por alporti al vi novan senton kaj novan ideon, ni venis, por alporti novan kuraĝon al tiuj niaj samideanoj kaj samidealanoj, kiuj ĝis nun laboris inter vi kaj kies vortoj pri ia nova popolo eble ŝajnis al vi tro fabelaj. Peco de tiu miksidevena kaj tamen lingve kaj kore unuigita popolo nun staras antaŭ vi reale kaj vivante. Rigardu nin, aŭskultu nin, kaj konvinkigu, ke ni ne estas fabelo. Ni estas diversgentanoj, kaj tamen ni sentas nin kiel samgentanoj, ĉar ni komprenas nin kiel samgentanoj, havante nenian bezonon humiligi aŭ fremdlingve balbutigi unu la alian. Ni esperas, ke dank' al nia laborado, pli aŭ malpli frue la tuta mondo similiĝos al ni kaj fariĝos unu granda homa gento, konsistanta el diversaj familioj, interne apartlingvaj kaj apartmoraj, sed ekstere samlingvaj kaj sammoraj. Al tiu nia laborado, kiu celas krei iom post iom unuigitan, sekve fortigitan kaj spirite altigitan homaron, ni nun invitas vin, filoj de Usono. Kaj ni esperas, ke nia voko ne restos vana,

sed ĝi baldaŭ eĉe resonos en ĉiuj anguloj de via lando kaj tra tuta via kontinento.

Nur tre malmultaj el ni povis veni en vian landon, ĉar ni, esperantistoj, ne estas homoj riĉaj; de nia nuna kongreso ni sekve ne povas atendi gravajn decidojn, kiuj havus signifon por la tuta esperantistaro. Ni venis al vi, Usonanoj, precipe por pasigi en via mezo kaj antaŭ viaj okuloj unu semajnon de nia esperantista vivo, por montri al vi almenaŭ malgrandan pecon de tiu vivo, por alporti al vi semon; kaj ni esperas, ke post nia foriro tiu semo potence ĝermos kaj kreskos, kaj en via lando nia afero baldaŭ havos siajn plej fervorajn kaj plej gravajn apostolojn.

* * *

En via lando, Usonaj samideanoj, nia afero estas ankoraŭ tro juna, kaj multaj el vi ne ellaboris al si ankoraŭ tute klaran juĝon pri ĝi; tial permesu, ke mi almenaŭ *iom* esploru antaŭ vi la vojon, kiun ni iras.

Kion celas la esperantista movado? Ĝi celas atingi reciprokan komprenadon inter ĉiuj homoj kaj popoloj. Por kio ni bezonas tian reciprokan komprenadon? Kiaj estas la sekvoj, kiujn ni atendas de ĝi? Kial ni deziras, ke ĝi estu nepre sur fundamento neŭtrala? Kial ni tiel persiste laboras por ĝi? Kia estas la spirito, kiu nin ĉiujn ligas inter ni? Pri ĉio ĉi tio mi jam multe parolis, kaj mi ne volas nun ripeti miajn vortojn, des pli, ke ĉiu el vi post kelka meditado facile mem trovos la respondojn. Antaŭ vi, praktikaj Amerikanoj, mi volas analizi alian demandon, nome: ĉu ni kun nia laborado staras sur vojo tute *certa*, aŭ ĉu ni povas timi, ke iam nia tuta laborado montriĝos vana? Nur plena konscio pri la irota vojo donas al la marŝantoj sufiĉe da energio, por kontraŭbatali ĉiujn malfacilaĵojn, kiuj troviĝas sur la vojo.

La celo, por kiu ni laboras, povas esti atingita per du vojoj; aŭ per laborado de homoj privataj, t. e. de la popolaj amasoj, aŭ per dekreto de la registaroj. Plej kredeble nia afero estos atingita per la vojo unua, ĉar al tia afero, kiel nia, la registaroj venas kun sia sankcio kaj helpo ordinare nur tiam, kiam ĉio estas jam tute preta. Kia devas esti la karaktero de la unua vojo, pri tio neniuj povas dubi; pri afero, kies tuta esenco kaj vivo estas bazita sur interkonsento, ĉiu komprenas tre bone, ke laborado de amasoj povas ĝin konduki al celo nur tiam, se ĉiuj laboras unuanime. En tia afero, se ĝi per si mem montriĝis vivipova, konkordo estas la plej certa garantio de

senduba sukceso, malkonkordo signifas la morton. Tion komprenas tre bone niaj samideanoj, kaj tial ili kun indigno forpuŝas ĉiun, kiu volas delogi ilin de la komuna vojo. Sed iufoje en la kapo de tiu aŭ alia samideano aperas la sekvanta demando; kio estos la sekvo, se la solvon de la internacilingva problemo volos iam preni sur sin ia granda *forto*, kontraŭ kiu ni ĉiuj estas tro senfortaj, ekzemple la registaroj de la mondo? Ĉu ni devas timi, ke ili eble elektos alian solvon, ol ni elektis, kaj tiamaniere nia tuta laborado fariĝos vana?

Por trovi klaran respondon al tiu demando, ni prezentu al ni, ke la registaroj de la mondo aŭ iaj aliaj grandaj kaj influaj potencoj starigis aŭtoritatan komitaton, kiu devas decidi, kia lingvo devas fariĝi internacia. En la artikolo *Esenco kaj Estonteco*, kiun multaj el vi legis en la *Fundamenta Krestomatio*, mi analizis tiun demandon detale kaj mi montris tute klare tion, pri kio en la nuna tempo jam neniu esploranto dubas, nome, ke tia komitato, pri kio mi parolis, neniel povus elekti ian lingvon nacian, nek ian lingvon mortintan, nek ian lingvon kun plene elpensita vortaro, sed ĝi devus nepre elekti nur aŭ Esperanton en ĝia nuna formo, aŭ Esperanton iom ŝanĝitan. Se la komitato kontraŭ ĉiuj postuloj de la prudento, volus fari ian alian decidon, ĝia decido restus nur decido papera kaj praktike absolute senvalora. Nun ni rigardu, kia estas la sola maniero, en kiu la komitato povus solvi la lastan alternativon.

Plej nature kaj plej kredeble estas, ke la komitatanoj rezonados simple en la sekvanta maniero: «Ekzistas lingvo artefarita, kiu montriĝis tute vivipova, bonege funkcias, bonege sin tenas jam multe de jaroj, kreis grandan literaturon, ellaboris sian spiriton kaj vivon, k. t. p.; sekve anstataŭ fari tute senbezone kaj sencele riskajn novajn eksperimentojn, ni simple akceptu tion, kio jam ekzistas, ni donu al ĝi la aŭtoritatan apogon de la registaroj, kiujn ni reprezentas, kaj tiam la tuta eterna problemo estos tuj plene solvita, kaj de morgaŭ la tuta civilizita homaro reciproke sin komprenos.»

Tia, mi ripetas, estas la plej natura decido, kiun ni povas atendi de la registare elektota komitato. Sed ni supozu, ke la komitato trovos, ke diversaj ŝanĝoj en Esperanto estas efektive tre *necesaĵ*. Kiel do ĝi agos?

Antaŭ ĉio ĝi sin demandos, ĉu ĝi estas sufiĉe *forta*, por altrudi sian teorion volon al tiuj multaj miloj da homoj, kiuj ĝis nun estis la solaj laborantoj en la afero. La esperantistoj laboris dum longa vico da jaroj, multe laboris, multe oferis kaj kun tre granda malfacileco fine akiris tion, kio dum multaj mil-jaroj ŝajnis neakirebla kaj kio, unu fojon perdita, neniam plu reakiriĝus, ĉar la mondo perdis la

tutan konfidon al la internacilingva ideo. Sekve ĉiu prudenta komitato dirus al si: ni devas esti tre singardaj, por ke, anstataŭ akceli la aferon, ni ĝin ne pereigu por ĉiam. Se la komitato scius, ke ĝin elektis ekzemple nur ia unu tre malgranda kaj malgrava landeto, ke la elekto estis nur tute senvalora formalajo, ke la elektintoj tute sin ne interesas pri la afero kaj ne havas eĉ la plej malgrandan intencon ĝin subteni, nek la forton por tio, tiam prudentaj komitatanoj nur simple esprimus sian opinion kaj dezirojn pri diversaj farindaj ŝanĝoj en Esperanto kaj lasus la akceptadon aŭ neakceptadon al la decido de la esperantistoj mem, sed neniam komencus konkuradon kontraŭ la esperantistaro, ĉar ili komprenus, ke morale tio estus nur peko kontraŭ la internacilingva ideo kaj praktike ĝi pli au malpli frue kondukus nur al fiasko.

Nun ni supozu, ke por la decido de la demando pri lingvo internacia estas kreita komitato, kiu havas forton ne *fikcian* sed *efektivan* kaj *grandan*. Antaŭe mi jam montris, ke se tia komitato ne volos, ke ĝia decido restu praktike absolute senvalora, ĝi povos preni nur aŭ Esperanton, aŭ ion tre similan al Esperanto. Mi diris jam, ke plej kredeble ĝi akceptos simple Esperanton en ĝia nuna formo. Sed ni supozu, ke ĝi tion ne volos fari; kiel do ĝi agos? Ĉar ĝi komprenos tre bone, ke por krei vivipovan lingvon tute ne sufiĉas esti instruita homo kaj diri al si «mi kreos»; ke oni ne povas tion fari laŭ mendo en la daŭro de kelke da semajnoj; ke tio postulas tre longan, fervoran, sindoneman, amoplenan laboradon, elprobadon, trasentadon, k. t. p.; kaj ĉar ĝi scios, ke ekzistas jam lingvo, super kiu multe da homoj tre longe laboris, kiu havas multejaran historion, kaj tutan vivon, ke tiu lingvo bonege funkcias, kaj nur malmultaj punktoj povas en ĝi esti disputeblaj: tial estas tute kompreneble, ke se la komitato traktos sian taskon serioze, ĝi ne riskos preni sur sin mem la kreadon de tute nova lingvo, nek prenos alian lingvan projekton, kiun la vivo ankoraŭ ne sufiĉe elprovis. ne komencos tute senbezone, sekve neprudente bataladon kontraŭ tiuj, kiuj ĝis nun laboris en la afero, sed ĝi prenos Esperanton kaj faros en ĝi tiujn ŝanĝojn, kiujn ĝi trovos necesaj.

Al kiu la komitato komisiis la faradon de la ŝanĝoj? En la tempo *prepara*, kiam estus necese esplori principe la demandon, *kian* lingvon oni devas elekti, la komitato povus komisi la laboron al kiu ajn, zorgante nur, ke la elektitoj estu homoj prudentaj kaj senpartiaj kaj komprenu la tutan respondecon, kiun ili prenas sur sin. Sed kiam la lingvo estus jam elektita kaj oni decidus fari en ĝi ŝanĝojn, kun kiu oni konsiliĝus pri tiu laboro? La plej simpla prudento kaj la plej

simpla komprenado de sciencaj metodoj diras, ke pri tia laboro oni devus konsiliĝi ne kun personoj, kiuj konas la lingvon de *ekstere*, sed antaŭ ĉio kun personoj, kiuj plej bone konas la lingvon *interne*, kiuj plej multe *laboris* por ĝi, plej multe praktike ĝin *uzis* kaj sekve havas en ĝi plej grandan sperton kaj plej bone konas ĝiajn mankojn *efektivajn*. Ĉiu komprenas tre bone, ke fari ŝanĝojn en iu lingvo, gvidante sin nur per ekstera ŝajno kaj ne konsiliĝinte kun personoj, kiuj plej bone konas tiun lingvon, estus tia infanaĵo, kiun certe neniam komitato povus fari, se ĝi traktus sian taskon serioze kaj ne estus sugestata de personoj, kiuj havas ian kaŝitan celon.

Kaj se la komitatoj decidus fari ŝanĝojn en Esperanto, kion ili povos ŝanĝi? Se ili ekzemple volos diri, «tiu vorto estas prenita el lingvo, kiun parolas cent milionoj, tial ni eljetu ĝin kaj prenu vorton el lingvo, kiun parolas cent dudek milionoj», aŭ se ili dirus, «aĵ ni ne plaĉas la praktike tute bona vorto «estas», ni preferas «esas», k. t. p., tio estas ja simpla infanaĵo, kiun seriozaj homoj certe ne permesus al si, ĉar ili komprenus, ke en lingvo, kiu havas jam multtejaran vivon, ŝanĝi grandan amason da vortoj pro simpla kaprico, pro ia pure teoria kaj praktike absolute senvalora motivo estus sen-sencaĵo. Memorante, ke oni atendas de ili ne ian teoriantan filologian amuziĝon, sed laboron *praktikan*, ili kompreneble ŝanĝus nur tiajn vortojn aŭ formojn, kiuj montriĝis kiel malbonaj *per si mem*, malbonaj *absolute*, grave maloportunaj por la *uzantoj* de la lingvo. Sed se vi trarigardos ĉiujn kritikojn, kiuj estis faritaj kontraŭ Esperanto en la daŭro de dudektri jaroj — kaj Esperanton ja kritikis jam multaj miloj da homoj, kaj certe neniu eĉ plej malgranda el ĝiaj mankoj restis kaŝita — vi trovos, ke la grandega plimulto el tiuj kritikoj estas simple personaj kapricoj. La nombro de tiuj ŝanĝaj proponoj, kiuj efektive povus havi ian praktikan valoron, estas tiel malgranda, ke ili ĉiuj kune okupus ne pli ol unu malgrandan folieton, kiun ĉiu povus ellerni en duonhoro; sed eĉ inter tiuj tre malmultaj supozeblaj ŝanĝoj la plej gravaj estas nur plibonigo *ŝajna*, sed en efektiveco ili post pli matura pripenso montriĝus eble nur kiel malplibonigo. Tiel ekzemple la forigo de la supersignoj kaj de la akuzativo, kion mi antaŭ dek ses jaroj proponis, por liberigi de la turmentantoj kaj faciligi la propagandon, kaj kion postulas la plimulto de la reformistoj, tiu ŝanĝo en la *nuna* tempo, kaj tiom pli antaŭ la okuloj de registare starigota kaj sekve forton havanta komitato, devas aperi kiel tute ne akceptebla, ĉar ĝi prezentus kripligon de la *interna* valoro de la lingvo, por plaĉi al ĝiaj *ekstera* rigardantoj, forigon de necesaj gravaj sonoj el la lingvo kaj de libera vortordo kaj klareco

por... ke la presistoj ne bezonu elspezi kelke da spesmiloj kaj la komencantoj ne havu kelkan malfacilaĵon.

Se vi prenos ian artikolon Esperantan, prezentitan de niaj kontraŭuloj, por senkreditigi Esperanton, vi preskaŭ ĉiam trovos nur unu aferon : grandan amasigon de la plurala finiĝo «j»; tiu malfeliĉa «j», kiun neniu tamen kuraĝas kritiki en la bela greka lingvo, estas la kvintesenco de ĉiuj teruraĵoj. kiujn niaj kontraŭuloj montras en Esperanto !

Unuvorte, ĉiu el vi povas facile konvinkiĝi, ke se iam registare starigota komitato decidus fari ŝanĝojn en Esperanto kaj se tiu komitato traktos sian taskon serioze, ĝi povos ŝanĝi en Esperanto nur tre, tre malmulte ; la postkomitata Esperanto restos tute la sama lingvo, kiel la Esperanto antaŭkomitata, nur eble kelkaj nunaj formoj fariĝos arĥaismoj kaj cedos sian lokon al pli oportunaj formoj, neniel rompante la kontinuecon de la lingvo kaj neniel ruinigante la valoron de tio, kion ni ĝis nun akiris. Tio estas ne nia pia deziro, sed tion plene certigas al ni simpla logiko kaj prudento, kontraŭ kiu certe neniam serioza komitato volos peki, se ĝi ne volos, ke ĝiaj laboroj restu absolute sen ia praktika rezultato.

Nun mi resumos ĉion, kion mi diris. Logika esploro de la afero montras al ni, ke :

1 : Lingvo internacia ne povas esti alia ol Esperanto.

2 : La evoluado de la lingvo fariĝos plej kredeble nur per tiu sama natura vojo, per kiu ĝi fariĝis en ĉiu alia lingvo, t. e., per la senrompa vojo de neologismoj kaj arĥaismoj.

3 : Se iam aperos la neceso fari en Esperanto ian ŝanĝon, tion povas fari nur aŭ la esperantistoj mem, per komuna interkonsento, aŭ ia grandega forto, sed nepre en plena interkonsento kun la tuta Esperantistaro.

4 : Se iam la Esperantistoj mem aŭ ia granda ekstera forto decidus fari en Esperanto iajn ŝanĝojn, tiuj ŝanĝoj povas esti nur ekstreme malgrandaj, neniam rompos la kontinuecon kun tio, kion ni ĝis nun havis kaj neniam senvalorigos tion, kion ni ĝis nun faris, faras aŭ poste faros,

Tio estas la sole ebla natura irado de la aferoj. Ĉiu, kiu volos kontraŭbatali tiun naturan iradon, nur perdos senbezone siajn fortojn. La Esperantaj radikoj de la arbo internacilingva jam tiel profunde penetris en la teron de la vivo, ke ne povas jam ĉiu deziranto ŝanĝi la radikojn aŭ ŝovi la arbon laŭ sia bontrovo.

Karaj kongresanoj ! Ĉio, kion mi diris, ne estas ia aŭtora memfido, ĉar mi plene konsentas kaj konfesas malkaŝe, ke, por ŝanĝi ion

en la natura irado de la internacilingva afero, mi estas tiel same senpova, kiel ĉiu alia persono. Mi defendas fervore nian nunan vojon nur tial ke la nerefuteblaj leĝoj de la logiko diras al mi, ke tio estas la sola vojo, kiu kun plena certeco alkondukos nin al nia celo. Kiu ajn volus ŝanĝi la naturan iradon de la internacilingva afero — tute egale, ĉu li estas malamiko de Esperanto aŭ ĝia plej flama amiko, ĉu li estas senfamulo aŭ eminentulo, ĉu li agas per vortoj aŭ per mono kaj ruzaĵoj, ĉu li estas plej fanatika konservemulo aŭ plej facilanima eksperimentisto de novaĵoj, ĉu li estas plej pura idealisto aŭ plej profitama egoisto, ĉu li bruas kaj malbenas aŭ kaŝite laboras sub la tero — li neniam sukcesos; li povos nur krei kelktempan skismon kaj akiri la malĝojan gloron de malhelpanto kaj subfosanto, sed neniam li povos devigi ĉiujn amikojn de la internacilingva ideo pro iaj sen signifaj bagateloj forĵeti tion, kion ili posedas, kio montrigis plene vivipova, en kion estas jam enmetita tia multego da laboroj kaj da vivo kaj kio per natura vojo devas iom post iom konstante ensorbi novajn sukojn. Tion devas bone memori ĉiuj, kiuj laboras sur la kampo de lingvo internacia, kaj se ili tion ne memoros, la vivo mem donos al ili la necesan instruon.

Ni povas sekve labori trankvile; ni ne devas malĝoji, se nia laborado estas iafoje tre malfacila kaj sendanka; sur nia flanko estas ne sole la fajro de niaj sentoj, sur nia flanko estas ankaŭ la nerefuteblaj leĝoj de la logiko kaj prudento. Pacience ni semu kaj semu, por ke niaj nepoj iam havu benitan rikolton. Al la Sesa Esperantista Kongreso, kiu sendube enĵetos multe da semoj en la teron Amerikan, mi eldiras mian koran saluton.

L.-L. ZAMENHOF



ENKETO

LA karaj amikoj Sroj. A. Lagarriga, el Sabadell kaj J. B. y F., el Moncada, bonvolis partopreni en mia proponita Enketo pri kio estas artikolo kaj ĝia gramatika sameco je la adjektivo. Tial mi ilin gratule dankas, ĉar ilia tre valora partopreno gravigis ĝin, kaj mia celo krei instruantaĵon, realiĝis.

Ni konkretigu kaj koncizigu kaj pretigu esti malpravaj. Se tion ni faras ni alvenos al la deca — malgraŭ maloftega — fino en inter-

konsento, kiu estas la lumo kiun signifas la proverbo, «la interdiskutado elnaskas la lumon.»

La lumo kiun nia interdiskutado devas elnaski estas la difino pri la artikolo.

Mi intencis elpruvi, per mia antaŭa verkaĵo, ke la difino pri la artikolo estas en la difino pri la adjektivo; kaj sekve ke ĝi estas ia adjektivo.

Miaj nomitaj amikoj ne konsentas mian opinion kompreneble, ĉar malsama estas nia respektiva bazo; malgraŭ tio, en niaj verkaĵoj estas komuna interkonsento; mi diris ke *tiu* (*tiu homo*) kaj la (*la homo*) havas saman komunan gramatikan sencon. Ili tute konsentus, se mi ne nomus *tiu* 'n per «adjektivo». Ĉu?

Sed mi opinias je la bazo ke *tiu* (*tiu homo*) estas adjektivo kaj ili, je la bazo ke ĝi estas pronomo. Ĉu?

Tiu estas ĉu pronomo, ĉu adjektivo. Ĉu pronomo ne estas la vorto kies ofico estas *anstataŭi la nomon*? Kial, do, karaj amikoj Lagarriga kaj J. B. y F., vi opinias ke la vorto *tiu* estas pronomo ĉe *tiu homo*? Eble mi scias tiun kialon. Vi juĝas la vortojn, en nia okazo, ekzemple, atente nur al la vortoj mem; vi scias ke *tiu* (ĉe *tiu venas*, *mia libro estas tiu*, ekzemple) estas pronomo kaj tial kiam vi vidas la vorton *tiu* vi vidas pronomon. Ĉu? Mi juĝas la vortojn nur atente al ilia gramatika ofico. Tial mi opinias ke *tiu* estas adjektivo ĉe *tiu homo*, *tiu libro*, k. c., malgraŭ ĝi estas pronomo ĉe *tiu venas* *mia libro estas tiu*, k. c.

Ankaŭ alio influas por la malsameco de nia respektiva bazo. Vi konsideras, ŝajnas al mi, ke nur estas adjektivoj la kvalitaj adjektivoj, mi konsideras ke estas adjektivoj ĉiuj vortoj, kiujn oni kunmetas kun substantivoj, por ilin kvalitie aŭ determini iel ajn. Mian pravecon pruvas la gramatikuloj klasifikantaj la adjektivojn ne nur je kvalitaj sed ankaŭ je determinaj (montraj, numeraj, posesivaj, k. a.).

Konklude, se vi konsentas ke la vorto *tiu* estas adjektivo, krom pronomo alifoje, vi konsentas ankaŭ ke la artikolo estas adjektivo.

DELFI DALMAU



ENLANDA MOVADO

BARCELONO

La esperantista grupo «La Rondo» disvastigis ĉie cirkulerojn alvokante per ili, reprezentantojn de ĉiuj esperantistaj societoj kaj grupoj.

La unua kunveno okazis la 29^{an} de la Septembra monato, atingante ĝi veran sukces plenecon.

Ĉeestis en tiun kunvenon grandamaso da delegitoj, kiuj reprezentis 19 el la plej gravaj societoj kaj grupoj en nia urbo, aplaŭdante ĉiuj la ideojn elmontritajn de la invitinta grupo.

Tio pruvis klare, evidente, ke malgraŭ ekzisti kelkaj pesimistoj aŭ laculoj, kolektiĝas sub nia standardo granda plimulto da samideanoj, kiuj certe amas Esperanto'n kaj fervore sin mem oferas por atingi plej baldaŭ kiel eble nian deziratan celon.

Okazis alia kunveno la 6^{an} de Oktobro, kaj en tiu lasta pridiskutado oni elarangi la interesan aferon, tio estas, restis fondita la «Centra Komitato» de la Barcelona Esperantistaro.

Ĝi estos la zorganto de ĉio kio estas interesinda pri nia atero, ĉefe, de tio, kio enhavas komunan rilaton enlandan kaj eksterlandan.

Ni deziras al la nova organizajo veran sukceson.

En kunsido okazinta ĉe «Espero Kataluna» la «Centra Komitato» de la «Barcelona Esperantistaro», aprobis ĝian regularon, kaj oni elektis Sron. C. Viñol kiel sekretario.

Oni bonvolu adresi la korespondadon al la nomita sekretario, ĉe «Grupo Libero», (strato Mercè, 19, Barcelono).

Novaj kursoj. — La grupoj «Barcelona Stelo» kaj «Esperanto kaj Patrujo» malfermis novajn kursojn. Nokte en la unue dirita grupo kaj dimanĉon matene en la dua.

